

The Australian Esperantist

(Successor to *La Suda Kruco* and *La Rondo*)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$12.
(Individual, family, club, federation and pensioner)
Full-time Students \$8



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063
Sekretario/Kasisto: S-ro L. V. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W. 2095
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 168 (248)

MELBOURNE

Jan.-Feb. 1979

LA INSTRUADO DE ESPERANTO

Oni petis min verki artikolon pri la instruado de Esperanto laŭ la vidpunkto de "profesia instruisto". Apenaŭ necesas diri, ke oni ne povas fari lertan instruiston per unuopa artikolo, nek estas eble diskuti en tia artikolo ĉiajn metodojn de lingvoinstruado.

Pri la metodoj oni ankoraŭ kverelas. Sed la bone konata Usona lingvosciencisto Leonard Bloomfield prave diris antaŭ 50 jaroj, ke la metodoj de lingvoinstruado malsimilas multe pli sur papero ol en la klasejo, kaj ke la sukceso de la instruado dependas multe pli de la lerteco kaj scio de la instruisto ol de la metodo.

Tamen ekzistas kelkaj principoj kiujn akceptas preskaŭ ĉiu sperta instruisto, kaj tiujn mi mallonge traktos.

Unue, la lernanto devas akiri bonan elparolpovon ekde de komenco de la kurso.

Kiel atingi tion, oni ankoraŭ diskutas. Persone, mi ĉiam trovis plej efika la klarigon de ĉiu sono per la patrolingvo, uzante samtempe, kie necese, klarajn diagramojn de la pozicio de la lango kaj lipoj ktp., sekvatan de multe da ekzercado de ĉiu sono en mallongaj fraz(et)oj kiuj estas samtempe utilaj, ĉiutagaj, kaj bezonas malmulte aŭ neniom da klarigo (krom ilia signifo).

Due, la lernanto devas ĉiam klare kompreni la signifon de novaj vortoj aŭ gramatikeroj kaj la vortaranĝon de la lingvo, antaŭ ol komenci ian ajn ekzerkadon.

Ankaŭ pri la plej bona metodo por atingi tiun celon oni ankoraŭ akre kverelas. Iuj volas komplete eviti la uzon de la patrolingvo, penante klarigi la signifon de ĉiu nova ero per la lingvo lernata, per gestoj, bildoj, ktp., "kiel infano lernas sian propran lingvon".

Aliaj simple tradukas en la patrolingvon, kaj uzas tiun ankaŭ por klarigi la gramatikon.

Persone, mi ĉiam uzis iom el ĉiaj metodoj, laŭ la cirkonstancoj, la aĝo, la lerteco kaj la celoj de la lernantoj.

Ekzistas granda diferenco inter infaneto kiu ankoraŭ scipovas nenian lingvon, kaj pliaĝulo kiu jam lernis almenaŭ unu lingvon. Oni povas perdi multe da tempo penante klarigi abstraktan ideon, eĉ, simplan kiel "tago" kaj "nokto", ne uzante tradukon, kaj ofte oni ne povas esti tute certa ĉu la lernantoj ja komprenas la veran signifon, eĉ kiam ili ĝuste respondas al demandoj en la celloj.

Sed mi vidas nenion kontraŭ tio, ke oni indikas ajon, aŭ bildon de tia, kaj diras: "Tio estas taso (seĝo, domo, ktp.)."

Persone, mi ofte prezentas novajn vortojn en kunigitaj frazoj en la celloj, pri iu temo, ekz. "LA LERNEJO: Nia lernejo staras sur monteto en granda urbo. Ĝi enhavas dudek klasejojn. En ĉiu klasejo troviĝas nigra tabulo, tridek pupitroj kaj tridek seĝoj. Estas ankaŭ tablo kaj seĝo por la instruisto. (ktp.)."

Ĉiu lernanto havas ekzempleron de tia peco, aŭ en la lernolibro, aŭ multobli-

gitan, kaj antaŭpreparas liston de la novaj vortoj, kun iliaj (anglaj) signifoj.

Ni komencas la lecionon laŭtlegame la liston: "la lernejo — the school", ktp. Post tio mi laŭtlegas la unuan frazon, kaj igas iun lernanton fari same, kaj poste traduki en la anglan. Post tio la tuta klaso laŭtlegas la frazon, imitante la instruiston. Kaj simile por ĉiu frazo ĝis la fino de la peco.

La plej grava afero, post kiam oni estas certa, ke ĉiu nova vorto kaj frazo estas komprenita, estas multe de ekzercado — pri kio mi parolos poste.

Same pri la gramatiko: mi ĉiam trovis, ke la lernantoj demandas: "Kial la finigo tie ŝanĝiĝas?" kaj tiel plu. Mi do ĉiam mallonge klarigas en la patrolingvo la novan gramatikon aŭ vortaranĝon — antaŭenirante de ekzemploj, el kiuj la klaso deduktas la novan gramatikon — kaj tuj poste: multe da ekzercado!

Kaj tio kondukas nin al la tria principo: ĉiuj konsentas, ke multe da ekzercado estas necesa — sed oni ne samopinias, kiel fari tion! Iuj evitas (kiel la peston!) la tradukadon kaj ekzercas la novajn vortojn aŭ frazkonstruojn en la lingvo lernata, uzante ekzercojn en kiuj oni ŝanĝas la vortordon, aŭ la verbotempon, aŭ la finiĝojn, respondas al demandoj, kompletigas frazojn, ktp., pretendante ke la lernantoj lernos ilin samkiel la infano lernas sian propran lingvon en la komenco.

Ree persone, mi kutime komencas per diktado de kelkaj frazoj el la peco supre

menciita, kun la libroj fermitaj, aŭ de frazoj uzantaj la novan gramatikon. Post ĉiu frazo ni korektas, aŭ per komparo kun la lernolibro, aŭ per la nigra tabulo; post tio la klaso laŭtlegas la frazon kune, imitante la instruiston.

De aliaj frazoj mi diras la (anglan) tradukon (kun la libroj fermitaj), aŭ diras angle simplan frazon uzantan la novan gramatikon, kiun la klaso tradukas skribe en la alian lingvon. Post korekto, ĉiuj laŭtlegas la frazon, ree imitante la instruiston.

Por hejmtasko mi donas demandojn, kiujn oni devas respondi skribe, uzante (ĝenerale devante iom ŝanĝi la tekston en la libro) la novan materialon. Post individua korekto en la sekvanta leciono ni parole uzas la samajn demandojn kaj respondojn, poste iujn novajn.

Mi ankaŭ uzas la ŝanĝon kaj kompletigon de frazoj ktp. kiel supre menciite.

La kvara principo estas: antaŭ ol enkonduki novan temon, ĉiam mallonge reviziu la antaŭirintan; kaj de temp' al tempo reviziu tutan aron da antaŭirintaj temoj. Mallonge: ofte reviziu.

Fine, mi konsilas: ĉiam uzu bonan lernolibron — sed ne sklave: faru viajn proprajn pluajn ekzercojn, se vi opinios tion necesa; ŝanĝu, ellasu aŭ aldonu laŭ la cirkonstancoj de la klaso; sed zorgu, ke tio ne fuŝas la planon de la libro! Kaj neniam uzu libron, kiu ne plaĉas al vi!

Postskribe: regula uzo de facila legolibro inter la alia instruado aldonas intereson al la kurso kaj vigligas ĝin.

—ALAN TOWSEY.

TRIVIALAJ ANALOJ

— 1978 —

Sub la titolo "Laŭ mia . . . ridpunkto" verkis, ekde 1952 ĝis 1970, Raymond Schwartz por "Sennacieca Revuo" raportojn, pli aŭ malpli fantaziajn, pri la "ĉefaj eventoj" de la antaŭa jaro. Komplete de tiuj artikoloj, kun notoj verkitaj de Ulrich Lins, troviĝas en la libro ". . . Kun Siaspeca Spico!", Stafeto Bel-literatura Serio 29, La Laguna 1971.

En Nov-Jorko en 1976 mi verkis por la Zamenhofa Vespero la "Banalajn Analojn" de tiu jaro . . . laŭ mia ridpunkto. Nia kara mortinta satiristo Schwartz pardonu min, ĉar mia eseo estis pala imitado de lia majstra spicoplena stilo. Tamen la imitado estas la plej sincera formo de flatado. Ankaŭ ĝi plaĉis al la novjorkanoj, kaj mi daŭrigas

la aferon por ili ĉe la Zamenhofa Vespero de 1977. Nun mi prezentas al la ŝvarcamaj Esperantistoj de Aŭstralio la "ĉefajn eventojn" de 1978. Mi esperas, ke ĉi tiu interpreto de la hodiaŭa historio ridigos, kaj ne rigidigos miajn amikojn de AEA! Mi bedaŭras, ke mi ne povos korespondi pri miaj komentoj. Mi estos tro okupata, observante la eventojn de 1979 . . . laŭ mia speciala ridpunkto! RLH.)

En multaj landoj oni kutime elektas ĉiujare la elstaran patron aŭ patroninon aŭ sportulon aŭ (pli rare) Esperantiston, kiu nomiĝas "La Patro de la Jaro", "La Patrino de la Jaro", "La Sportulo de la Jaro", aŭ eventuale "La Esperantisto de

la Jaro". En Unuigintaj Nacioj oni havas tute malsimilan kutimon. Ĉiujare oni lanĉas kampanjon por, ekzemple, la virinoj, aŭ la infanoj (neniam por la viroj aŭ por Esperanto) kaj tiu jaro nomiĝas "La Jaro de la Virino" aŭ "La Jaro de la Infano" (bedaŭrinde neniam ĝis nun "La Jaro de Esperanto").

En la Analoj de 1976 LMR (laŭ mia ridpunkto) mi elmontris ke tiu jaro estis "La Jaro de Seismoj". 1977 estis la Jaro de la Viroj. Kaj 1978 estis "La Jaro de Rekordoj kaj Unikajoj".

En multaj landoj okazis rekordaj inundoj. En Hindujo milionoj devis fuĝi antaŭ la akvo de la rivero — antaŭ nundo ne de la libroj de Raymond Schwartz, sed de la sakra rivero Gango. Oni timis ankaŭ la revenon de Indira Gandhi (vidu Analojn de 1977) sed tio estis onidiro de inoj aŭ in-dra afero.

En Nov-Zelando okazis ankaŭ la plej granda inundo en la tuta historio de ĉiuj insuloj iaŭ la Libro de Rekordoj de Guinness (pron. ĝines). Oni konsilis al turistoj kiuj vojaĝis al Nov-Zelando en novembro, ke ili kunportu siajn proprajn remboatojn. Tiam oni organizis konkurson de remado. El katastrofo oni tiel faxis boatkanton, fakte polinesian katamaranan muzikon aŭ katarion.

En la Filipinaj Insuloj faris la rekordan grandega tifono, kiu kunportis inundojn. Multaj homoj perdis siajn domojn kaj vestaron, kaj estis tute nudaj. Eĉ estis nudinoj, kiuj venis el la inundoj. En Paruo Nov-Gvineo estis inundoj de akvo de la rivero, kaj ankaŭ de homoj el trans la landberdo, sed mankis ondo de inoj. La inoj diris unuvoĉe: "Nia aro estas sufiĉe onda!"

Okazis rekorda homa inundo ankaŭ en Bulgario, kiam Esperantistoj el la tuta mondo invadis Varna. Estis la plej granda vagado de verdaj vagabondoj post la Universala Kongreso de 1923 en Nurembergo. Vere estis streĉita rekordo, kaj Ho! Kia floro! Ĉeestis multaj rusaj turistoj, tre fieraj pri la turoj de la Kremlo. Estis en Varno ankaŭ kelkaj ĉinoj. Ili konfirmis, ke Popola Ĉinio ne ŝatas spiralajn turojn, kaj eĉ ne plu bul-turan revolucion. En okcidento Nenio Nova sed kompreneble en Varna oni havis ravan UK!

En Romo en 1978 okazis inundo de papoj. . . tri papoj en unu jaro ne estas unuĉaŭ sed estas tre rara okazaĵo. Kiam la Episkopo de Romo mortas ĉiu gazeto havas paperon, kaj en 1978 la papo mortis dufoje, kaj dufoje oni devis elekti novan la unuan fojon oni rapide elektis italon kaj la litanio ĝojigis Italion. La

kardinaloj finis sian karnavalon en la Sistina Kapelo tiel rapide, ke oni ne kredis, kiam la blanka fumo fumo rapide aperis, iaŭ la tradicia nonco-anonco. Sed tio ne estis la fina papago de 1978. Post kelkaj semajnoj la papo denove mortis, kaj oni devis trovi novan fiŝkaptiston por plenigi la ŝuojn de la papavo. Ĉiu scias, ke oni nepre bezonas papavon por fabriki la opion, aŭ almenaŭ la opinion de la popolo! Do la kardinaloj denove eniris la kapelon, kaj post iom da nigra fumo, montriĝis blanka fumo por indiki la elekton unikan de polo — Johano Paŭlo la Unua, filo de Pollando, naskiĝloko de Esperanto. Bedaŭrinde li ne parolis Esperanton kiam li alparolis la mondon, sed ni estas Esperantistoj, ĉu ne? (Ĉar li estas poligloto, estis eble nur pologlito! Certe la eklezio ne havas monopolon sed malriĉulon!

En Varna la Universala Esperanto-Asocio ne devis elekti novan papon. Oni kreis novan rekordon en la Esperantomovado. Oni ne subfosis la Prezidanton, sed kontraŭe subtenis lin. La Prezidanto majstre prelegis, kaj ĉiuj diris ke UEA havas ne nur bonan teatron, sed ankaŭ bonan ton-kinon. Feliĉe li ne ludas golfon, ĉar ĉiuj rememoras la sekvon de la afero de Tonkina Golfo.

Alia unika okazaĵo en 1978 estis la naskiĝo de bebo post koncipio, aŭ fekundiĝo, de patrino ovo en botelo. Ofte en la pasinteco estis botelo en bebo, sed neniam antaŭe bebo kiu naskiĝis pro botelo. Precize dirite estis provtubo anstataŭ ovtubo! Tia infano estas bona simbolo de Esperanto. Kvankam oni nomas ĝin "artefarita", fakte ĝi estas farita el tute normalaj elementoj. Nia karefarita lingvo ankaŭ floras kaj evoluos tute same kiel lingvo kiu naskiĝis laŭ la normala hazarda-arda metodo. Alian rekordon rompis virbovo en Irlando, kiu estas patro de 17,000 artesemitaj bovidoj. Eĉ Amin ne povas nature tiel "idi"!

Inter la sportaj rekordoj, kiujn oni atingis aŭ superis en 1978 la plej elstara triumfo estis la transiro de la atlantika oceano per balonego. Unue parvo de anglaj balonistoj celis gajni la marbordon de Anglujo pli malkare ol Kavaliro Freĵo Laker. Sed ili ne havis sufiĉe da gaso aŭ balasto, kaj devis malsupreniri ius kiam la venko ŝajnis en la mano. Ili ne estis anĝeloj aŭ agloj sed nur angloj! Sed sukcesis du usonanoj kiuj rifuĝis el sia hejmlando por serĉi la paradizon celatan de ĉiu mortonta amerikano — Parizon. La Esperantistoj poŝte ankaŭ ekspluatis balonegon sed nur

en Svislando por transiri la lageton de Zurich. Por kelkaj partoprenantoj en la UK en Varna estis ankaŭ balo-nego, sed tio estas alia historieto. Ĉiokaze, pro manko de balkono la kongresa balo ne estis balo profesia, sed nur afero de balalaiko!

En la olimpia konkurso por la venko de la kosma spaco la rusoj rompis la rekordon por restado sur spacŝipo. La rusa laboratorio ricevis vizitantojn el sovetunio, eĉ el Pollando kun bombonoj kaj leteroj de la familioj. Post tio la astronautoj decidis, ke la spaco en la raketo estis tro limigita, kaj ili revenis teren. Pli bone edz'no en dometo ol kamarado en spacpulsako! Dum la jaro la usona spacŝipo, vere pacŝipo daŭrigis sian veturadon al Jupitero kaj Urano. Ĝi kunportis komunikadojn al la popoloj de la Lakta Vojo en diversaj lingvoj, inter ili Esperanto. Tiel via analisto fariĝis la Esperantisto kun la plej longatinga parolado. Tra la universo iras forta voko! Piloto en aviadilo super Basa Markolo inter Aŭstralio kaj Tasmanio raportis en Decembro, tuj antaŭ sia malapero, ke sekvas lin neidentigita fluganta objekto (NOFO). Ĉar estis tro malfrue en la jaro esti Esperantisto revenanta el la Tutaŭstralio Esperanto-Kongreso en Launcestono, la Ĉefministro de Grenadio proponis, ke Unuiĝintaj Nacioj tuj komencu enketon pri la afero.

En Nov-Jorko kaj ankaŭ en Aŭstralio junuloj klopodis rompi la rekordon pri la falo de domenoj. En antaŭaj jaroj la teorio pri domenoj rilatis ekskluzive al la reĝa sporto inter la superpotencoj en Sudeost-Azio. Sed en 1978 ĝi fariĝis sporto de balsalono. Tie kie oni antaŭe dancis en domenoj, nun oni klopodas faligi kelkajn milojn de domenaj tabuletoj. Bedaŭrinde dum unu provo ĵurnalisto tiel ekscitiĝis, ke li lasis sian mikrofonon fali sur la vicon de falantaj

domenoj. La ambicio de la domenludanto en Nordameriko estas nun havi domenojn de maro al maro. Oni deziras vidi ne nur la eksteron de la Blanka Domo sed ankaŭ la domenenon. La Usonanoj ludas domine en tiu sporto, lerte kaj sperte.

En Aŭstralio fariĝis tre populara la sporto stratpromenado. Mi ne parolas pri la plej antikva profesio, kies adeptoj troviĝas ĉe stratanguloj en ĉiu lando, profesie aŭ amatore. Ankaŭ mi ne parolas pri la marsantaj knabinoj, la majoritoj de la tamburo, kiuj antaŭiras la muzikistarojn en minijupaj uniformoj (sed kun tre variaj formoj!). Ne, mi parolas pri la protestantaj promenantoj de Brizbano, la ĉefurbo de Kvinlando, aŭ Brisbano la ĉefurbo de Kvinlando. En la saŭno aŭ ŝvitbano pli ofta ol brizo en tiu urbo eĉ parlamentanoj partoprenis paradojn. Tamen la ĉefministro ne estis sportamanto kaj malpermesis la praktikadon de marŝado sur la stratoj sen permeso. Tial oni devis inventi novan sporton—veturadon sur la stratoj en policaŭtomobilo, kaj oni kreis rekordon por la nombro da protestantoj, kiun oni povas ŝovi en unu aŭtomobilon. Ĉar Brizbano ne valoras permeson.

En la lastaj horoj de la jaro oni ankoraŭ atakis diversajn rekordojn, inkluzive la rekordon por la plej longdaŭra seninterrompa ludado de hokeo sur glacio, kaj dancado en diskoteko. La dancado en diskmuzikejo ne estas tre interesa. Pli grava ol diskoteko estas ŝtekdiko! Sed la glaciĥokeo estas internacia sporto. La lastan tagon de 1978 okazis rekorda frosto en Moskvo. Estis glacio sur ĉiu strato, kaj verŝajne la rekordo por daŭra sketado transiros al la rusoj. Sed tio estos ero por 1979.

—R.L.H.

NIA GASTARTIKOLO

PACKONTRAKTOJ

J. Kohen-Cedek (Jerusalem)

Tio ĉi ne estis intervjuo. Estis ĝi simpla konversacio. Inter du malnovaj amikoj, kiuj renkontiĝis post longedaŭra disiĝo, pri kio kulpas unu granda maro kaj unu oceano.

Renkontiĝinte ni eniris kafejon por interŝanĝi pripersonajn informojn kaj, laŭ la iama kutimo, por kune solvadi la mondajn problemojn. Ĉi-foje la kon-

versacio elvokis en mia koro mizantropajn pensojn. Kaj ĉar mi jam rakontis al vi multajn okazintaĵojn, bonvolu eltoleri ankaŭ tiun ĉi.

Mia kunulo estis mezaĝa amerikano kun pipo en buŝangulo, kun nigraj vangharbetoj (inter kiuj jam aperis arĝentaj fadenetoj), kun tre grandformataj okulvitroj, kun sufiĉe granda kalvajo surkape,

kaj kun ne eltolerebla angla prononcmankon, eĉ parolinte la gepatran lingvon. Estis li unuaranga ĵurnalisto, verkanto de la pripolitikaj ĉefartikoloj en tre influa novjorka gazeto. Kvankam nasikiĝinto en orienta Eŭropo, li dum jaroj ensorbis en sin (krom la prononco) la usonajn vivoformojn, ĝian hura-patriotismen, amerikan pensostaton kaj la usonan ĵurnalisman pensmanieron. Ĉar ankaŭ la amerikanoj scipovas pensi. Ofte eĉ tro sobre.

Jes, ni konsideru, ke la konversacio okazis antaŭ ses jaroj (Ho, kiel rapide forpasas la tempo!) ĝuste kiam sur la tagordo de la mondo urĝis la pacproblemo inter la du Vjetnamoj. Kaj ni ambaŭ devis la problemon solvi. Tiam la usonanoj kun Kissinger, per ŝnuregoj tirligis al siaj aliancoj la brakojn malantaŭ la dorso, admone kvietiginte ilin, ke ĉio estas bonorda. Kissinger klarigis al ili, ke la intenco estas kaŭzi al ili la plejplejan bonon. Tiel estis la sudvjetnamanoj eldevigitaj subskribi packontrakton kun la agresemuloj.

La afero aspektis al mi kiel danĝera aventuro. Mi ne scias, de kie venis al mi tia ragaca akravido, suspekti la packontrakton, dum ĉiuj gazetoj kaj ĉiaj informiloj raportadis pri floroj, pri ĉielarko, pri blankaj kolombinoj kun olivaj branĉoj en la bekoj, kaj kantis halelujon. Kissinger kun Duk-Tor jam pretigis la veturon al Oslo por akcepti la nobelrememorojn por Paco. Unuvorte, same kiel okazas nun, dum mi tajpas la memorajojn. Do, ĝuste tiam okazis la konversacio kun la amerikano. Kaj mi provokintence diris:

"Kion vi faras? Ja la nordanoj poste invados en la sudon kaj militkonkeros ĝin. Vi vendas viajn kunbatalintojn, viajn proprajn aliancojn! Tiu ĉi ŝtato estas likvidota post nelonga tempo . . ."

Mi konfesu la veron. Fakte mi ne antaŭvidis la staton, sed nur suspektis ĝin. Mi ankoraŭ ne estis firme konvinkita pri mia konjekto. Kaj mi prezentis tian prognozon en espero, ke la brila ĵurnalpolitikisto konvinkos min je kontraŭo. Ke li per siaj kompetentaj argumentoj kaj sia anglosaksa prononcmankon klarigos, ke mi eraras. Kaj ke li trankviligos miajn vanajn neraciajn timojn. Mi atendis, ke la amiko, kiel kutime, grumble insultos:

"Kion ci babilaĉas, freneza stultulo? Ja ili publike subskribis enhavkonatan interkonsenton. kaj tio ĉi devigas. Ĉu ne plu ekzistas UNO, kiu gardas la realigojn de packontraktoj? Kaj Usono ja estas la garantiinto. Ĉu tio ne sufiĉas?

Ĉu ci, furioza nenormalulo, deliras? Ĉu ne sufiĉas la ĝis nun elverŝita sango? Ja ĉiuj flankoj jam delonge laciĝis de militoj! . . ."

Mi atendis tian, aŭ ian similan respondon, akompanatan per riproĉoj. Sed mia kunulo ne ekscitigis. Indiferentmiene li rebruligis la estingi ĝintan pipon, ekkirlis per kulere to la kafon en la taseto kaj malŝatone diris: "O.K.! . . . All right . . . So what, . . . Eĉ se tiel, do kio okazas? Kio vin maltrankviligas?"

La respondo min frapis kiel subita tondro. Tiam cinikecon mi ne atendis eĉ de amerikano, eĉ de la plej sincera ĵurnalisto. Dumlonge mi edife klarigadis al li la diferencon inter vero kaj trompo, inter bonvolo kaj insidemo, inter justo kaj konsciencmanko. Sed vane: li restis indifera. Por li la interesoj de Usono superis ĉion.

Tiu ĉi cinikan respondon mi ne povas

Nun la sudaj vjetnamanoj denove aperis sur la monda tagordo. Tial mi deziras memori la priskribitan konversacion al ĉiuj, kiuj kapablas aŭskulti kaj konsidero, ke eĉ la plej frenezaj stultuloj povas realiĝi en nia furioza mondo. Krom tio, ni la civitanoj de Mez-Orientaj ŝtatoj nun troviĝas en tute simila situo kiel la sudaj vjetnamanoj antaŭ ses jaroj. Kaj la sama danĝero minacas ankaŭ al ni . . .

64-a Universala Kongreso — Luzern

Ĝis 24-a de januaro aliĝis 911 kongresanoj el 43 landoj. Ĉefe ili venas el Francujo (136), Svislando (111), Nederlando (100), FR Germanujo (94) kaj Svedujo (64) El Aŭstralio la sekvantaj intencos partopreni:

Ges-roj L. V. Scott (Manly)
S-ino G. Kirkwood (Coffs Harbour)
S-ino B. Cleminson (Manly)
S-ino O. Russell (Sydney)
S-ro E. Chandler (Sydney)
F-ino L. Samblebe (Melbourne)

La svisa poŝto eldonos specialan poŝtmarkon, je valoro de sf. 0.70, kiu taŭgas por sendi poŝtkarton al eksterlando.

Rektoro de la Internacia Somera Universitato estos la konata verkisto Johan Valano ("Ĉu vi kuiras ĉine?" "Malmalice"), konata ankaŭ kiel Claude Piron.

Ĉiu kongresano ricevos senpage 160-paĝan libron "La fenomeno Svinlando", originale verkitan de D-ro A. Baur, kiu estas la redaktoro de Esperanto-programoj de la Svisa Radio.

AŬSTRALIA = KRONIKO

● **PERTH:** La Jarkunveno okazis je 5-a de decembro; partoprenis 20 membroj; Elektiĝis la jena nova estraro: Prez: S-ro Smeets; Vic-Prez: S-ro Z. Nicoletti; Sekretario: S-ro C. Dean; Vic-Sek: S-ro J. Hawks; Kasisto S-ro O. Loneragan; Informado: S-ro R. McGrath; Biblioteko: S-ro D. Dean.

Kiel rezulton de multe da klopodado fare de Owen Loneragan, du membroj (S-roj O. Loneragan, R. Smeets) ricevis ioman subvencion de la "Schools Commission", por partopreni la somerlernojn en Toowoomba.

La Zamenhofa Festo, en formo de vespera ĉefmanĝo, okazis ĉe Secondary Teachers College en Nedlands en bela kaj oportuna manĝejo. Ĉeestis 46 personoj. Post bona manĝo S-ro Ruth McGrath faris la festparoladon. Vera Payne prezentis 9 novajn membrojn (partoprenintojn de ŝiaj kursoj). Tri membroj estis prezentitaj per atestiloj pri Dumviva Membreco pro ties granda servo al la Ligo (D-ro Tim Einihovici, S-ro I. Einihovici kaj S-ro Edith Palmer). David Miller pianludis, S-ro Gobba akordionludis kaj oni iom dancis.

● **ADELAIDE:** Dek kvin personoj (esperantistoj kaj parencoj) festis la Zamenhof-Tagon en "Motelo Scotty" en Medindie, la 14-an de decembro. Ni vespermanĝis kaj trinkis kaj S-ro Onn prezentis multajn artikifaĵojn per kartoj. Ĉiuj tre amuziĝis kaj ridis; entute bona vespero. — R. Felby.

● **MELBOURNE:** Tridek ses membroj de la kvar grupoj partoprenis, je 9/12, la Zamenhof Feston en la halo de la Skoltina Asocio. Ĉi-jare respondecis pri la organizo la Esperanto-Federacio de Viktorio.

S-ro kaj F-ino M. Sanders malfermis la programon per bekfluta dueto. Sekvis salutoj de la grup-reprezentantoj kaj la nota sinsekvo de programeroj inkludis kcmunan kantadon, teatraĵeton de Mal-

vernanoj, filmon de la Oakleigh-Grupo, kaj skeĉojn de la anoj el Waverley, kiel ankaŭ pluan bekflutan dueton de la sinjorinoj Sanders. S-ro Don Pescod, anglalingve, resumis la agadon en Viktorio dum la jaro 1978 kaj S-ro Fay Koppel festparoladis laŭ la temo "Idealoj kaj Datrevenoj", emfazante, ke pli grava ol nura lingvo estas la homama idealo, kiu instigis ties kreadon. Samtempe ŝi atentigis pri diversaj datrevenoj krom tiu de la naskiĝo de D-ro Zamenhof: la centa de la festo pri "Lingve Universala" (Pra-Esperanto), la 24-a de triumfo de D-ro Lapenna ĉe Montevideo, kaj la 30-a de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Sekvis "La Espero" kaj la kutma regalo.

Du tagojn poste, en la Esperanto-Domo, okazis la Jar-Fina Festo de la Melburna E-Societo. John Munro muzikis per trombono, S-ro S. Kanaĉki re-aŭdigis parton de la Zamenhof-festa programo per magnetofono; S-ro E. Čnick montris diazotivojn pri la "Re" a Juvlaro" (ĉeestantoj ankaŭ partoprenis en du konkursoj antaŭ ol plej lukse regali sin.

● **CANBERRA:** Dudek personoj ĉeestis je 16-a de decembro en la salono de CCAE okaze de la Zamenhof-Festo. Ĉefparolanto estis S-ro Ralph Harry, kiu parolis pri "Lingva Egaleco". Ĉeestantoj aŭskultis Esperanto-diskojn kaj ĝuis filmon pri la Univ. Kongreso en Reykjavik. Klaso por 1979 estos instruata fare de S-ro M. Ellyard.

● **SYDNEY:** La Zamenhof Festo, organizita de la Esperanto-Federacio de N.S.K., okazis je 16-a de decembro en la Esperanto-Domo en Redfern. La Prezidanto de la Federacio, S-ro Betty Cleminson bonvenigis la ĉeestantaron (ĉ. 45). La Fest-Parolado de Prof. R. Robertson taŝge temis pri la "Rajto de Kcmunikado". Sekvis lerta deklamado fare de Tom Elliott. Ann Gash ludis la fluton. Peg. Ford-Lewis akompanis la diversajn muzikajn erojn. Reprezentantoj de tri "Schools for Seniors" prezentis skeĉojn kaj kanton. Tre amuzis nin ventroparolisto George Hicks, kiu kvankam nur komencanto en Manly Esperanto-kurso, tamen profesie rolis kaj igis nin rideti je komikaj situacioj. "Robbie" kaj Eunice Graham prezentis teatraĵeton originale verkitan de "nia" profesoro. Neniam antaŭe ni tiel elkore ridis. Elsa Brandman gaje muzikis per ŝia akordiono. Betty Cleminson dankis ĉiujn parto-

prenantojn kaj bondeziris okaze de la Kristnaska Festo. Sekvis bongusta manĝo.

(Laŭ raportoj de S-inoj M. Chaldecott kaj M. Duncan).

● **ST. LUCIA:** La fina kunveno de la jaro okazis je 22-a de novembro, 1978, en la domo de S-ino W. Greenhalgh. La Prezidanto, S-ino Dawn Degn, prezentis interesan raporton pri la agado en 1978. La membroj elektis la jenan estraron por 1979: Prez: Joycelyn Munro; Vic-Prez: Dawn Degn; Sekretario: Decia Shenhan; Kasisto: Joy Coulter; Bibliotekistoj: Annie Spencer kaj Ruth Morrison; Libroperanto: W. Greenhalgh; Komitatanoj: Margaret Jones, Edna Julie, Sybil Martin. — D.S.

● **ROCKHAMPTON:** Du grupoj aktivis en praktikado de la lingvo; ĝis ses ĉiujarĝe matene ĉe la domo de Mollie Green ("Manjo Verda"), kaj ĉiusabate alia grupo (kiuj devas labori ĵaŭde) kunvenas en ĉies domo laŭvice, por paroli dum almenaŭ unu horo nur en Esperanto, kaj poste krakodili super tetasoj.

En Oktobro nia klubo partoprenis en "Internacia Ekspozicio" en la kadro de granda eklezia foiro. Nia stando kun cento da libroj ktp allogis kelkajn scivolemulojn dum la tago, (la tuta tago ĉis 9ptm). Krome, ni pruntedonis Esperantajn infanlibretojn de multaj landoj, al la koncernaj etnaj grupoj por propraj standoj. — Joyce Turner.

● **KAPRIKORNA MARBORDO:** Sep membroj kunvenadas ĉiumarde ĉe La Nesto, Emu Park, por lecionoj. Ni nun studas la libron JUNULKURSO, kun kelkaj kromlegaĵoj, kaj foje kantas kun Ramona van Dalsem aŭ Alberta Casey. Ni finas la lecionon en vintro per kafo, somere per malvarma trinkaĵo. Mi ne scias, ĉu tio estas la kialo — sed ĉiuj preskaŭ ĉiam ĉeestas, (unu, kelkfoje, per 80-km rondvojaĝo!) En 1978 ni ne sukcesis allogi novulojn al la klaso, sed ankoraŭ penas. — John Moore.

ESPERANTO IN GLADSTONE SCHOOL

Gladstone Catholic High School, which has been running an introductory course in Esperanto for some years, has now decided to make Esperanto available as an option in the "Special Activities" course of one hour per week.

Anyone knowing young people overseas currently available as correspondents (no out-of-date addresses, please!) kindly contact direct: Brother Joachim Fabbro, Catholic High School, Gladstone, Qld. 4680.

This makes 3 schools in Australia that I know of, currently teaching Esperanto (Stawell High in Vic. and Dorrigo High in NSW). Anyone know of any more? — John Moore, Pelican Street, Emu Park Qld. 4703.

Post-Kongreso en Manly

Estas firme decidite okazigi Post-Kongreson en la "Hotel Manly" de ĵaŭdo, la 10-a de januaro, 1980, matene, ĝis lundo la 14-a matene.

Provizora programo inkluzivas ekskursojn, piknikojn, naĝadon, distrajn vesperojn kaj civitan akcepton. Ni baldaŭ anoncos pluajn detalojn kaj stabilajn kostojn por ebligi fruan mendon de ĉambroj. — Marjorie Duncan.

MALAVARA DONACO DE S-RO P. SCHWERIN

Ĉe la Esperanto-Domo en Sidnejo, la 16-an de decembro, 1978, Prof. R. G. Robertson, prezidanto de A.E.A. ricevis ĉekon por \$1000, testamentajon de nia forpasinta samideano, S-ro P. Schwerin. Por transdoni la ĉekon, D-ro K. Smith anstataŭis S-inon Schwerin, kiu bedaŭrinde ne povis ĉeesti la Zamenhof-vesperon.

Prof. Robertson esprimis la dankon de la Asocio kaj poste sendis dankleteron:

Al S-ino K. Schwerin,
Kara samideanino kaj plej kara amikino,

Kiel prezidanto de A.E.A. mi entreprenas bonvenan devon esprimi la koran dankon de la Asocio pro la ege malavara donaco testamentita de via kara edzo. Mi antaŭe skribis al vi pri la granda kaj sindonema laboro, daŭre plenumita dum lia tuta Esperanta vivo. Kiel instruisto, verkisto kaj partoprenanto en ĉiu Esperanta laboro, li ĉiam vivos en nia memoro, kaj mi mem estas ĉiam dankema pro la privilegio viziti lin kaj paroli kun li en la kara lingvo, tuj antaŭ lia forpaso.

Ni kortuŝite komprenas, ke nia sam-

ideano ĝismorte pripensis nian aferon, la lingvon de Zamenhof.

Dankon, denove dankon! Sincere via,

Prof. R. G. Robertson, Prezidanto de A.E.A.

RECENZOJ

MARVIRINA LUNO: Romano, 143-paĝa, bone bindita; verkis Joan Pomfret; elangligis kaj desegnis membroj de la "Morecambe Bay" Esperanto-Societo por memorfesti la dekan datrevenon de ties fondiĝo en 1968, kiel ankaŭ la okazon de la brita Esperanto-Kongreso en "Morecambe" en 1978; eldonis "Morecambe Bay" Esperanto-Societo, 9 Twemlow Parade, Morecombe, Lancashire, Britujo; presis Brita Esperanto-Asocio, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF.

Ĉi tiu estas la unua romano de la aŭtoro, kiu verkas ankaŭ poemojn en la dialekto de la provinco Lancashire, kie ŝi loĝas kaj kie lokiĝas la agado de la rakonto. "Sunderland Point" (La Lango) estis kaj estas vera loko, duoninsulo, apud la nuna urbo, Morecambe, sur la okcidenta marbordo de Lancashire, kaj tie, laŭ la vortoj de heroino, Joanna, "tiom da vivo estis premigita en tian etan spacon, ke mi sentis min esti en pli granda kumunumo". Same aŭtentika laŭ historiaj detaloj pri la tempo (1763) kiel laŭ geografiaj, la kreiva fantazio de la romano rilatas nur al individuoj, sed el la kombino rezultis vere leginda rakonto, plaĉe informa kaj bildoplana.

Laŭdindaj estas kaj la celo kaj la atingo de la tradukintoj; sed bedaŭrinde, ke ili — memkonfese nespertaj — ŝajne ne zorgis pri kontrolo de kompententulo kaj la grandparte bonstilan lingvaĵon aspergis per tiom da eraroj, ne ĉiuj kiuj estas atribuendaj al la preskoboldo. Tiu sendube respondecas pri, i.a., la manko de supersigno ĉe multaj "ŭ"oj kaj pri la fuŝoj sur paĝoj 48 kien enŝteliĝis superflua, neĝusta linio) kaj 49 (el kiu forfalas almenaŭ unu). Tamen evidentigis, ke la tradukintoj ne tute regas aŭ la refleksivon (pĝ. 62, 64, 66, 72), aŭ la logikan verbtempon, aŭ la kunmetitajn verbformojn. Plurloke troviĝas pasiva par-

ticipo, kie la senco postulas aktivan. Kurioza, sed ne rekomendinda hibrido sin prezentas sur paĝo 68 — el "ĉizi" kaj "cizeli" iel naskiĝis "ĉiselitan". Oni zorge konsultu "Plena Vortaro".

Kompleta listo okupas tro da spaco kaj cetero konsistigus tedan legajon. Kompetentaj studentoj facile perceptos; aliajn ne maltrafos la ĝusta senco, kaj tiuj egale malatente ne alproprigos al si nebonajn stilajojn. Fakte jen bonega materialo por ronda studado kaj diskuto, certe leginda. — Fay Koppel.

EL POPOLA ĈINIO

Abono por unu jaro \$3.00
por du jaroj \$4.50
por tri jaroj \$6.00

Interesaj artikoloj kun belegaj koloraj bildoj sur eleganta papero

Petu senpagan specimenon ĉe
K. G. LINTON
11 Poplar St., South Caulfield 3162

Korektendaĵo por "Studlibro por la Supera"

Sur paĝo 22 en la sekcio "La Prepozicio 'Je'" en la kvina linio "prepozicio" devus esti "prepozicio".
(3) "kiam temas" devus esti "kiam ne temas".

Nekrologo

Mortis en Toowoomba, la 12-an de novembro, 1978, S-ino Effie Petley, kiu fidele subtenis la konstantan penadon por Esperanto de la edzo. Al s-ro H. V. Petley A.E.A. kore kondolencas.

"Ekzistas momentoj en la vivo, kiam vorto eĉ de malsaĝulo povas utili".
"Jes, vere! Do parolu; mi aŭskultas!"

LASTMOMENTE,

sed tro malfrue por ĉi tiu eldono, ni ricevis raporton de Prof. R. G. Robertson pri sukcesa Somer-Lernejo en Toowoomba. Ĝi sekvos venontnumere.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$12.
(Individual, family, club, federation and
pensioner)
Full-time Students \$8



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063

Sekretario/Kasisto: S-ro L. V. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W. 2095

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 169 (249)

MELBOURNE

Marto, 1979

SOMERLERNEJO EN TOOWOOMBA

Denove nia agema samideanino, S-ino Jean Lehane, inciatas kurson pri Esperanto en la kadro de la "Darling Downs Institute of Advanced Education" ĉe la bela ĝardenurbo Toowoomba. Tiu 10-a Somera Alternejo prezentis ankaŭ, kiel kutime, kursojn pri belarto, muziko, skulptarto, pentrarto, teksado kaj aliaj temoj.

La Esperanto-kurso por komencantoj instruis S-ino Childs-Mee, per rekta metodo evoluita el la konata Cseh-metodo. Ok komencantoj ĉeestis la klason, kaj kelkaj instruistoj observis la metodon por studi ĝin. Aliaj kursanoj vizitis la komencantan klason kelkfoje. S-ino Mee uzis nenian lernolibron krom aron da skizoj kaj la vortaron "Opportuna Vortaro de Ordinara Esperanto" de Vilho Setala, kaj neniu nacia lingvo estis permesita en la klasĉambro.

Prof. R. G. Robertson, AEA-Prezidanto, instruis post-komencantan kurson, unue per "Privilegia Vojo" de Vilho Setala, sed iom post iom igis la partoprenantojn paroli pri hobiaĵoj, antaŭaj spertoj, kaj mallongaj fabelrakontoj laŭ ĉarmaj bildoj desegnitaj sur la granda verda tabulo. La nombro de partoprenantoj variis ĉiutage, kiel en la aliaj klasoj, pli-malpli ses.

S-ro Ray Ross, vicprezidanto de Brizbana E-Societo, instruis mezgradan klason laŭ "Paĉoj al Plena Posedo" de W. Auld, kaj starigis konversaciajn grupojn por pridiskuti diversajn temojn. La mezgraduloj tralegis la verkon "Abismoj" de J. Forge.

S-ro Trevor Steele, Prezidanto de la Pacifika Asocio por Instruado de Esperanto kaj de la Brizbana E-Societo, gvidis la altgradulojn, kiuj studis Esperantan poezion de Zamenhof ĝis De Kock kaj Ragnarsson, kaj strebis traduki iom malfacilan anglan verkon "More lives than one" de J. Iverson; ĝi temas pri meteemp-sikozo kaj entenas diversajn stilojn kaj fufice da nekutimaĵoj. Klasanoj ankaŭ tralegis la romanon "La Sentaŭgulo" de V. Korolenko.

Kelkfoje la kursanoj el ĉiuj grupoj veturis per privata aŭtobuso ĝis McGregor Kolegio por viziti la artekspozicion kaj ĝui vinon kaj fromaĝon promenante inter la artverkoj de studentoj el pentrartaj kursoj kaj por ĉeesti koncertojn prezentitajn de studentoj kaj instruistoj el muzikistaj kursoj.

Dimanĉe ili ĉirkaŭveturis lokajn vidindaĵojn gvidate de Toowoombano. La nomo Toowoomba signifas en indiĝena lingvo "Malseka situo sur monto", kaj pro la malsekeco ĉiuj ĝardenoj kaj parkoj estas elstare belaspektaj; la klimato estas plaĉa, kaj la kursanoj ĝuis bonan veteron ĝis la fina tago. Lokaj gesamideanoj Bob kaj Jean Weis gastigis ilin ĉe sia luksa hejmo en la najbara kamparo, kaj regaligis ĉiujn per bongusta subĉiela rostajo. Estis granda plezuro renkonti denove inter la gastoj S-ron H. V. Petley, konantan veteranon de la movado. Multaj fotografaĵoj estis faritaj, recipe de S-ino Childs-Mee apud la "bilabong", portanta vakeran ĉapelon kaj rajdanta sur ĉevalo.

La esperantistoj loĝis kune en "Fairholme" altlernejo situanta ĉe la rando de altebenaĵo. Ĉiu instruisto kaj geedza paro loĝis en aparta ĉambro, aliaj en kvarlitaj dormĉambroj. El la lerneja kuirejo oni provizis trifojn ĉiutage bongustajn manĝojn, kaj sandviĉojn aŭ biskvitojn dum tepaŭzoj inter la lecionoj. Sufiĉe da modernaj klasĉambroj situis apud la manĝejo kaj dormĉambroj, por studi 4½ horojn ĉiutage, krom la semajnfino. Eĉ semajnfine, S-ino Childs-Mee prezentis interesegegan seminarion pri sia rekta metodo, kaj demonstris sian teknikon kun granda vervo kaj konvinko, kaj instrue kaj muze.

Ĉiun vesperon, krom merkrede, kiam okazis koncertoj ĉe la kolegio, komitatato aranĝis Esperanto-distraĵojn, gvidatajn de S-ino S. Fanos kun la helpo de S-ino D. Sinclair, S-ino M. Ellyard kaj S-ro J. Moore. Oni ne rajtas mencii la nomojn de la partoprenantoj en multaj ludoj, teatraĵoj, kantoj,

k.t.p., ĉar preskaŭ ĉiuj gekursanoj partoprenis, distris kaj samtempe plialtigis la propran lingvan nivelon.

La finan vesperon de la kurso, okazis bankedo kaj danco, dank' al S-ino B. Hart, S-ro T. Steele kaj aliaj. La kursanoj esprimis dankon kaj faris dcnacojn al S-ino Childs-Mee, S-ino J. Lehane kaj S-ro W. Chandler, kiel agemuloj respondecaj pri la sukceso de la kurso, eĉ pli granda sukceso ol antaŭ du jaroj, kiam la 1-a somerlernejo okazis en Toowoomba. Per la iom funebra sono de "Didgeridu", indiĝena muzikilo, Steve Weis taŭge celebris la finon.

—Robby Robertson.

(La Somerlernejo okazis inter la 8-a kaj 18-a de januaro, 1979. Partoprenis entute 42 studentoj kaj 4 instruistoj. 25 studentoj venis el Kvinlando, 13 el Nova Sudkimrujo, kaj po 2 el Canberra kaj Perto)

VESPERMANĜO KUN TEODORO SCHWARZ

Bernard Golden

La vesperon de la 11-a de marto, antaŭ precize 12 jaroj, mi elvagoniĝis ĉe la metrostacio de la 116-a strato en la okcidenta parto de la urbo Nov-Jorko. Rapide suprengriminte la ŝtuparon al la strato, mi piediris en la direkto al Riverside Drive. Mi haltis nur momente por jeti nostalgian rigardon al la Universitato Columbia, kie mi pasigis plurajn jarojn kiel studento. Poste, daŭrigante mian vojon norden, mi serĉis adreson skribitan sur paperslipo en mia mano. La anticipo de la vespermanĝo, kiu atendas min, venigis akvon en la buŝon. Ne temis pri ordinara usona manĝo, sed pri hungara.

Post kelkaj minutoj, mi atingis la serĉatan loĝdomon kaj facile trovis la apartmenton de miaj gastigontoj. Premante la puŝbutonon de la sonorilo, mi legis la apudan nomplaton: Teodoro Schwarz/Tivadar Soros. Jes, mia unua sperto kun la hungara kuirarto estis en la hejmo de unu el la plej eminentaj hungaraj esperantistoj, kiu tiam loĝis en Nov-Jorko. Mi konatiĝis kun li en la jaro 1967 en la kunveno de la novjorka Esperanto-grupo. Tiutempe mi jam ne estis daŭra loĝanto en tiu urbo, sed troviĝis en la metropolo nur provizore, post kvarjara restado en Eŭropo kaj antaŭ nova vojaĝo al Afriko. Unufoje ĉeemajne malgranda aro da fervoraj verd-stelanoj kunvenis en la inform-centrode ELNA/Esperanto-Ligo por Norda Ameriko/por konversacii en Esperanto. Frek-

ventis tiujn kunvenojn konataj esperantistoj kiel Mark Starr, nuntempe honora membro de UEA, Ralph Bone-sper, mondfama membro de SAT, kaj ankaŭ Teodoro Schwarz.

Antaŭ ol daŭrigi mian rakonton, mi devus klarigi, ke en la historio de la Esperanto-movado rolis du ŝvarcoj: unu estis la franca humoristo, poeto kaj kabared-fondinto, Raymond Schwartz; la alia estis la hungaro Teodoro Schwarz. Notu, ke unu el la ŝvarcaj familiaj nomoj finiĝas per -tz dum la alia havas nur -z. Teodoro Schwarz estis konata en Esperantujo ankaŭ laŭ la esperantigita formo de sia nomo. Teodoro Svarc, kaj krome laŭ sia hungara nomo Tivadar Soros. Ne nur ilia esperantisteco kaj komuna familia nomo ligas tiujn ĉi du homojn; ambaŭ ankaŭ naskiĝis en la sama jaro: 1894.

La vivhistorio de Raymond Schwartz estas tre bone konata, do mi ne devas detale pritrakti ĝin tie ĉi. Kiu volas scii la ĉefajn detalojn legu la broŝuron **Raymond Schwartz, lia vivo kaj verkaro** de Roger Bernard. Male, estas tre malfacile trovi donitaĵojn pri la tuta viv-historio de Teodoro Schwarz. En konsultlibroj pri la historio de la Esperanto-movado, malabundas informoj pri li. Ekzemple, **Enciklopedio de Esperanto**, eldonita en la hejmurbo de Schwarz, dediĉas nur kvin liniojn al li. **Esperanto en Perspektivo** estas malpli avara kaj mencias lin per entute sep linioj. Li

esperantistiĝis antaŭ la unua mondmilito, soldatiĝis kaj fariĝis militkaptito en Rusio. Post sia reveno al Hungario, li laboris profesie kiel advokato en Budapeŝto.

Li komencis agadi en la hungara Esperanto-movado en la fruaj 1920-aj jaroj, kune kun tri aliaj tridekjaruloj, kiuj same kiel li lernis Esperanton antaŭ la milito: Julio Baghy, ankaŭ militkaptito en Siberio, Kolomano Kalocsay kaj Paŭlo Balkanyi. En 1922 Teodoro Schwarz, per sia financa subteno, iniciatis la eldonon de la plej altkvalita beletra revuo en Esperanto, **Literatura Mondo**. Li ne nur administris ĝin, sed ankaŭ kontribuis literaturajn sub la pseŭdonimo Teo Melas. Pro manko de sufiĉe da abonantoj la periodaĵo de Schwarz daŭris nur kvar jarojn. Du fojojn poste oni provis revivigi **Literatura Mondo**, sed pro malfavoraj mondaj eventoj, la publikigo denove ĉesis. La ĉefa libroforma verko de Teodoro Schwarz en tiu periodo estas **Modernaj Robinzonoj/1924/**, en kiu la aŭtoro rakontas siajn rememorojn pri la fugo de militkaptitoj en siberia praarbo fine de la unua mondmilito.

Nun ni reiru al la novjorka loĝejo de ges-roj Schwarz, kie mi staris atendante antaŭ la pordo. S-ro Schwarz enkondukis min en la loĝejojn kaj prezentis min al sia edzino. Mi rimarkis, ke la tablo en la manĝoĉambro jam estis primetita, kaj miaj gastigantoj ŝajnis iom ĝenataj. Mi pensis, ke mi eble eraris pri la horo kaj demandis, ĉu mi malfruis?

"Ne, tute ne. Tio ne estas la problemo," diris s-ro Schwarz.

Poste, lia edzino klarigis, ke ŝia forgesema edzo ne memoris, kiam li invitis

min vespermanĝi kun ili hodiaŭ, ke ili jam akiris biletojn por la ĉi-vespera opera prezentado.

"Sed ne gravas. La vespermanĝo estas preta. Ni manĝos, kaftrinkos kaj eĉ havos iom da tempo por babilo antaŭ ol ni devos foriri." Tiel Teodoro Schwarz bonhumore traktis la situacion. Post la bongusta vespermanĝo, li donacis al mi ekzempleron de sia plej lasta verko.

Ni kune malsupreniris al la strato, kaj ges-roj Schwarz adiaŭis min el takso, kiu veturigis ilin al la operejo. Mi iris hejmen per la subtera fervojo kaj jam en la vagono mi komencis trafoli mi la donacitan libron, **Maskerado ĉirkaŭ la morto/1965/**. Ĝia subtitolo, **Nazi-mondo en Hungarujo**, koncize karakterizas la enhavon; temas pri aŭtobiografia romano priskribanta travivaĵojn en Budapeŝto dum la dua mondmilito. Per inĝenia elturniĝemo Teodoro Schwarz kaj lia familio sukcesis transvivi nekredeblajn teruraĵojn.

Post tiu neforgesebla tago, mi renkontis Teodoron Schwarz de tempo al tempo okaze de Esperanto-kunvenoj en Nov-Jorko ĝis la fino de 1967, kiam mi forveturis. La sekvan jaron li mortis.

Mia skizo pri Teodoro Schwarz neniumaniere estas biografio pri li, ĉar mankas multaj gravaj faktoj. Kiel li esperantistiĝis? Kjon li faris en la hungara movado antaŭ la unua mondmilito kaj post la unua periodo de **Literatura Mondo** dum la 1930-aj jaroj? Kaj kio okazis al li post la dua mondmilito ĝis la tempo, kiam li aperis en Nov-Jorko? Ĉu jam estas tro malfrue ekscii tion, aŭ ĉu troviĝas konatoj, kiuj povas kontribui informojn por fari kompletan biografion?

STRUENSEE KAJ LA NOKTOGARDISTO

Jen rakonto vera historie kaj persone. Historie ĉar mi kontrolis la faktojn en "Encyclopaedia Britannica" kaj persone ĉar mi estis mem la noktogardisto, kiu kune kun la hundo Siang rolas en la rakonto.

Okazis la vesperon de la 28-a de aprilo 1972, ke li — li noktogardiston — deĵoris en la Gardeno de Frederiksberg. Nu, eble vi miras pri la situo de Frederiksberg. Multaj el vi certe kredas ke ĝi estas iu loko en Germanujo. Sed ne, ĝi estas loko en Danlando, ĝi estas najbara urbo de Kopenhago.

Tiu supre-menciita Gardeno estas tre granda parko — antaŭ multaj jaroj privata gardeno de la reĝo, kiu tiam regis en la lando. Pro tio estis alta ĉirkaŭbarilo ĉirkaŭ la tuta gardeno —

aŭ parko. Tiu barilo staras ankoraŭ hodiaŭ. Estis unu el la devoj de la noktogardisto iri ŝlosi la multajn pardegojn kiuj situas jen kaj tie ĉi en la barilo. Sed tiu parto de lia laboro estis jam finita. Li nun survojis al la granda, flava palaco, Palaco de Frederiksberg. Ĝi estis konstruita en 1699-1703; kelkaj aldonoj estis faritaj al la palaco en 1707-09 kaj 1734-38.

De la parko li devis eliri sur la vojon. Tial necesis ke li preterpasu la palacon por veni al la granda pardego, la ĉefa enirejo, kiu servas ankaŭ kiel elirejo. Li devis transiri la vojon por veni al la alia parko, kiu estas parto de lia deĵorejo. Ankaŭ tiu parko antaŭ longe estis reĝa parko, sed ne plu troviĝas tie bariloj ĉirkaŭ ĝi. Ĝi estas parko pli popu-

lara ol tiu de Frederiksberg, kaj tial multe pli necesas gardedejori tie. Li kaj lia granda germana ŝafhundo supreniris la sufiĉe krutan altaĵon, kiu kondukas al al la palaco. Ĉar la Ĝardeno de Frederiksberg estas ĉirkaŭita per bariloj, li lasis la hundon iri, kien ĝi volas, tute libere.

Presaŭ ĉe la supro de la altaĵo kaj tre proksime al la palaco ili — t.e. li kaj la hundo — aŭdis voĉojn. La hundo tuj alkuris kaj la noktogardisto ĝin silentigis. Grupeto da homoj staris tie, flustre kaj ekscite diskutante. Li alparolis ilin kaj demandis kion ili ci tie faras kaj ankaŭ kiel ili eniris. Unu el ili, laŭŝajne iom aŭtoritata virino prenis la parolon. Ŝi klarigis ke ili estas grupeto de la psika reserĉo de la urbego kaj ke ili envenis per suprengrimpado sur kestego, kiu staras ekster la barilo kaj de tie ili saltis trans la barilon. Tre bone farite de iom maljunaj homoj, el kiuj la plej multaj estas virinoj. La kestego cetere, servas kiel gruzujo, oni jetas gruzon sur la vojon, kiam tiu estas glata pro la glacio. Kiam li proponis ke pli bone estas por ili tuj foriri, car estas kontraŭleĝe resti en la ĝardeno post kiam la pordegoj estas ŝlositaj, ili petis ke li lasu ilin tie ankoraŭ iom da tempo, car hodiaŭ estas la nokto, kiam la fama, germana kuracisto kaj ŝtatiso, Johano Frederiko Struensee hantas la Ĝardenon de Frederiksberg.

Ŝi klarigis ke estas tre grave por la societo de psika reserĉo ke ili vidu la fantomon de Struensee. Ĉiujare la 28-an de aprilo je noktomezo li elvenas el fenestreto en la kelo de la flava palaco kaj kapon sub la brako rapidas mal-supren laŭ la altaĵo, transiras la kanalon, kiun li ne vidas, ĉar ĝi estis konstruita en 1797, do post la morto de Struensee, kaj suriras la "ĉinan" insulon. Tie li malaperas en la "ĉinan" dometon.

Dum ili atendis la aperon de Struensee la sinjorino, kiu ŝajnis esti la parolantino de la grupo, komencis refreŝigi al la aliaj la historion de la kompatinga Struensee:

Li naskiĝis la 5-an de aŭgusto 1737 en Halle, hodiaŭa Okcidenta Germanujo, kaj mortis la 28-an de aprilo 1772 en Kopenhago. Li estis kuracisto en Altona, urbo proksima al Hamburgo en Okcidenta Germanujo. Kiam la mensmalsana dana reĝo Christian la 7-a en 1768-69 faris Eŭropan vojaĝon, Struensee akompanis lin kaj la reĝo estis tiel kontenta ke li igis Struensee reĝa kuracisto en 1769.

Superregante la reĝon li en 1770 iĝis la amanto de la reĝino Caroline Matilde. Li ruze eluzis la mensmalsanon de la

reĝo kaj surprenis sur sin ĉiam pli kaj pli da aŭtoritateco. Baldaŭ li povis abolicii la registaran konsilion kiel ankaŭ la oficon de guberniestro de Norvegujo en 1770. En junio 1771 li igis la reĝon nomi lin privata kabineta ministro. En julio li fariĝis grafo. De marto 1771 ĝis januaro 1772 Struensee enkondukis nombron da reformoj; preslibereco, malpligo de la servuteco de la kamparanoj ktp. Li faris multajn bonajn reformojn, kiuj kostis al kelkaj funkciuloj la okupon. Ili tial konspiris kontraŭ li kaj en januaro 1772 li estis arestita pro siaj interrilatoj kun la juna reĝino kaj ankaŭ ĉar li tiom misuzis sian influon ĉe la malsana reĝo. Li estis ekzekutita per senkapigo la 28-an de aprilo 1772 en Kopenhago.

Nun sonoris la belsonaj sonoriloj de la proksima Preĝejo de Jesuo. Estis noktmezo. "Atendu nun", diris la sinjorino, kaj ili ĉiuj atendis. Sed ne longe. Baldaŭ ili sin sentis tute malvarmaj. "Ĉu vi sentas la malvarmon?" demandis la sinjorino. "Jes," ili ĉiuj respondis kun escepto de la hundo. Sed ĝi tremis. Tiam fariĝis tute mallume, ĉar la stratalampoj estingiĝis. "Jen li venas, jen li venas", ekscitis la sinjorino. Kaj la portebla radiosendilo-ricevilo de la noktogardisto komencis paroli: "La lumo estingiĝis ĉi tie en la norda parto de Kopenhago". "Ankaŭ ĉi tie en la Sudo" respondis alia noktogardisto. Tio daŭris iom da tempo ĝis estis la vico de la noktogardisto de Frederiksberg diri ke ankaŭ lumo mankas en lia dejorejo. Temis do pri nura rompiĝo de elektra kurento, kiu kovris preskaŭ tutan Kopenhagon. Ili atendis ankoraŭ iom da tempo, neniu vidis Struensee-on kaj la hundo endormiĝis. Sed la malvarmo kaj mallumo daŭris. La noktogardisto igis la psikajn reserĉintojn eliri, ĉi-foje el la pordego. Sed la tutan nokton li sentis tiun timon, ke ĵumomente li vidus fantomon kun la kapo sub la brako. Kaj li atendis ĝis la mateno, kiam komencis tagiĉi antaŭ ol li iris al la "ĉina" insulo kaj en la "ĉinan" domon. Sed ankaŭ tie li ne trovis fantomon. Baldaŭ la suno ellitiĝis kaj la noktogardisto iris hejmen en sian liton. Post iom da dormo li sentis sin multe pli bona, ĉar li sciis ke daŭras ankoraŭ unu jaron antaŭ ol li riskos vidi fantomon. Ŝajnis ke la travivaĵo ne ĝenis la hundon. —R. FELBY.

D'sciplino estas la rafinanta fajro, per kiu talento fariĝas kapableco.

Facila metodo por kalkuli la koston de la vivado — aldonu dek procentojn al via salajro.

22-a AŬSTRALIA ESPERANTO-KONGRESO

Jan 2-9, 1980 — Sydney

La kongreso okazos en la Kolegio de Sankta Paŭlo de la Universitato de Sidnejo. Ĉiuj kongresanoj loĝos en komfortaj, unulitaj ĉambroj. La oficiala malfermo de la kongreso okazos en la Granda Aŭlo de la Universitato.

Kongres-Kotizo antaŭ 1-7-1979: \$12.00
Post 1-7-1979: \$15.00.

Loĝado kaj ĉiuj manĝoj de lunĉo 2-1-1980 ĝis matenmanĝo 10-1-1980: \$200.00.

Sendu vian kongres-kotizon al "Australan Esperanto-Congress", Box 415, Manly, 2095. Aldonu almenaŭ \$10 kiel deponon por loĝejo kaj afrankian respond-koverton. Listo de kongresanoj aperos en nia gazeto tuj kiam ni ricevos ĝin de la Kongresa Sekretario.

POST-KONGRESO EN MANLY

La Esperanto-Klubo de Manly aranĝos Post-Kongreson de la 10-a ĝis la 14-a de januaro, 1980, tuj post la 22-a Aŭstralia Kongreso.

Partoprenantoj loĝos en "Hotel Manly". Loĝado (sen manĝo) en dulita ĉambro estas \$12.00, en unulita ĉambro (sen manĝo) \$19.

Aliĝu tuj al la Post-Kongreso per depono de \$10.00. Indiku kiom da tagoj vi deziras loĝi en "Hotel Manly". Sendu vian aliĝon al "Esperanto Post Congress", Box 415, Manly, 2095.

NOV-ZELANDA KONGRESO

La 44-a Kongreso de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio okazis de la 10-a ĝis la 14-a de januaro, 1979 en Masterton. La kongresejo estis la bela "St. Matthews Collegiate School" Aliĝis 59, el kiuj 53 fakte partoprenis.

Malfermis la kongreson S-ro Graeme Ayson, membro de la urba konsilantaro, antaŭe membro de la Wellingtona E-Klubo, kiu faris parton de sia parolado en flua Esperanto.

Okazis nenia ŝanĝo al la Estraro, do S-ro J. T. Allan restis Prezidanto, Ralph Dearnley, Vic-Prezidanto kaj S-ro G. D. Raynor, Ĝenerala Sekretario. S-ro Fred Wood (Auckland) elektitis Konstanta Kongresa Sekretario. Alvenis multaj salutoj al la kongreso, i.a. de U.E.A. kaj de Aŭstralia E-Asocio (Vic-Sekretario Herbert Koppel).

Prezentiĝis vasta preleg-programo, el kiu elstaris prelegoj de Jozefo Major (pri famaj esperantistoj, pri Homaranismo, pri la finaj tagoj de la Zamenhof-familio, pri gramatikoj. En la drama konkurso partoprenis du grupoj, nome Auckland kaj Masterton; gajnis Masterton por la unua fojo.

Ne estis firme decidite kie okazos la 45-a Kongreso, ĉar mankis definitiva invito. Tamen, povas esti ke ĝi denove okazos en Masterton, ĉar pro multaj faktoroj la loko plene taŭgas.

(Laŭ raporto de Majoro H. W. R. Peterson, Red. de "N.Z.-Esperantisto")

AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **BRISBANE:** Post la someraj kursoj en Toowoomba, S-ino Child-Mee vizitis nian urbon. La 22-an de januaro ŝi estis intervuita por televido (Kanalo 8). Samvespere, pli ol 50 esperantistoj bonvenigis la gaston ĉe la kunveno de la Brizbana E-Societo. Ges-roj Ross veturigis S-inon Childs-Mee al la Ora Marbordo, kie la "Gold Coast Bulletin" intervjuis la gaston; aperis duonpaĝa artikolo kun fotografajo.

Interesa artikolo, kun foto, aperis ankaŭ en "Courier-Mail" (Brisbane).

Nia societo partoprenis la "Orientigan Semajnon" de la Universitato "Griffiths". Pluraj membroj deĵoris ĉe la Esperanto-Infomstando kaj disdonis flugfoliojn.

● **ST. LUCIA:** Ĉiumerkrede okazas 3 klasoj en la hejmo de S-ino W. Greenhalgh. Kvar komencantoj, kvin mezgraduloj kaj 7 progresantoj partoprenas la klasojn.

● **PEACHESTER:** S-ino Childs-Mee pasigis tri tagojn en tiu kvinslanda urbeto, en la hejmo de S-ino Doris Sinclair. La loka Radio-Stacio 4 NA kaj la loka gazeto "Nambour Chronicle" intervjuis la vizitantinon. Sekve de tiu bona propagando nun okazas tri klasoj por infanoj. En Elimbah 15 infanoj studas la lingvon, en Peachester 11 kaj en Beerwah dek. Ili aperas antaŭ klasoj 6 kaj 7 kaj havas 11-13 jarojn.

● **IPSWICH:** La grupo kunvenas ĉiusemajne en la Vesperlerneja Centro kaj dek du membroj studas en 3 klasoj.

La jarkunveno elektis jenan estraron: Prez: Alec Morrison, Vic-Prez: Ruth

Morrison; Sekretario: Mary Neilson;
Kasisto: Cliff Nielson

● **SYDNEY:** Je 5-a de februaro, membroj kiuj ĉeestis la Somer-Lernejon en Toowoomba. raportis pri siaj spertoj. Inter la komencantoj estis du dekjaruloj. Ĉiuj partoprenintoj gajnis memfidon. La movado ricevis bonan propagandon per intervjuoj en la televido, radio kaj gazetoj.

La 12-an de februaro okazis la jar-kunveno. Laŭ la raportoj de la pasinta prezidanto kaj kasisto, la membreco ne estis granda, sed nia bankkonto estas sufiĉe plaĉa. Elektigis la jena nova estraro: Prez: Shirley Fanos; Vic-Prez: Tom Elliott kaj James Harwood; Sekretario kaj raportisto: Margaret Chaldecott; Kasisto kaj Libroperanto: Tom Elliott. Kaskontrolistoj: V. Guetling kaj W. Chandler. Bibliotekisto: Elsie Currie.

Je 19-a feb., Tom Elliott raportis ke nuntempe okazas kurso por anoj de CWA en Blacktown, kun 12 lernantinoj.

Tedusz Ilow montris pluajn lumbildojn pri Egiptujo. Ni vidis la maron kaj la popolon, krom la kutimaj turismaj vidaĵoj, kiaj la Piramidoj, Sfinkso ktp.

Bonvena gasto estis S-ro Hand el Usono. Parolinte kelkajn lingvojn, li instruis Esperanton al si mem. Spite de la fakto ke nur malofte li renkontas esperantiston en Usono, li havas belan parolmanieron.

Tom Elliott parolis pri "Mi estas homo". Ĉar homoj kapablas pensi antaŭen, ni superas la bestojn. Nia cerbo povas funkcii ambaŭflanke — bone kaj malbone. Tion bestoj ŝajne ne kapablas fari. Tamen, ni tute ne komprenas la bestojn. Ekzemple, balenoj kantas ek de printempo, sed ĉesas kanti en aŭtuno. Estis multaj por- kaj kontraŭparolantoj, sed Tom certe prezentis bonajn argumentojn. —M. Chaldecott.

● **MANLY:** Dum la 18-a ĝenerala jar-kunveno de la Manly Esperanto-Klub (21-1-79) estis elektita la jena estraro: Patrono: D-ro K. Smith; Prez: S-ro A. Cocking; Vic-Prez: Ald. F. Preacher kaj Prof. R. G. Robertson; Sek: S-ino B. Cleminson; Kas. S-ro. M. Ross; Libro-Aganto: S-ino K. Morrison; Informado: S-ino T. Thomas; Specialaj deĵoroj: S-ro L. Scott, S-ino E. Graham, S-ino E. Giles kaj S-ino M. Duncan.

Je 6-a feb. kaj ĉiumarde je la 7-a p.t.m. okazas 3 kursoj en la Vesper-Lernejo de Manly. S-ro A. Cocking instruas komencantojn; S-ino M. Duncan gvidas paroligan rondon, kaj Prof. R. G. Robertson pritraktas Esperanto-literaturon (prozon kaj poezion) kun la alt-

graduloj. Sekvas mallonga klubkunveno ĝis la 9-a vespere.

Je 8-a feb. kaj ĉiujauĉe je 7-a p.t.m. S-ro A. Cocking instruas komencantojn en French's Forest Vespera Lernejo. Niaj membroj, R. G. Robertson, G. Thatcher, A. Cocking, M. Ross, B. Cleminson, K. Morrison, M. Duncan, instruas diversajn gradojn en kvar dumtagaj "Lernejoj por Pliaĵuloj" en Sidnejo, Chatswood, Dee Why kaj Manly.

Oni varme bonvenigos lernantojn kaj vizitantojn al ĉiuj kursoj.

—Marjorie Duncan (Tel. 977 5163)

● **MELBOURNE:** Bonvena gasto ĉe nia kunveno de la 15-a de januaro estis S-ro Domenico Spinazze, ĉef-stevardo de ALITALIA-aerkompanio. Li lernis Esperanton antaŭ 20 jaroj en Milano kaj nuntempe deĵoras ĉiusemajne inter Singapuro kaj Melburno. Li promesis ĉiam viziti nian societon kiam li estos en Melburno. Alia vizitanto estis Don Rogers, kiu komencis lerni Esperanton en Nov-Zelando kaj nun daŭrigas la studadon kun la Waverley-grupo.

Dum januaro okazis du Esperanto-ekspozicioj en la bibliotekoj de Orienta Melburno kaj de Richmond, ambaŭ bibliotekoj nur proks. 10 minutojn for de la Esperanto-Domo. Multaj vizitantoj al la biblioteko rigardis kun intereso la ekspoziciaĵojn kaj ĉiuj ricevis flugfoliojn. Tamen, neniu el ili venis al la kurso, kiu komenciĝis la 5-an de februaro, kun nur unu lernantino varbita de reklamkampanjo en la gazetaro, kiu kostis \$100. Ne tre kuraĝiga rezulto!

Ce la kunveno de 5/2, S-ro S. Kanaĉki daŭrigis sian rakonton pri "Jugoslavio dum la germana okupado" kaj li rakontis pri la gvidado de la partizanoj fare de Tito.

● **ADELAIDE:** Nia malgranda grupo kunvenas ĉiun lastan mardon de la monato en la Universitato. Sep anoj kunvenis je 27/2 kaj diskutis pri gramatikaj problemoj. Tre interese S-ro G. Clarke kritikis la uzon de la vortoj "dumastulo" kaj "trimastulo" por ŝipoj, ĉar "ulo" faras el adjektivo homon, kaj neniu ŝipo estas homo. S-ro Clarke ankaŭ lerte klarigis la estiĝon de vivo ekde la maro, tra diversaj reptilioj, ovoj, birdoj ĝis fine la homoj.

Ce la kunveno je 20/3 ni diskutis la eblecon aranĝi aŭstralian Esperanto-kongreson en Adelaide en 1982. Sajnas ke ĉiu el nia malgranda grupo estus preta por helpi. —R. Felby.

● **PERTH:** Ek de la 10-a de marto, S-ino Vera Payne gvidos Radio-Kurson ĉe Stacio 6 NR. La nomo de la kurso estos "Esperanto por Infanoj" kaj ĝi estos prezentata dum 12 sabat-matenoj, ĉefe por infanoj. La kosto por la disaĝigoj estos pagata de la Esperantoligo.

Je 6/2 ĉeestis 14 membroj. D-ro Einihovici raportis pri la Esperanto-movado en Bulgario, Italio kaj Sovetio. S-ro Jack Hawks parolis pri vizito al Nanga Brook, urbeto en arbaro. Sekvis diskuto pri serpentoj kaj aventuroj kun ili.

EL LA FEDERACIOJ

● **NOVA SUDKIMRUJO:** La unua kampa semajnfina kunveno okazos ĉe Katombamba je aprilo 6-8. Tiu estas taŭga loko, ĉar estas multaj vidindaĵoj en la ĉirkaŭaĵo. —M. Chaldecott.

● **KVINSLANDO:** La venonta konferenco okazos ĉe St. Alban's Hall en Wilston de la 5-a ĝis 6-a Majo. Membroj el kamaraj lokoj estos gastoj de Brizbananoj. Sendu vian kotizon (\$1.00) al Sybil Martin, 48 Launceston St., Salisbury, 4107.

GRAVA ANONCO

Nia ĉefdelegito, Ken Linton, deziras atentigi membrojn, ke li estos for el Aŭstralio de la 7-a de majo ĝis la 7-a de junio. Ĉiuj kotizoj, abonoi, aŭ aliaj petoj senditaj dum tiu periodo estos prizorgataj post lia reveno. Estus iom riske sendi post la 1-a de majo.

Gajnis la Aŭstralian Norman Superan Diplomon kun honoro, S-ino Ivy Maud Fallu de la Oakleigh E-Grupo (Viktorio).

Gajnis la Aŭstralian Norman Elementan Diplomon kun honoro, S-ro Donald Evan Rogers de la Waverley E-Grupo (Viktorio).

Ekster la teatro. Si: "Mi timas, ke vi devis longe atendi min. Kiam vi efektive alvenis?"

Li: "Mi forgesis la precizan daton".

Li: "Ĉu vi memoras tiun nokton, kiam mi konfesis al vi mian amon?"

Si: "Jes, karulo. Ni sidis kune tutan horon, kaj mi nenion diris".

Li: "Ho ve! Tiu estis la plej feliĉa horo en mia vivo".

RECENZOJ

MARFILO KARLO: Dek-du-paĝa fabelo; verkis Jean Bomford 1978; eldonis KARDO, 16 Woodlands Drive, Coatbridge, ML5 1LE, Skotlando; kostas 60 anglaj pencoj. Mendu ĉe A.E.A. Libro-Servo.

Jean Bomford indikas, ke ĉi tiu libro por komencantoj estas nur la unua de serio. Bone! Originala verko en Esperanto, la legendo el Kornvalo temas pri terura monstro . . . kaj la potenco de la amo. Kelkaj simplaj sed tre agrablaj desegnaĵoj faritaj de Irena Campbell ornamas la rakonton.

Oni bezonas nur duonhoron por ĝui ĉi tiun ĉarman fabelon, kiu certe korvarmigis la leganton. Feliĉe, ĝi aperis ĝustatempe por la Internacia Jaro de la Infano. Ĉiu infano, de sesjara ĝis almenaŭ sesdek jara, nepre devus meti MARFILO KARLO sur sian librobretton — post du aŭ tri legadoj. Jen bonega legaĵo por komencantoj.

—Vera Payne.

NUN HAVEBLAJ

ĉe A.E.A.-Libroservo

8 Lone Pine Pde., Matraville, 2036

Plastikaj Portsaketoj kun fortigitaj teniloj kaj Esperanto-reklamo . . . 10c

Unu saketo senkoste por tiuj kiuj aĉetas librojn por pli ol \$20.00.

Poŝtkosto 80c por 35 saketoj.

Skota Antologio, W. Auld, 260 p \$6.65

Dudek Kvin Jaroj, W. Auld \$6.20

Kain kaj Abel, S. Szathmari, 288p \$6.00

Esperantologia Kajero 2, 273 p \$6.00

El la Verda Biblio, Satiro \$4.20

Knaboj de Paŭlo Strato, F. Molnar \$6.20

Lumo de Orienta Eŭropo,

V. Beekman \$1.25

Sciencaj Komunikaĵoj 1978 \$5.40

Estona Soveta Poezio, 195p. \$3.95

Esperanto Lingvo, Movado,

D. Blanke \$3.60

De Animo al Animo, religia, 200p \$5.95

Bhavadgad Gita — Sublima kanto

pri senmorteco, trad.

Prof. F. Lorenz \$2.50

Si: "En mia recepta libro troviĝas multaj eraroj".

Li: "Jes, mi ofte gustumis ilin".

NEWS-DIGEST

OBITUARY FOR NEWS DIGEST

For some years we receive regularly from Nuernberg the "PILO PRESS", an excellent news sheet, giving snippets of information about current happenings in the Esperanto world. These sheets digested, translated and supplemented, formed the basis of our "News Digest".

Unfortunately, the zealous editor of "PILO PRESS", Mr. Ludwig Pickel, died suddenly on the 7th of May, 1978, only 56 years old, and the publication died with him. There being no other readily available source of world news (although the British Esperantists do have a most interesting news coverage), we have decided with regret, to let "News Digest" die a natural death.

Hereunder is our "swansong", sung, we would hope, to a not too sombre tune. EAST AND WEST DO MEET: In "It's moments like these" we wrote of a Japanese lady married to a Viennese Esperantist. Another Japanese lady is married to a Yugoslav.

For many years it has been quite common to meet Yugoslav men married to Polish or German women, Germans wed to Dutch ladies, Swiss and Swedes in holy wedlock etc., etc, but recent World Esperanto Congresses have highlighted the frequency with which Occidentals meet Orientals at such functions. They fraternise, fall in love, marry and presumably live happily ever after.

After all, an avowed aim of Esperanto is to facilitate international intercourse!

THE BIRTH OF A NEW BACK PAGE:

Beginners especially — and this page has always been for beginners especially — may see a lot of the "Estraro" from time to time. At Australian Congresses they see the President, The Vice Presidents, the Secretary, the Treasurer etc. gracing the podium. They hear with what (apparently) effortless ease and frightening fluency the "top men" handle our language. I often wonder do they wonder what Professor R., Mr. L., Mr. K., Mr. S., Mr. M. etc are like as people. We know them — a little — as Esperantists. What are they like — as men — in the ordinary walk of life? Are they ordinary mortals like us? Can we become like them?

Yes, they are ordinary mortals, but in many cases with extraordinarily interesting backgrounds. The aim of this page will be to give some insight into these backgrounds.

It is hoped that the 'tall poppies' of the movement (to whom I'll write personally in due course) will be happy to co-operate, but many of our so called "ordinary" members have had most extraordinary experiences (e.g. two shipwrecks in one lifetime). We hope to let you know about these for we are convinced that "the meanest flower that blows" can give thoughts that do often lie too deep for tears". Yes, perhaps even you may some day figure in "Who is Who in Esperanto" — our new feature.

You will all be delighted that "Robby" Robertson, our genial president, scholar, wit, officer and gentleman, has offered himself — a living sacrifice — as the first "biographee" of our new series. Look for a thrilling episode in our next month's issue.

DON'T BURY YOUR TALENT:

From time to time we come across extraordinary and unexpected talents kept hidden by our members. Other latent talents are probably and most regrettably never uncovered.

The next Australian Congress may well give you an opportunity to reveal and develop your talent. Do you sing, play (individually or as an ensemble), recite, do magic, paint quick pictures, dance, etc.? We are anxious to reach and maintain a high standard of excellence. Perhaps yours is a high-grade performance but you are seldom asked.

I shall be most grateful if you would let me know (a) what item you feel capable of contributing and how long it would take, (b) the names and addresses of other Esperantists you feel could and probably would contribute.

Leaders of drama groups especially are enjoined to step up practice and to let us know what you wish to present and how long it takes. We really do want high-grade competition for the "Herbert Koppel Drama Shield". No Thespian likes to feel his group has won by default.

Will you, please, deluge me with volunteering and "dobbing letters" You do understand, of course, that there will have to be a process of selection.

Arthur Cocking, 53 Monash Pde.,
Dee Why, 2099.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$12.
(Individual, family, club, federation and pensioner)
Full-time Students \$8



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063

Sekretario/Kasisto: S-ro L. V. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W. 2095

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 170 (250)

MELBOURNE

Aprilo-Majo, 1979

MAORIA HUMURO (De Johano Hamvai, Auckland)

Kiam mia amiko, S-ro H. Koppel, redaktoro de "Aŭstralia Esperantisto", petis min sendi artikolon pri nov-zelanda temo, mi volonte promesis tion fari. Sed mi opiniis: Oni jam sufiĉe multe konigis Nov-Zelandon, ĝian popolon, ĝian tre valoran kaj interesan praologantaron, la maoriojn, iliajn karakteron, vivon, kutimojn, ktp. Kia temo ankoraŭ interesus la internacian legantaron de la gazeto?

Mi konfesas sincere: Mi devis multe cerbumi. Oni jam multon skribis pri la "antaŭeŭropana" maorio, kiu havis eksterordinarajn spiritajn kapablojn: nekredoblan, profundan pensmanieron, mirindan kapablon je meditado, abstrakta pensado kaj ankaŭ en sia sovaĝa stato tre evoluintan, intelektan kapablon. Krome li posedis altgradan naturan saĝon kaj idealismon kaj mirindege konceptitajn religiozajn imagojn (en sia izoliteco de ĉiuj partoj de la mondo). Kaj inter ĉiuj ĉi, ne laste: akran logikon kaj poezian spiriton. Sed: La enhavoj de iliaj kantoj estas pleje mizeraj, **neniam gajhumoraj**.

Ni konas kanton, kiu priploras la morton de porko. Ĉi tiu estis tre grava objekto, ĉar ĝi estis la unua, kiun la tribo povis akiri por si. Alia kanto sonis pri poto, kiu rompiĝis. Sed tiu ne estis ordinara poto: ĝi estis kuirilo por serpentoj. En alia kanto la poeto malgaje prikantas sian haŭtmalsanon. Entute: La

enhavo de la maoriaj kantoj povas esti triviala. Sed tre ofte ili prikantas la amon de la tero, naskiĝloko, en la sklaveco la sopiron je la hejmo, kaj naturan fenomenon, ekz. "Tie, trans la maro, jen supren venis la vespera stelo . . . Nun ekripoz vi, ho suno kaj malaperu en la profundo . . . !

La poezio kaj prozo ĉe la maorio ne estis apartaĵoj, ambaŭ kunmiksigis kaj fandigis ankaŭ en la interparolado . . .

La saĝon de tiu ĉi naturpopolo pruvas ankaŭ la granda amaso de ĝiaj proverboj. Ni citu nur kelkajn:

"Se unu loko estas neeltenebla, iru al alia",

"La popoloj malaperas, sed la tero restas",

"La tero kaj la virino estas la du, por kiuj la viro mortas",

"La viro devas sin gardi de du objektoj: De la pinto de la lanco en la batalo kaj de la lango de la virino en la paco",

"Estu kuraĝa, por ke vi restu viva".

TRANSMARAJ REDAKTOROJ KAJ ELDONISTOJ ATENTU

Bonvole notu ke la adreso, por sendi viajn interŝanĝ-ekzemplerojn kaj librojn por recenzo estas: "ESPERANTO", Box 2122T, G.P.O. Melbourne, 3001, Aŭstralio.

Profundan saĝon deklaras tiu ĉi proverbo: "Ka to he ra, Ka ura he ra"—La suno mallevigas, la suno levigas".

Ĉi tiuj supraj notoj servas por montri, ke la maorio estis (kaj estas) ĝenerale serioze — eĉ profunde — pensanta kreaĵo, kies pensmanieron regis la teraj kaj superteraj, por li nesolveblaj enigmoj de la universo.

Post tiu ĉi enkonduko ni iru al nia vojdirekto. Ni volis per la menciitaj konigi la karakteron de la maorio: Ĝi estas serioza, gravema, denaske sprita. Kaj tiuj ĉi ecoj regas lian tutan ekziston. Pro tio, kiam ni intencas prezenti la maorian humuron, ni devas akcenti, ke ni povas doni nur historietojn, okazintaĵojn (ĉu verajn ĉu divenitajn) pri kaj kun la maorioj. Tiuj eroj estas humuraj kaj pruvas la maorian (simplan) spriton.

La verkinto de tiu ĉi artikolo devas konfesi, ke li ne konas divenitajn anekdotojn de maorioj, nur por ni, "pakeha" (blankuloj), gajajn historietojn. Sed ankaŭ tiuj jetas lumon al la pensmaniero de la primitiva (antaŭa) maorio:

Historia fakto:

Kiam la brita reĝino, Victoria, en la pasinta jarcento nomis sian unuan guberniestron por la nova kolonio Nov-Zelando, la guberniestro kunvokigis ĉiujn maoriajn trib-estojn kaj sciigis al ili, ke li estas la guberniestro, ĉefa tribestro super ĉiuj triboj. Tiam in maoria ĉefo ekstaris kaj diris: "Bone, vi restu tie ĉi, mi iros en vian landon. Se ili akceptos min tie kiel guberniestron, tiam ankaŭ vi povos resti tie ĉi guberniestro."

Ne kiel humurajon, sed kiel interesajn ni menciuj, ke hundojn jam la unuaj maorioj kunportis kiam ili enmigris "AOTEAROA" (LA LANDO DE LA BLANKAJ NUBOJ), antaŭ ĉ. 600 jaroj. Turi, ĉefo inter la unuaj "patruj-okupintoj", donacis mantelon al sia edzino, faritan el hundofelo. La maoriaj, historiaj legendoj eĉ gardis ankaŭ la nomojn de la ok hundoj, per kies feloj kovris sin la maoria "princino".

Kaj jen kelkaj eroj pri la maoria sprito, kvankam la aŭtoro de tiu ĉi artikolo sincere konfesas, ke li suspektas, ke kelkaj el tiuj ĉi "historietoj" eble estas amikaj mokincitaj, eltrovaĵoj de la "pakeha" (blankulo).

Fanfarono: Hori fanfaronas en la drink-ejo, ke li kaptis grandegan fiŝon, kiu povis esti 9 kg-ojn peza. La drink-kamaradoj aŭskultas lin iom nekredeme. Unu el ili ekparolas: "Ĉu vi scias, kiu mi estas?" "Ne", respondas

Hori. "Mi estas la ĉi-tiea kontrolisto de la fiŝkaptado!" Hori ektimigas, kio okazos nun, sed li tuj rekonsciigas: "Kaj ĉu vi scias, kiu mi estas?" "Ne", respondas la inspektisto. "Mi estas la plej granda mensogulo en tiu ĉi regiono", respondas Hori triumfe.

Maori Sizifo: Tui estis jam delonge senlabora. Fine li ricevis laboron ĉe vojriparado. Sur la veturilvojo li devis rekovri kaj rektigi la tie estiĝintajn truojn. Li faris tion kun ĝojo, ĉar li estis bone pagata. Malfrue nokte lia amiko laŭiras la saman vojon kaj li vidas, ke Tui, ankaŭ tiam diligente laboras, sed nun kontraŭe: Li eljetas la teron el la truoj, kiujn li dumtage enterigis. "Kion vi faras, Tui", demandas la amiko. "Mi preparas novan laboron al mi por morgaŭ", respondas Tui ridetante.

Bona horloĝo: Henare jam delonge sopiras je bona kaj bela brakhorloĝo. Fine li iras al la horloĝisto. "Jen tre bona horloĝo", diras la horloĝisto, "se oni streĉas ĝin, ĝi funkcias dum unu tuta monato." "Bonege", respondas Henare, "se mi streĉos ĝin, ĝi iros por ĉiam".

Granda risko: En Nov-Zelando la soldatiĝo ne estas deviga. Ĝi havas nur volontulan armeon. Heke renkontas sian amikon kaj sciigas al li la novaĵon: "Mi anoncis min kaj oni akceptis min al la soldataro." "Nu, kaj kian armilspecon vi elektis?" "Mi volas fariĝi infanteriano", respondas Heke. "Kial vi ne iras al la pilotoj?" "Ho, tion ne! Povas esti, ke la motoro malbonigas, kiam ni estas supre, kaj tiam la superulo diros: Eliru, maori, kaj plibonigu la motoron!"

Fierco: Tiki tre fiere promenas sur la strato gvidante grandan, danan hundon. Kontraŭ li venas lia amiko kaj laŭdas la hundon: "Belega hundo! Ĉu ĝi estas bona ratokaptanto?" "Tion mi ankoraŭ ne scias", diras Tiki, "nur tion, ke ĝi terure timas muson".

Ni povas vidi jam el la supre-donitaj ekzemploj, ke malgraŭ sia multcentjara izoliteco de la tuthomaro, ankaŭ la maorio havas la saman homan karakteron kiel ĉiu popolo en la vasta mondo.

Kiam la unuaj blankaj enmigrintoj klarigis al ili, ke "mi estas franco", "mi estas anglo, skoto" ktp. kaj ili demandis la indiĝenojn, "kio vi estas?", tiuj ankoraŭ ne konante la naciajn diferenc-

ojn, respondis "Mi estas maori", kies signifo en ilia lingvo estas "homo".

Kaj nun ni adiaŭas kun ilia bela saluto: Tena koe e hoa! — Hej, vi amiko tie!

AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTH:** Je 20/2 D-ro Einihovici parolis pri urboj laŭ graveco por Esperanto. Aparte li menciis Varsovion, kie Esperanto naskiĝis; Budapeŝton pro literaturaj gigantoj Kalocsay, Baghy, Szilagy; Vienon pro la Internacia Esperanto-Muzeo, Olive Hunt gvidis ludojn.

Je 6/3 D-ro Einihovici informis pri Esperanto-Literaturo kaj Jack Hawks montris diapozitivojn.

Ges-roj C. Dean plenumis inviton alparoli lernantojn kaj instruistojn de la "Komunuma Lernejo" en "Two Rocks" (26/3). Ili alparolis klason de proks. 30 lernantoj, kiuj atente aŭskultis al la prelego kaj poste faris inteligentajn demandojn.

● **ADELAIDE:** Nia grupo kunvenis je 10/4 kaj 14/5 en la Universitato, sed nur malmultnombre. En majo ni priparolis la monkoklekton, kiun S-ro Kanaĉki organizis en Melburno por la viktimoj de la tertremo en Jugoslavio. Krom helpo al la viktimoj tiu agado estis samtempe reklamo por Esperanto.

—R. Felby.

● **MELBOURNE:** La ĝenerala kunveno de la Melburna E-Societo okazis je 12/2. Laŭ la raporto de la aganta kasisto (E. Chick), montriĝis defikto por 1978 de \$7.98, sed la aktivo de la societo estas \$3.791.09. La sekretario raportis malgrandan regreson la nombro de la membroj. La ĉeestantoj esprimis dankon pro la plujara bona laboro de ĵus eksiginta kasisto, John Munro.

Elektiĝis la jena nova estraro: Prez: S-ro S. Kanaĉki; Vic-Prez: S-roj H. Beechey kaj S. Stepanov; Sekretario: S-ro H. Koppel; Kasisto: S-ro Errol Chick; Bibliotekistino: S-ino Fay Koppel.

"Ĉu ni havas neordinarajn kapablojn?", estis la temo de prelego de S-ro H. Beechey (19/2). Semajnon poste, Errol Chick montris diapozitivojn pri vojaĝo tra Centra Aŭstralio.

Bonvena gasto ĉe nia kunveno de 19-a de marto, estis S-ro Peter Varkaŝkas, el Litovujo. Li estas la frato de S-ino B.

Silva (membro de la Oakleigh E-grupo), kies gasto li estas dum mallonga vizito. Kvankam sovetunia ŝtatanino, li ne tre bone parolas ruse, do li havis mutan flugvojaĝon en la soveta aeroplano de Moskvo al Singapuro. Sed kiam en Singapuro li ŝanĝis al ALITALIA-aeroplano la sorto prezentis al li S-anon Domenico Spinazze, ĉef-stevardon denove de orantan survoje al Melburno. Kia malgranda mondo!

"Verkisto ne sufiĉe konata", estis la temo de prelego de S-ino F. Koppel (2/4), okaze de la 10-a datreveno de la morto de S-ro L.N.M. Newell. Regula vizitanto ĉe niaj kunvenoj estas nun S-ro Probal Daŝgupto, hindo, kiu nuntempe instruas pri lingvistiko ĉe la Melburna Universitato.

"Jugoslavio dum la milito" estis la temo de interesa prelego de S-ro S. Kanaĉki (9/4). Nia hinda gasto, S-ro P. Daŝgupto, 23/4, rakontis pri sia laboro kiel volontulo por U.E.A. en Rejkjaviko, Roterdamo kaj Nov-Jorko.

Je 16-a de aprilo atingis nin la malgaja novaĵo pri la terura tertremo en Jugoslavio. S-ro S. Kanaĉki, Prezidanto de la Melburna E-Societo, kiu naskiĝis en Jugoslavio, organizis monkoklekton inter la esperantistoj. 31 Melburnanoj kaj S-ro J. Matasin (Sydney) kontribuis entute \$234. Tiu donaco estis anoncita, 21/4, pere de la Etna-Radiostacio 3EA. S-ino Emilia Lapenna, la konata jugoslava esperantistino, sendis dankleteron kaj informis ke ŝi anoncos la donacon en la Esperanto-elsendo de Radio Zagreb.

La E-Grupo en antaŭurbo **OAK-LEIGH** havis sian jarkunvenon je 7/2 kaj elektiĝis la jena estraro: Prez: Jack Fallu; Vic-Prez: Eva Reed; Sek: Robert Reed; 2-a Sek: Ivy Fallu; Kas: Ann Hearn.

La grupo nun kunvenas nur ĉiun unuan kaj trian merkredon de la monato, vespere, en la urba biblioteko de Oakleigh. Krome okazas kunversaciaj klasoj ĉiun 2-an kaj 4-an merkredon, posttagmeze, en la hejmoj de komitatanoj.

Dufoje la grupo havis la plezuron bonvenigi inter si litovan esperantiston Peter Varkaŝkas, kiu vizitis sian frat-inon, S-inon B. Silva.

La grupo en **MALVERN** elektis novan estraron je 13/2: Prez: Don Pescod; Sekr: Garry Killender; Kas: Beryl Pescod; Bibliotekisto: Barbara Podmore. Group Gvidanto: Adrienne Paling.

Ankaŭ la grupo en **WAVERLEY** havis sian ĝeneralan kunvenon. George

Holding reelektiĝis. Prezidanto, Eva Trainor, Sekretario, Isabel Gale, Kasisto, Jessie Ludgate fariĝis bibliotekistino kaj Don Rogers reprezentas la grupon en la Viktorio Federacio.

● **SYDNEY.** Bill Leah, 5/3, montris filmojn fotitajn en Singapuro kaj Malajzio en la tagoj tuj antaŭ la eniro de la japanoj. Margaret Chaldecott, 12/3, montris lumbildojn kaj broŝurojn de Alice Springs kaj Ayers Rock. Estas vere mirinda lando, sub kies ŝajne seka grundo ekzistas abunda akvo-provizo.

John Matasin, 19/3, parolis pri lingvo, precipe prononcado, prelego kaj la arto de la oratoro. Wre. Chandler, 26/3, parolis pri "Vagante inter la planedoj". Kiel raportisto por fikcia periodaĵo, oni petis lin verki artikolon pri Jupitero. Venkinte problemojn pri ekstertera veturado, li atingis la planedon Jupiteron. Post sufiĉe da tempo tie, li revenis al nia tero kaj survoje vidis kaj priskribis Marson. Kiel li trapasis la barilojn de tempo kaj gravito estas temo tro teknika por ĉi tiu raportistino.

Por la 2-a de aprilo oni sugestis ke ni serĉu ŝercojn por tiu tago, kiu sekvis la "Tagon de la Aprilaj Stultuloj". Per la libro "La Gaja Leganto" (P. Schwerin), kaj ŝercoj de sukcesaj trovintoj, ni ĝuis neseriozan vesperon.

La filino de Victor Bourlin anoncis la morton de la patro je la mateno de 9-a de aprilo. Precipe tiuj, kiuj vidis lian "Grimacoj de la Mondo"-n, bedaŭras lian forpason.

Je 23/4 ni bonvenigis 3 vizitantojn. S-ro L. Bernstein el Wellington parolis pri la diferencoj inter sia lando kaj nia. Laŭ li, aŭstralianoj sin vestas laŭ la vetero, sed nov-zelandoj laŭ stilo. La aliaj vizitantoj, Henry kaj Nina, naskiĝis en Danlando. Ili parolis pri siaj vojaĝoj tra Turkujo, Hindujo, Pakistano, Srilanko kaj Nov-Zelando.

Wre. Chandler, 30/4, montris lumbildojn pri floroj de la Sidneja regiono. —M. Chaldecott.

● **MANLY:** Je 24/3/1979 okazis speciala renkontiĝo (ĉefe anglalingva), organizita de S-ino Thora Thomas, nia estrarano por publikaj rilatoj. Al Manly venis, el diversaj partoj de la metropolo, esperantistoj, lernantoj kaj vizitantoj, por partopreni la aranĝon, kiu inkluzivis piknikan lunĉon, promenon laŭ la haveno, kaj la ienan programon: komunikantado (P. Ford Lewis akompanis); sin prezentado (ĉ. 35 personoj); magiaĵoj kaj ventroparolado fare de nia lernanto

George Hicks; intervjuoj kun B. Cleminson, E. Matasin, A. Cocking, M. Duncan, kun la celo informi la ĉeestantojn pri la organizo kaj praktika valoro de la Esperanto-movado laŭ niveloj grupa, ŝtata, landa kaj monda. La anoj ŝuldas dankon kaj gratulon al Thora pro la sukceso de ŝia bone elpensita aranĝo. —M. Duncan.

ESPERANTO EN TASMANIO

En aprilo kaj majo, 1979, Ralph Harry, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, deĵoris en la Universitato de Tasmanio en Hobarto kiel vizitanta profesoro.

La 23-an de aprilo, S-ro Harry, kune kun S-ro Mac Lefevre, membro de la Tasmania Leĝdona Konsilio, t.e. la supera ĉambro de la Parlamento, prezentis al la Ŝtata Regiona Biblioteko en Launceston, en la norda parto de la insulo, 350 librojn por starigaj Esperantofakoj. La televido intervjuis S-ron Harry, kaj la gazetoj ("Examiner" de Launceston, kaj "Mercury" de Hobarto) eldonis raportojn kun fotoj.

Tiun vesperon, S-ro kaj S-rino Harry estis gastoj de la Esperanto-Klubo de Launceston en la hejmo de Gesinjoro Lefevre. S-ro Harry raportis pri esperigaj eventoj en la tutmonda E-Movado.

La 2-an de majo, dank'al la iniciato de S-roj Kam Lee kaj Richard Harris, studentoj en la Universitato, kaj kun la helpo de la Delegito de UEA, S-ro Looirts, okazis publika kunveno en la studenta Klubejo. S-ro Harry prelegis pri la temo "Spertoj kun Esperanto"—UN, UNESKO kaj la Diplomatio. Ĉeestis ĉirkaŭ 20 personoj, inter ili la Vic-estro de la Lernejo de Amikoj (Kvakeroj), S-ro Nigel Heyward, kiu informis, ke li intencas lerni Esperanton kaj reenkonduki ĝin en tiun lernejon.

La 9-an de majo S-ro Harry alparolis 100 studentojn pri "Esperanto, Lingvo de Internacia Amikeco". Troviĝis inter la studentoj knabino el Nov-Zelando, Sarah Gemmell, kaj ankaŭ knabo kiuj ambaŭ bone parolis Esperanton. La Lernejestro, S-ro R. W. Grosvenor, kies patro estis entuziasma Esperantisto en Anglujo, konfirmis, ke li bonvenigos planon por la instruado de Esperanto.

● **BRISBANE:** Ĉiulunde la 4 diversnivelaĵoj klasoj daŭras en n'aj klubĉambroj. Ni ricevis inviton de "Griffiths Kultura Asocio" ĉeesti la Jarkunvenon de tiu asocio, ĉe Universitato Griffiths, en majo. Tri anoj de nia klubo ricevis var-

man bonvenon kaj dum elektado Ray Ross estis elektita al la komitato. La ĉefcelo de la asocio estas helpi iel kunligitajn asociojn kaj ĉiuspecajn art-grupojn en la sudo de Brizbano. Sendube ni nun havas pluan ŝancon diskonatigi Esperanton inter multaj aliaj grupoj, kaj samtempe ricevos helpojn se necese, precipe pri reklamado.

Laŭ simila ideo ni ankaŭ starigis rilaton kun "Youth Hostels of Australia". Gastparolanto vizitos en majo nian ĝeneralan kunvenon, kaj reciproke ni ricevis inviton prezenti Esperanton al la ĝenerala kunveno de Y.H.A. Interesa fakto estas, ke miloj da eksterlandanoj jare vizitas la gastejojn de Y.H.A. Sendube tiaj lokoj estos fruktodonaĵoj por nia internacia lingvo. — Ray Ross.

EL LA FEDERACIOJ

● **KVINSLANDO:** La unua konferenco en 1979 okazis la 5-an kaj 6-an de majo en Brizbano; entute pli ol 40 anoj partoprenis, aŭ sabate aŭ dimanĉe: la plej multaj ĉeestis dum ambaŭ tagoj. La Prezidantino, Doris Sinclair, bonvenigis ĉiujn al la ĝenerala kunveno, sabate, ĉe la kunvenejo, St. Albans, Wilston. Bedaŭrinde Sybil Martin, pro malsano de sia edzo devis ekŝigi el la sekretaria/kasista ofico; Doris tuktore dankis al Sybil pro la kvinjara laroro. Bev Allatt nur estas la Sekretario kaj Wanda Stadhams estas la kasisto. Raportojn pri kluboj jene: Brizbano (Trevor Steele); Ipswich (Alec Morrison); Emu Park kaj Rockhampton (Joyce Turner); St. Luĉia (Win Greenhalgh); Toowoomba (per letero Jean Lehane); Sunshine Coast (Doris Sinclair). La kunveno decidis aranĝi la 2-an konferencon ĉe la "Palm Breeze" Gastejo en Caloundra, kaj la piknikon, dimanĉe ĉe Stanley Rivero Parko.

Sabatvespere 40 anoj tre ĝuis memservan manĝon. Poste okazis distraĵoj, kiam diversaj eroj kaj komun-kantado tre plaĉis al la geaŭskultantoj kaj al la partoprenantoj. Ĉar pluvis dimanĉe, ne okazis pikniko, sed 30 anoj ĉeestis la hejmon de Ges-roj Ross, kie ludoj, diskutoj kaj rostfesto finis tre sukcesan konferencon. — Ray Ross

● **NOVA SUDKIMRUJO:** La 32-a konferenco de nia federacio okazis de la 6-a ĝis la 8-a aprilo en la luksa hotelo "California" en Katoomba kaj estis bone organizita de Eve Matasin. Ĉefa diskuto

estis pri la presado de la federacia organo "Telopeo", Ni decidis ne aĉeti novan multobligilon, sed transdoni la laboron al profesia presisto. Sabatvespere ni ĝuis lumbildojn de T. Ilow, muzikon de Les Scott kaj "Kvizon", gviditan de Robbie Robertson.

Dimanĉmatene okazis ekskurso al Sublime Point, Leura kaj al Gordon Falls kaj Echo Point.

● **VIKTORIO:** "Vespero kun la Federacio" estis la moto de la federacia kunveno je la 23-a de februaro. Dek unu membroj kune vespermanĝis en la "Wild Cherry" Restoracio en la urbcentro, kiuj post renkontiĝis kun ses aliaj por viziti la Ĉef-Postoficejon. Du funkciuloj de "Australia Post" gvidis la vizitantojn tra la 4-etaĝa domo, kie milionoj da leteroj kaj pakajoj estis klasifataj por distribuo tra tuta Aŭstralio kaj transmare.

Por la t.n. "Moomba" Festa Semajnfino (10-12/3), la Federacio ricevis inviton je partopreno. En la bela ĝardeno Fitzroy ni erektis standon kun buntaj balonoj, afiŝoj kaj Esperanto-libroj. Centoj da vizitantoj demandis pri Esperanto. Kelkaj neniam aŭdis pri Esperanto, aliaj diris "Ĉu tiu lingvo ankoraŭ ekzistas?". Ĉiuj konsentis ke internacia lingvo estas urĝe necesa. Ni disdonis multajn flugfoliojn, sed laŭ nia scio, neniu el la 4 melburnaj kluboj gajnis novajn lernantojn.

Aŭtobusa ekskurso okazis je 12/5. Pro pluvema vetero, malmultaj partoprenis, kaj la 11 esperantistoj, plus 2 junulinoj, kiuj ekskursis, ne povis marŝi laŭcele, sed ĉiuj ĝuis la veturadon tra la montaro kaj la piknikan lunĉon ĉe Sherbrooke.

If "The Australian Esperantist" arrives incorrectly addressed, or if you should change your address, please supply correct details to our Despatch Officer:
Mr. Jack FALLU
 10 Sumersett Avenue,
 Oakleigh South, Vic., 3167

"Ĉu vi hodiaŭ vespere intencas iri al la teatro por vidi la virinon kun la fera makzelo."

"Ne! mi restos en la hejmo kaj aŭskultos ŝin tie."

22nd AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

Jan. 2-9 — Sydney

This congress will be held at the St. Paul's College of Sydney University. It will again be a "Live-in Congress". Congress members will be accommodated in comfortable one-bed rooms.

Congress Fee: Before 1-7-1979, \$12.00.
After 1-7-1979, \$15.00.

Full Board from lunch 2-1-1980 till breakfast 10-1-1980, \$200.00

As A.E.A. Secretary/Treasurer Les Scott will be away in Switzerland, mail your Congress Fee to the Treasurer, **Mrs. E. Matasin, 1 Coorabin Road, Northbridge, 2063.** Add at least \$10 for room deposit and a stamped, addressed envelope for your receipt.

First List of Congress Members:

1. Robbie Robertson, Sydney
2. Margaret Robertson, Sydney.
3. John Matasin, Sydney.
4. Eve Matasin, Sydney.
5. Margaret Chaldecott, Sydney
6. Wre. Chandler, Sydney
7. Herbert Koppel, Melbourne
8. Fay Koppel, Melbourne
9. Kevin Smith, Sydney
10. Betty Cleminson, Sydney
11. Ruth Carruthers, Sydney
12. Sam. Ellyard, Canberra
13. Marj. Ellyard, Canberra
14. Volo Gueltling, Sydney
15. Ilija Grahovac, Sydney
16. Irene Courtenay, Melbourne
17. Katie Wright, Sydney
18. Doris Sinclair, Peachester, Q.
19. Isabel Gale, Melbourne
20. Wal. Lewis, Sydney
21. Barbara Bennett, Sydney
22. Hertha Mueller, Sydney
23. Norman Collier, Buderim, Q.
24. Winsome Greenhalgh, Brisbane
25. Dr. T. Einihovici, Perth
26. Idyss Einihovici, Perth
27. Eva Trainor, Melbourne
28. Kaethe Schwerin, Sydney

State Distribution: N.S.W., 16; Victoria, 5; Queensland, 3; A.C.T., 2; Western Australia, 2.

POST CONGRESS IN MANLY

The Esperanto Club of Manly will organize the Post-Congress from the 10th to the 14th Jan., 1980, at the 'Hotel Manly'. Accommodation in single bed room will be \$19, in twin-bed room \$12, per person er night (without meals).

Join by mailing \$10 Hotel Deposit to "Esperanto Post-Congress", Box 415 Manly, NSW, 2095.

Clarence Strochnetter, OAM

Nia membro Clarence Strochnetter (Pyengana, Tasmanio), okaze de la Aŭstralia Festotago, estis honorita de la Aŭstralia Registaro, kiu aljuĝis al li la Medalon de la Ordeno de Aŭstralio (OAM). La gazeto "Examiner" (Launceston) detale raportis pri la honoro al Clarence (kun fotografajo) kaj citis, i.a., ankaŭ lian laboron por la Esperanto-movado.

La Aŭstralia Esperanto-Asocio kore gratulas sian eminentan membron pro tiu meritita honoro.

ESPERANTISTINO RICEVIS ALTAN STIPENDION

Philippa Maddern, 26, filino de nia Vic-Prezidanto, S-ro Ivan Maddern (Morwell), jus gajnis "Post-diplomitan Stipendion" por studi la Historion de la 15-a jarcento ĉe la Universitato de Oxford. La t.n. "Senior Hulme Overseas Scholarship" estas aljuĝata al nur unu persono jare en la aŭstralia-novzelandia regiono.

La stipendio havas la valoron de proks. \$20.000 kaj post plenumo de sia 3-jara kurso, F-ino Maddern fariĝos "Doktoro de Filozofio". Philippa, kiu lastjare magistriĝis kaj nuntempe instruas en la "Reĝa Melburna Instituto de Teknologio", forlasos Aŭstralion en septembro.

ELSTARAJ ESPERANTISTOJ MORTIS

EINAR DAHL (1904-1979): Li mortis 17-an de januaro en Uddevalla, Svedio. Ano de la sveda parlamento dum 18 jaroj. Lernis Esperanton en 1921 kaj agadis en la landa kaj internacia E-movadoj. Dum pluraj jaroj li sukcesis akiri fortan apogon de svedaj parlamentanoj por la kandidatigo de UEA por la Nobel-Pacpremio. En 1970 li estis distingita per la ora sveda medalo "Pro socia merito".

Pli ol ducent personoj ĉestis la enterigan ceremonion. Nome de UEA kaj la sveda movado S-ro L. Aalberg parolis kaj metis florkronojn.

F. FAULHABER (1893-1979): Li mortis la 2-an de marto en Oudewater, Nederlando. Li naskiĝis en Amsterdamo en 1893 kaj eklernis Esperanton en 1912. Li estis kunfondinto de la Federacio de Laboristaj Esperantistoj, kies prezidanto li estis de 1927 ĝis 1938. Dum pluraj jaroj li redaktis "Laborista Esperantisto"-n kaj iniciatis en 1934 la studgazeton "La Progreso" Lia ĉefverko estas la monumenta 340-paĝa nederlandlingva gramatiko "Tra la labirinto de la gramatiko". Krom deko da aliaj libroj li ankaŭ tradukis el la nederlanda lingvo "La nevencbla ĝeno"-n de Theo Thijssen.

ANDREO CSEH (1895-1979): Li mortis la 9-an de marto en Hago. Li naskiĝis la 12-an de septembro, 1895 en Marošludas, tiutempe en Hungario, nun Ludoŝul de Mureŝ, en Rumanio. Li lernis Esperanton en 1910, kiam li estis nur 15-jara gimnaziano. En 1919 li fariĝis pastro kaj en 1920 li ellaboris sian propran, "rektan" kursmetodon, nun konatan "Cseh-Metodo". En 1924 lia episkopo permesis al li sin tute dediĉi al la E-movado. Li fariĝis sekretario de la Internacia Centra Komitato en Genevo. En 1927 li sukcese gvidis aron da seminario en Svedio, poste en aliaj skandinaviaj landoj. En 1930 li definitive venis al Nederlando, kie li, kune kun Ges-roj Isbrucker, fondis la Internacian Cseh-Instituton. Li fondis la revuon "La Praktiko", kiun li redaktis dum 30 jaroj.

LA DUA PACIFIKA ESPERANTO-KONGRESO

Post longaj kaj vanaj klopodoj en Japanujo, Koreo kaj Usono, por trovi lokon por okazigi la 2-an Pacifikan Esperanto-Kongreson, ni nun ĝojas raporti ke tiu kongreso okazos en Kanado.

Sub la aŭspicio de la Kanada Esperanto-Asocio, la kongreso okazos en la bela urbo Vancouver (Brita Kolombio), inter la 26-a kaj 29-a de julio, 1980. Je la sama tempo kaj loko okazos la 22-a Kanada E-Kongreso.

Ni esperas ke AIR-NEWZEALAND denove estos la oficiala internacia aerkompanio por la kongreso.

La kongreskotizo estas \$10 ĝis la 31-a de dec., 1979, kaj \$20 post tiu dato. La unuaj aligoj iam atingis la kongreskomitaton. Sendu vian kotizon al "Vancouver Esperanto Society", Box 2860 M.P.O., Vancouver, B.C., V6B 3X4, Kanado.

Herbert Koppel, Melbourne
(Komitatano)

Fred Wood, Auckland, N.Z.
(Pacifika Sekretario)

64-a Universala Kongreso — Luzern

Ĝis komenco de majo aliĝis 1309 kongresanoj. Ĉefe ili venas el Francio (178), F. R. Germanujo (152), Svislando (144) kaj Nederlando (124) El Aŭstralio la sekvantaj intencas partopreni:

S-ro W. Chandler (Sydney)

S-ino B. Cleminson (Manly)

S-ino B. Hart (Sydney)

S-ino G. Kirkwood (Coffs Harbour)

Ges-roj H. Koppel (Melbourne)

S-ino M. Robertson (Sydney)

Ges-roj M. Ross (Sydney)

S-ino O. Russell (Sydney)

F-ino L. Samblebe (Melbourne)

Ges-roj L. Scott (Sydney)

S-ino A. Spencer (Brisbane)

S-ino D. Threlfall (Perth)

Ĉar la Kongresdomo en Lucerno enhavas grandiozan orgenon, la brita esperantisto David Hill regalos la kongresanaron dum la Inaŭguro kaj dum aparta orgenkerto.

En la "Int. Somera Universitato" prelegos 11 specialistoj el 9 landoj. I. a. prelegos: Ralph A. Lewin (Usono) pri "La mistera kazo de la verdiĝintaj ursoj"; Wim M. A. de Smet (Belgio) pri "La intelekta kapablo de la delfenoj"; Prof. C. Stop-Bowitz (Norvegio) pri "Prizorgado de la idoj ĉe bestoj". Kaj jen kapturna temo: "Konvertilo por konekto al X25-a datenreto", fare de Christian Bertin (Francio).

Por kio ni laboras por traduki dum propran kreativon ni neglektas la fremdajn florojn zorganime plektas por laŭrojn sur alies kapon buki

Survoje la papavoj petas pluki sed sekajn florojn solaj ni kolektas Por kio ni laboras por traduki dum propran kreativon ni neglektas

Im'iti povas vere nin eduki sed kiu riĉan arton intelektas kaj iri ĝis la luno ekprojektas decidus per imito nur kaduki

Por kio ni laboras por traduki
—Frank Dunn

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

1. Professor Robert George (Robby) Robertson, M.A. (Oxon). M.E. (N.S.W.)

Born in Penrith — a small town in Northern England. Mother was a school-teacher and county hockey player. Father was a Scottish cabinet maker — a dedicated Christian pacifist who maintained his ideals to his own detriment. Hence the three chief traits of "Robby" — athleticism, idealism and love of learning.

As a boy, "Robby" had two handicaps; he earned unpopularity by (nearly) always being top of the class and he had the habit of asking, "Why?" — why the floggings, the barbarous discipline and the discrepancy between principle and practice. He didn't even understand how the compulsory sport on the playing fields of Eton had won the Battle of Waterloo.

"Robby" had little difficulty when (as man) he learnt Esperanto, and no wonder. As a child, he was trilingual — in Scotch, Cumbrian (Ba goom, choom,) and Provincial English. As a youth, he superseded these with a genteel middle class accent and later, no doubt, used the Oxford accent" when the occasion demanded. He also learned French, German and Latin.

Having been brought up on a diet of "books, books and more books", Robby turned to philosophy and devoured the works of Bertrand Russell which "liberated" him from many of the religious beliefs he had been taught but had not accepted. He preferred "doing" to dogma!

Robby's not too happy schooling — but, not, of course, his learning — culminated in his winning a scholarship to Oxford University, where he was lodged in a dwelling of medieval splendour and medieval discomfort. There he studied mathematics for the first year, but in second year transferred to the, then, very small Faculty of Engineering. He also joined the Jujitsu Club. To gain practical engineering experience he "signed on" as a supernumerary on a Cunard liner for the holidays. He also worked in an aeroplane factory where an

appalling discovery carried his education one stage further. Even in the critical pre-war years, "workers" didn't work! They played cards in unfinished fuselages.

On graduation, he was employed designing power station machinery in Newcastle-upon-Tyne, where he met, wooed and married blue-eyed, black haired Scottish born Margaret — who, in due course bore him two daughters and a son. During the course of 24 months, the newly married pair lived at 23 different addresses.

For the first, and almost the only time, Robby failed a test in 1942. He had volunteered for the R.A.F. but his eyesight failed to meet requirements, so he was sent to the Navy where his hobby of gliding (60 secs' flying time at this stage) and his specialised knowledge gave him rapid promotion in the fleet air arm, to Lieutenant Air Engineer. By the age of 23, he was in charge of 800 engineering ratings. Transferred to a special helicopter unit, Robby experienced the frustration of watching inefficient helicopters sitting on the airfield whilst flying bombs and rockets were falling on London.

To our ineffable advantage, Robbie was sent to Australia as a staff engineer officer, based in Sydney, where he enjoyed life so much in the wilds of Kirribilli that he was determined to settle here if the opportunity ever came. The war ended, he was sent to New Guinea to report on corrosion problems in aircraft. However, since the average life of a naval warplane was 15 hours, there were no problems. Most of the aircraft they had assembled in Sydney were "ditched" off Sydney Heads and then Robby was free to go home. And go "home" he did, for there were no employment opportunities for an aircraft engineer specialist in helicopters and autogyros in Australia.

(To be concluded next issue.)

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$12.
(Individual, family, club, federation and pensioner)
Full-time Students \$8



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063

Sekretario/Kasisto: S-ro L. V. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W. 2095

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 171 (251)

MELBOURNE

Junio, 1979

INFORMADO POR NE-ESPERANTISTOJ EN NACILINGVAJ PERIODAĴOJ

Bernard Golden

Mi rigardas la informadon pri Esperanto sur la landa kaj loka niveloj kiel kolektivian agadon, kiun kunordigas la landa asocio. Plenumas tiun laboron kompetentaj individuoj aŭ sendepende aŭ en kunlaboro kun lokaj grupoj kaj fakorganizaĵoj. Oni uzas kiel informadrimedojn jam ekzistantajn magazinojn kaj revuojn, aŭ oni eldonas apartan nacilingvan priesperantan periodaĵon. Mi opinias, ke tiu ĉi estas superflua kaj ne trafe atingas la publikon. Mi dubas, ke periodaĵo dediĉita ĝenerale al la lingvaj problemoj en la mondo kaj specife al la Internacia Lingvo Esperanto, estas taŭga komunikilo por la informaj celoj de la Esperanto-movado. La plej grava demando estas: ĉu tia magazino havas merkaton ĉe la publiko?

La situacio estas tute alia, kiam temas pri periodaĵoj dediĉitaj al aliaj specialaj aferoj aŭ aspektoj de la vivo. La merkato por ili jam ekzistas antaŭ la lanĉo, do oni povas esti certa pri sufiĉe larĝa bazo, t.e., abonantaro kaj aĉetantoj, por certigi la sanan ekonomian staton de la publikigaĵo. Ekzemple, oni povas taksu pli-malpli precize la nombron de posedantoj de hundoj en iu lando, por scii, kiam da potencialaj legantoj ekzistas por magazino pri hundoj. Estas ankaŭ tre probable, ke ĉiu serioza ŝakludanto regule legas ŝakrevuon. Kaj kiu virino povas riziĝi la tenton trafolumi periodaĵon pri modoj? Oni povas diri, la samon pri aliaj magazinoj, kies enhavo allogas diversajn sektorojn de la publiko kiel aŭtomobilistojn gartenamikojn,

ĉasistojn, ktp. Sed kiu elpoŝigus monon por magazina mikspoto pri lingvaj problemoj. Se mi bone komprenas la klarigon de tiuj, kiuj proponas tian periodaĵon, temas pri iu nedifinebla grupo el la intelekta tavolo dem la socio.

Mi proponas inform-programon, kiu celas atingi multe pli vastan grupon, eventuale, la tutan parton de la socio, kiu kutimas legi periodaĵan literaturon. Alia esenca trajto de mia projekto estas la planado kaj adresado de la informoj al ĉiu aparta grupo enkadre de ĝia propra interes-sfero aŭ fak-tereno. Temas, evidente, pri verkoj fare de esperantistaj fakuloj por samfakuloj. Tiucele ekzistas en ĉiuj landoj hodiaŭ dekoj de konataj revuoj, magazinoj kaj gazetoj kun fiksa abonantaro kaj fidela legantaro. Artikolo aperanta en tia periodaĵo valorus multe pli, ol se ĝi aperus en prilingva magazino.

Mi proponas, ke oni faru ĉi-jare liston de proksimume dudek periodaĵoj en diversaj kampoj kaj tasku al la plej kompetentaj kaj verkemaj esperantistoj la preparon de artikoloj celantaj la legantaron de ĉiu periodaĵo. Po unu artikolo dum la jaro 1979 en aro da prestiĝaj publikigaĵoj en pluraj landoj signifas, ke la mesaĝo pri Esperanto atingos miloble pli grandan legantaron ol tiu de la jaraj numeroj de prilingva magazino, ankoraŭ relative nekonata kaj kun tre limigitaj legantaro. Cetere, la programo ne estas planita por nur unu jaro, sed estas parto de longdaŭra inform-kampanjo.

Dum la unua jaro oni klopodos aperiĝi po unu artikolon monate, do entute dek du en 1979. Por la sekva jaro tridek periodaĵoj estos elektitaj kaj la celo estos publikigi po du artikolojn monate, poste po tri, po kvar, ktp. Se tiu procedo sukcesos, en 1987, la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Esperanto, eble centoj da verkoj aperos en periodaĵoj de pluraj landoj, krom diversspecaj raportajoj en ĵurnaloj. Espereble, kiel rezulto de tiu ĉi kampanjo, legajoj pri Esperanto fariĝos ĉiutagaĵoj.

Jen kelkaj sugestoj por gvidi la laboron de la unua jaro. En ilustrita kultura semajn-gazeto povas aperi, okaze de datrevenoj de gravaj eventoj en la historio de la landa Esperanto-movado, artikoloj pri la pioniroj, kiuj enkondukis Esperanton en la landon kaj ankaŭ pri la eldono de la unuaj nacilingvaj lernolibroj, propagandiloj kaj Esperantogazetoj. "La rolo de la virino en la Esperanto-movado" povas esti titolo por artikolo aperonta en virina magazino. Ĝi povas temi pri elstaraj virinoj en la historio de Esperanto, ekzemple Rozalia Zamenhof kaj Klara Zamenhof, la patrino kaj edzino respektive da la iniciatinto de Esperanto, aŭ pri la tri prezidantinoj, kiuj nuntempe estras la landajn organizaĵojn de Grekio, Federacia Respubliko de Germanio kaj Nederlando.

Literaturaĵoj — tradukitaj versioj de noveloj kaj poemoj verkitaĵoj originale en Esperanto — povas trovi lokon en pluraj periodaĵoj. Mallongaj rakontoj taŭgas por semajna novel-gazeto. En porinfana revuo povas aperi fabeloj, rakontoj kaj poemoj, kiuj estas tradukitaj de infan-literaturo en aliaj lingvoj helpe de Esperanto servanta kiel pontlingvo, kaj ankaŭ tradukaĵoj de infan-literaturo verkita originale en Esperanto. Por montata beletra kaj kultura revuo oni povas verki studaĵojn kun la titolo "Nia nacia literaturo en Esperanta traduko". Ne nur tradukaĵoj de prozo kaj versoj, sed ankaŭ literaturhistoriaj kaj kritikaj artikoloj taŭgas por monataj mondliteraturaj revuoj. Ĉi-rilate, ekzistas aliaj publikigaĵoj dediĉitaj al la kompilado de bibliografioj kaj la recenzado de fremdlingva literaturo, kiuj estas mankhavaj, se ne estas mencio pri la beletra de Esperanto. En tiaj periodaĵoj troviĝas informoj pri verkoj en pluraj tiel nomataj malgrandaj lingvoj, ekzemple la ukraina, albana kaj jida. Kial ne ankaŭ Esperanto? Aliaj revuoj enhavas ekstraktin el recenzoj pri novaj beletraĵoj en la ĉefaj eŭropaj lingvoj. Ankaŭ Esperanto estas aldonenda.

Magazinoj dediĉitaj al hobiaĵoj kaj dis-trado estas alia promesplena tereno, ne nur por artikoloj pri specialaj temoj, sed ankaŭ por regulaj rubrikoj. En magazino por turistoj, oni povas raporti pri turismaj aranĝaĵoj sub la aŭspicio de enlandaj kaj eksterlandaj Esperanto-organizaĵoj. La Legantoj de flatela revuo certe interesiĝus pri regulaj novaĵoj rilate Esperantajn postmarkojn, post-stampoĵojn kaj parafilatelaĵojn.

Pli postulema estas la verkado por fakrevuoj, kaj nur fakulo mem sukcesos konvinki aliajn klerulojn. Taŭga artikolo por revuo pri la metodologio de fremdlingva instruado povas pritrakti la valoron de Esperanto kiel preparadon por plua fremdlingva studado.

En multaj periodaĵoj troviĝas enhavotabelo kaj kelkfoje ankaŭ resumoj en fremdaj lingvoj. La kutime uzataj lingvoj estas la angla, franca, germana kaj rusa. Tie ĉi la Internacia Lingvo povas diskrete, ne-sintrude okupi samnivelan lokon apud la grandaj lingvoj. Jen vasta, fekunda tereno ankoraŭ neplugita.

Estas eble plurdetale daŭrigi tiun ĉi pritrakton de informrimedoj, sed mi esperas, ke mi jam sukcesis montri praktikan kaj fruktodonan manieron prezenti la mondlingvan problemon kaj Esperanton al la ne-esperantista publiko en pluraj landoj.

AVENTURO EN ĈINIO

Nenio estas nebla! Mi decidis viziti la historian muzeon, kiu situas en la Ruĝa Placo en Pekino.

Mi jam havis multe da sperto pri vojaĝado sen kunulo, do mi akiris la adreson de la muzeo kaj, sur alia peco da papero, la adreson de mia hotelo — ambaŭ en ĉinaj skribaĵoj.

Taksio alvenis kaj komenciĝis mia aventuro. Mi donis al la veturigisto la pecon da papero, kiu montris la adreson de la muzeo. Li legis ĝin kaj gestadis "Ne, foriru!" Homoj amasiĝis! Kia bruoj! Ili gestadis, ke mi cedu kaj reiru al la hotelo.

Mi ŝovis la adreson en la manon de la veturigisto kaj denove diris, anglalingve: "Vetorigu"! Li obeis.

Alveninte ĉe la fama kaj impona muzeo, mi starvice atendis inter amaso da ĉinaj homoj. Kiam alvenis mia vico, la biletovendistino ŝvingis la manon por indiki ke mi foriru. Do mi piediris al la ĉefpordo. Du junaj virinoj haltigis min, tuj poste alvenis alia, kiu kondukis min al ia ŝranko, kaj elprenis grandan

anonc-tabulon sur kiu estis skribita anglalingve "Fremdlandanoj ne permesataj en ĉi tiun konstruaĵon sen skribita permesilo, kaj tiam nur post la dua p.t.m."

Mi timis ke mi devos cedi. Mi serĉis taŭgajn vortojn en mia angla-ĉina frazlibro. Mi trovis "Utilaj Vortoj". Per montra fingro mi indikis la vortojn "Helpo" kaj "Amikeco". La tri virinoj rigardis ĉi tiujn dum la aspekto de mia vizaĝo ŝanĝiĝis pro malĝojo. Ili rigardis unu la alian kaj min. Finfine ili indulge ridetis kaj permesis ke mi eniru.

En tiu kvin-etaĝa konstruaĵo, mi pasigis unu horon rigardante la interesajn ekspoziciaĵojn, kiuj ravis min.

Subite mi memoris, ke mi devas tuj reiri al la hotelo, ĉar baldaŭ mi devos foriri per aviadilo al Nankino. Mi reiris al la bileto-vendistino kaj montris la adreson (skribitan en la ĉina) de mia hotelo. Bedaŭrinde la noto ne indikis la peton "Bonvolu alvoki taksion". La starvico kreskis dum la bileto-vendistino serĉis en la telefonlibro. (Sia tempo valoras kaj jen fremdulino malhelpas ŝin) Mi penis amuzi la spektantojn, montrante taŭgajn frazojn en mia libro. Ili estis amikaj. Eble ili estis studentoj kiuj deziris akiri informon ĉe la muzeo. Kune ni ridis. La ĉina popolo tre ŝatas komikan situacion.

Finfine la bileto-vendistino ŝovis la telefonon al mi. Mi povis aŭdi nur la sonojn de la ĉinaj vortoj. Mi kriegis, anglalingve "Alvoku taksion!" (Fremdulo ĉiam kriegas, se li ne scias la lokan lingvon)

La bileto-vendistino invitis min en la oficejon, kaj ŝi revenis al sia laboro. Tempo pasis! Alvokis min fraŭlino, kiu staris ekster la konstruaĵo kaj atendis la alvenon de la takso.

Mi svingis la manon adiaŭe. Mi esperis, ke mia vizaĝo montris mian tutkoran dankon. La ĉinoj zorgas pri vi. Ili ne deziras ian dankon.

Mi amas ilin.

—Edna Giles.

MORTIS VIRGINIA COX

Virginia Mary Cox naskiĝis 15-5-1895, pli aĝa el du filinoj de Edmund J. Cox kaj Fanny (nask. Roberts) Cox. Ŝi mortis 18-5-1979, nur 3 tagojn post sia 84a naskiĝtago, en 'Surrey Hills Private Hospital'.

Ŝi interesiĝis pri Esperanto post renkontiĝo ĉe dancklaso kun iu Majoro Clarke, kiu sendis al ŝi ekzempleron de la lernolibro "Guide to Esperanto" de Maurice Hyde, kaj per privata studado ŝi akiris scipovon pri la lingvo. Kun la aŭtoro ŝi poste persone konatiĝis kaj amikiĝis, kiel ankaŭ korespondis dum

ties restado en Nov-Gvineo. En 1921 ŝi aliĝis al la Melburna E-Klubo kaj kondukis ankaŭ la patron en la Movadon.

Kiam bedaŭrinde okazis skismo, kiu disdiguigis la anaron, rezultis el tio klubo — gvidata de J. Pyke kaj R. Rawson kun W. Drummond kaj fratinoj Amy kaj Elsie Godfrey — kaj societo — subtenata de P. Hudson, C. Ballard, P. Holmes, F-inoj V. Cox kaj V. kaj L. Irwin kaj S-ino Bigelow. F-ino Cox servis kiel Sekretario de la Melburna E-Societo inter 1925 kaj 1932; ŝia patro estis Kasisto dum parto de tiu periodo; kaj dum pluraj jaroj, ŝi kaj la patro ekspedis eldonojn de la gazeto "Suda Kruco", en kies junia numero, 1926, aperis anonco, ke S-ro E. J. Cox, honora kasisto de la Societo, gajnis la B.E.A.-diplomon kun distingo. Mankas al ni la dato de simila sukceso de la filino. Tamen de S-ro Percy Holmes, kiun F-ino Cox instruis, ni informiĝis pri ankaŭ ĉi tiu flanko de ŝia servado. Post 1932 ŝi servis kiel bibliotekisto ĝis la Societo disiĝis.

La vivrimedon ĝis emeritiĝo ŝi perlaboris kiel sekretariino en la oficejo de la Komisiito por Malto, kaj tiel konsciencie plenumis siajn devojn, ke ŝi gajnis amon kaj respekton ne nur de kunlaborantoj sed ankaŭ de multaj maltanoj, kies lingvon ŝi studadis kaj kies landeton ŝi vizitis okaze de transmara vojaĝo. Tiun viziton ŝi iam priskribis ĉe la Melburna Rendevuo — monata kunveno de posta nova Melburna E-Klubo (nun Societo) — kiu ŝi ĉeestis plimalpli regule en pli aĝaj jaroj, ĝis ankaŭ tiu ĉesis okazi. Sijaj kontribuoj al ties programoj estis maloftaj, sed ĉiam bone preparitaj kaj bonstilaj, inkluzive tiun pri partopreno en la U.K. de 1965 en Tokio.

Nelonge post emeritiĝo, ĉe A.E.-kongreso en Kanbero (1956) ŝi aŭdis, ke A.E.A. bezonas ekspedanton por la gazeto, kaj ŝi proponis sin por la ofico, kies taskojn ŝi plenumis dum la sekvantaj 14 jaroj. Ĉe la Kongreso en Perto, Jan., 1970, A.E.A. dankeprime donacis al ŝi broĉon.

Bedaŭrinde la sanstato malboniĝis baldaŭ poste, kaj ŝi devis rezigni tiun laboron. Ŝi estis plurfoje en hospitalo antaŭ fina ekloĝo en hospitalo por maljunuloj, kie ŝi malrapide sed konstante malfortiĝis. Ŝia menso tamen restis klara kaj, kiam, la tagon post ŝia lasta naskiĝtago, la jena skribanto vizitis ŝin, ŝi diskutis la okazontan kongreson en Lucerno kaj rememoris propran viziton en tiu urbo.

Post Rekviema Meso en la Romkatolika Preĝejo Sankta Maria en Okci-

denta Melbourne, ŝi estis enterigita en la Tombejo ĉe Box Hill (21/5). Bedaŭrinde, ĉar ŝi postvivis la plimulton de E-samtempuloj, ĉeestis nur 3 M.E.S.-anoj inter la funeŝrantoj.

—F. Koppel.

(Dank' al multe da informo ricevita de I. T. Maddern).

AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTH:** Je 1/5 D-ro Einihovici parolis pri la fondo de la unua E-societo en Rusujo. Li ankaŭ raportis ke la Ligo skribis al Prof. R. Robertson, petante \$350 por sendi junulon Blair Silverlock al la kongreso en Sidnejo kaj ke Prof. Robertson promesis tiun sumon.

Survoje al Eŭropo, S-ro W. Chandler alvenis 22/5 en Fremantle per la ŝipo "Leonid Sobinov". Ges-roj C. Dean regalis la gaston kaj grupon da membroj, kiuj venis por saluti la vizitanton.

Je 5-a de junio D-ro Einihovici rakontis pri la nuna stato de la E-movado en Rusujo kaj ke la "Brita Enciklopedio" dediĉas por la unua fojo unu paĝon al Esperanto. Ni ankaŭ aŭdis raporton pri la vojaĝo de Ges-roj Dean, kiuj nuntempe vojaĝas tra Kvinslando.

● **ADELAIDE:** Nia malgranda grupo denove kunvenis en la Universitato (27/6). S-ro George Clark klarigis la efikon sur plantojn dank' al la alparolado de homoj dum ĉi ties prizorgado.

—R. Felby.

En la junia numero de la anglalingva revuo "Australian Vegetarian" aperis artikolo pri Esperanto verkita de S-ro R. Felby.

● **MELBOURNE:** La 30-an de aprilo okazis vespero de lumbildoj. Errol Chick montris bildojn pri Lucerno, May Frogley pri vizitoj al la Kanariaj Insuloj, Ges-roj Koppel pri vojaĝo al Alice Springs, Ayer's Rock kaj al Ross River kaj S-ro Marshall Cohen pri kamparaj pejaĝoj de Viktorio.

S-ro S. Stepanov (7/5) parolis pri la E-movado. Li mem ne kredas, ke iam la tuta homaro parolos E-on; pli kredeble la civilizacio pereos antaŭ ol tiu celo esto, atingebla. Do, la esperantistoj ĝuu laŭeble la E-istan vivon. Pligrandigo de niaj

vortaroj signifas evoluon de la lingvo, sed P.I.V. estas hereza — multaj anksvoj idistaj laŭ deveno. Ĝi tamen respeguligas la vivon kaj laboron de la lingvuzantoj.

Je 14/5 S-ro H. Koppel daŭrigis sian priskribon pri spertoj kiel "gasto de George VI-a dum la milito". "Kien iris Jesuo Kristo," estis la temo de prelego de S-ro M. Cohen. La demando esploras la religian bazon komunan al multaj sudamerikaj kaj pacifikinsulaj kulturoj. (21/5).

S-ro E. Chick (28/5) montris dia-pozitivajn kaj parolis pri rondveturado ĉirkaŭ la Norda Insulo de Nov-Zelando. S-ino Fay Koppel (4/6) atentigis, ke en aŭgusto okazos la 90-a reveno de la naskiĝdato de Prof. D-ro Edmond Privat, grava E-pioniro. Ŝi skizis la vivon kaj laboron de Privat kaj aŭdigis sonbendon kun ties voĉo, registrita de S-ro Ralph Harry en 1955.

● **MALVERN, Vik.** Je la 16-a de junio la Malvern-Grupo festis la 20-an datrevenon de fondiĝo. 37 personoj, inklude nunajn kaj eksmembrojn, kiel ankaŭ vizitantojn el aliaj grupoj, kunvenis en la domo de la Kvakeroj, por partopreni bone organizitan, tripartitan feston. En la unua parto, Don Pescod, la nuna prezidanto, prezentis la Honorgaston, S-ron Ralph Harry, kiu, post muzikaj programeroj alparolis la aŭdantaron laŭ la temo "Kial mi restas Esperantisto?". Post refreŝiga manĝeto, S-ino Barbara Podmore esprimis dankon per donaco al S-ino A. Paling, grup-vidantino ekde fondiĝo. Gajiga konkludo al sukcesa festo estis horo de popol-dancado.—F.K.

● **SYDNEY:** Je 14/5 D-ro W. Gassner parolis pri Esperanto kaj aliaj lingvoj. Ekzistas 3,000 lingvoj en la mondo, el kiuj 200 havas literaturon. Esperanto estas logika kaj ĝiaj vortoj tute fonetikaj. La skribformoj de la lingvoj estas multaj kaj diversaj.

Shirley Fanos, 21/5, montris lumbildojn pri "Printempo en Britujo". Irinte norden, ŝi vizitis la Roman muron de Hadrian. Ĉu la vetero estis suna aŭ pluva, la pejzaĝo ĉiam aspektis bela.

Je 28/5 ni bonvenigis ŝo Isobe el Tokio, kiu antaŭ 9 jaroj loĝis en Sidnejo. Eĉ nun, l'a pli juna filino uzas aŭstralajn esprimojn. Preleganto estis Jim Harwood, kiu parolis pri "Kork-Tiriloj". Ĉiam kiam li vizitas novan hotelon kaj aĉetas trinkon, li petas korktirilon. Ili kaŝe trovas lokon en internaj poŝoj de liaj jakoj Robbie Robertson montris, 4/6, lumbildojn pri Skotlando kaj la norda parto de Anglujo. "Satire al Nov-

Zelando" estis la temo de prelego de Tom Elliott je 11/6. Li tre ŝatis Auckland Per luita aŭtomobilo li veturis suden, dum pluva vetero al Wellington. Li kaj lia edzino esploris faman "Milford Sound". La ferio ĉesis en Christchurch, de kie ili reflugis al Sidnejo.

—M. Chaldecott.

● **MANLY:** En la Vespera Lernejo komenciĝis, 29/5, la 2-a Trimestro. Ĉi-marde 7-8, 30-a Prof. R. Robertson instruas altgradulojn, Marjorie Duncan progresantojn, kaj Arthur Cocking komencintojn. Je 8.30 la grupetoj kuniĝas por sociata programo.

Gojigis la klubanojn ricevi de S-ino Lily Goldsmith, kiu lastatempe transloĝiĝis, multampleksan kolekton de altvaloraj libroj por nia biblioteko. La malavara donaco memorigos nin ne nur pri Lily mem, sed ankaŭ pri nia kara "Tiny", kiu dum sia vivo multe antaŭenigis la E-movadon. Plua feliĉa okazaĵo estis la vizito (29/5) de S-ro S. Issobe, kiu kun la familio loĝis en Manly antaŭ 9 jaroj, kaj faris multon ĉi tie por montri al la publiko la praktikan valoron de Esperanto. La kvar membroj de la familio nun estas dumvivaj membroj de nia klubo, kvankam ili loĝas en Tokio.

— Marjorie Duncan.

22nd AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

Jan. 2-9 — Sydney

This congress will be held at the St. Paul's College of Sydney University. It will again be a "Live-in Congress". Congress members will be accommodated in comfortable one-bed rooms.

Congress Fee: \$15.00

Full Board from lunch 2-1-1980 till breakfast 10-1-1980: \$200.00

Mail your Congress Fee to the Treasurer, **Mrs. E. Matasin, 1 Coorabin Rd., Northbridge, 2063.** Add at least \$10 for room deposit and a stamped, addressed envelope for your receipt.

Second List of Congress Members:

29. M/s. J. Harness, Sydney
30. Thora Thomas, Sydney
31. Shirley Fanos, Sydney
32. Alice Longson, Perth
33. C. Strochetter, Pyengana, Tas.
34. Barbara Pennington, Launceston, Tas.
35. Ralph Harry, Canberra
36. Mac Le Fevre, Launceston

37. Pat Le Fevre, Launceston
38. Chris Le Fevre, Launceston
39. Edna Giles, Manly
40. M/s. M. Lees, Sydney
41. Mrs. M. Rosza, Orange, NSW
42. Alan Towsey, Tahmoor, NSW
43. M/s M. McLeod, Sydney
44. Don Rogers, Melbourne
45. Eunice Graham, Manly
46. Kay Morrison, Manly
47. Joan Green, Sydney
48. Marjorie Duncan, Manly
49. Thelma Smith, Sydney
50. Les Scott, Manly
51. Bess Scott, Manly
52. Arthur Cocking, Manly
53. Ivan Maddern, Morwell, Vic.
54. Barbara Stauroulakis, Sydney
55. Hilda Banham, Clontarf Beach, Qld.
56. Don Pescod, Melbourne
57. Beryl Pescod, Melbourne
58. Cherry Willis, Sydney
59. V. Timmins, Sydney
60. Carson Thomas, Toowoomba, Qld.
61. Jean Lehane, Toowoomba
62. Tom Elliott, Sydney
63. Mavis Elliott, Sydney
64. Peg. Ford-Lewis, Manly
65. Dr. Keith Bowling, Sydney
66. Jonathan Cooper, Manly
67. Isabelle Hove, Manly
68. Joan Boyce, Sydney
69. Marcel Leereveld, Belgrave, Vic.
70. Ali Leereveld, Belgrave, Vic.
71. Ray Ross, Brisbane
72. Peggy Ross, Brisbane
73. Elsie Taylor, Brisbane

State Distribution: N.S.W. 42, Victoria 11, Queensland 9, Tasmania 5, A.C.T. 3, Western Australia 3.

1-a BUI/TENO PRI LA KONGRESO

1. Se vi ne loĝos en la Kolegio kaj bezonos manĝojn, skribu al la L.K.K. antaŭ novembro.
2. Oni sugestis Junularan Vesperon anstataŭ Film-Vespero. Ges-ro Guy (Rockhampton) akceptos vian helpon.
3. Se vi deziras kvitancon por viaj pagoj, nepre sendu afrankitan koverton.
4. La tuttaga ekskurso (i) al Richmond/Windsor iros al loko kun multhistoria intereso. Ekskurso (ii) sur Rivero Hawkesbury komenciĝos per trajno; de la pramo ni vidos belan riveron, kaj luncos en riverborda loko.
5. Baha'i religio estiĝis en Persujo. Ni vizitos la aŭstralian templon, kie okazos mallonga neŭtrala Diservo.
6. La grupoj en Brisbane. Manly kaj (Daŭrigo sur p. 232.)

RECENZOJ

Recenzas Probal Daŝgupto (Lingvistika Fako, Nov-Jorka Universitato; Angla Fako, Universitato de Melburno)

Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto, de John Wells. Rotterdam: UEA, 1978.

Jen la unua provo kohera klarigi al la esperantista legpubliko, kio estas la moderna lingvoscienco, kaj kiel Esperanto aspektas al moderna lingvosciencisto. La eseojn, el kiuj la libro konsistas, Wells prezentis en ilia malneta formo enkadre de la I.S.U. en la atena Universala Kongreso en 1976. La nuna, pligrandigita formo de la verko spegulas esplortrovajn de lingvosciencistoj inter 1976 kaj 1978. Kiel en la modela gramatik-prezento komence de lia dudirekta Esperanta-angla vortaro, tiel ankaŭ en ĉi tiu ĝisdata esaro John Wells tute koncize eksplikas al neinformita leganto rezultojn de la modernaj fonetiko, morfologio, sintakso kaj leksikologio. Ĉar ni ofte preparolas nian lingvon kun nemovadanoj, varbece aŭ ne, dezirindas do, ke ni ne restu ĝenerale analfabetaj pri la elementa strukturo de nia lingvo fone de la strukturoj de aliaj lingvoj. Jam de longe ni havas valoran verkon, kiu lokas Esperanton inter la planlingvoj (**Planlingvaj Problemoj** de Gilbert) — verkon, kies legon Wells rekomendis antaŭ longe al Esperanto-propagandemuloj. Nun, dank' al Wells mem, ankaŭ de informiĝo pri la loko de Esperanto inter la **naturaj** lingvoj fortunos nin nur la mallaboremo; li ŝtopis per ĉi tiu verko gravan breĉon sur nia breto.

Lingvaje la libro estas preskaŭ preterdiskute bona — oni povas maksimume demandi sin, ĉu la esprimo "universalaĵo-kandidatoj" (p 13) ne estu prefere 'supozeblaj universalajoj, 'kandidataj universalajoj' aŭ simile. El la multaj trafaj esprimproponoj min aparte imponis la vorto **evolulingvo** (p 58).

Lingvistike la verko ŝajnas al mi kritikinda nur en kelkaj lokoj. Ekzemple, Wells taltalige proksimiĝas sur p 46 al konstato de la ligo inter prepozicioj kaj verboj, sed li ne faras la konstaton, nek aludas al la verbdevena prepozicio **far**. La prezento pri modoj sur p 59 spegulas teorion tute ne ĝenerale akceptatan, kio estas surpriza disiro de la kutima strategio de Wells eviti esprimon de privataj opinioj. La historio de la lingvoscienco

sur p 12 samtempe tro emfazas la okcidentan kontribuon (ignorante, ekzemple, ke gramatikaj analizmetodoj aziaj multe influis unue la fonetikon kaj poste la sintakson en la moderna okcidenta esplortradicio) kaj per tro abstrakta kvazaŭneŭtraleco priskribas la objektivajn kondiĉojn, sub kiuj floris 'la tri sciencaj sintenoj' (malatentante la frapan kaj multaspektan koincidon inter tiuj fazoj unuflanke kaj la fazoj en la historio de la eŭropa projekto domini la globon aliflanke). Ankoraŭfoje temas pri prezentado de opinioj de Wells anstataŭ trovajoj de la historiistoj de la lingvoscienco.

Resume, tamen: tre havinda libro; tiel rigoran prezenton de la elementoj de la lingvoscienco multaj naciaj lingvoj ne havas.

Havebla ĉe A.E.A. Libro-Servo. Prezo, \$9.60.

STEP BY STEP IN ESPERANTO de Montagu C. Butler. Eldonis "The Esperanto Publishing Company". Klare presita, bele bindita, kun plastika polvŝirmilo, 280 paĝoj. \$6.00 ĉe A.E.A. Libro-Servo, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW. 2036.

Fine aperis la longe atendata represo de tiu bone konata, enhavriĉa lernolibro, kiu atingis sian okan eldonon jam en 1965. En unika maniero, interplektante utilan ĝeneralan informon kaj multe da humuro, la aŭtoro de ĉi tiu ampleksa studlibro detale esploris ĉiun aspekton de la Esperanto-gramatiko.

La aŭtoro mem priskribis la verkon simpla lernolibro, kiu konsistigas nuran elementan kurson. Simpla ĝi ja estas por praktika uzado, sed fakte la studento, kiu konsciece tralaboras la enhavon fariĝas jam progresinto.

La eldonistoj estas gratulendaj pro la granda kaj multkosta penado, kiu disponigas al la legantaro trezoron nemalhavendan, egale por lernantoj kaj instruistoj — F. K.

BONAN TAGON de Mabel Wybenga, 44 p., broŝ., \$1.80 ĉe A.E.A. Libro-Servo. Ĉi tiu kurso, kiu jam spertis grandan sukceson kiel Radio-programo en Gippsland, (Vik.) kaj Kvinslando, kaj nun estas adaptita por uzo kiel lernolibro por komencantoj, taŭgas por privata studado, por koresponda kurso aŭ por uzo en lernejo-klaso. La lerta prezentado de la aŭtorino estas vere gratulinda kaj la libreto forte rekomendata.

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

1. Professor R. G. Robertson

(continued)

Last month we left Robby on his reluctant return to England. He remained but briefly in London, being offered the position of senior stressman in a helicopter factory in Somerset. What is a stressman? Well, this particular job involved the testing of American helicopters designed by Sikorsky and proving to the authorities that the machines were airworthy. None of the helicopters he "stressed" ever fell apart, though most of the pilots whom Robby knew were killed. There was plenty of toil, for every job was needed "last week", so much overtime was involved. Also, the stresser had to be an observer on all test flights to prove his confidence and bona fides.

Generally, the machines were classified as "military". They couldn't lift much, but great girders made of balsa wood and painted rust colour proved most useful loads on spectacular public demonstrations. Three strengthened craft should, perhaps, have been termed "agricultural" for they were specially made for King Farouk to sow his wild oats.

Luckily for us, despite the toil, there was little wealth: so Robby, who had £10 to spare, decided to accept passage as an assisted migrant to Australia. Hency Robby, with Margaret and two children and no job, were back in the land of opportunity.

Opportunity soon knocked. After 6 weeks, Robby applied to the New University of Technology, and to his surprise — almost alarm, for he was to lecture in subjects whose very names were new to him,—he was accepted. Being a born — though not a trained—teacher, and a man of infinite resource, Robby soon found that he could teach, not just with skill, but with intense satisfaction.

But opportunity knocked again — this time with a knock-down blow. At the age of 39, ever eager Robby, forgetting that he was not the same man that he had been 18 years before when he was in the University Jiu Jitsu Club, volun-

teered as instructor to the newly formed Judo Club. Alas, a strong young man threw him, and damaging his spine, hurled him into being a paraplegic. Although resigned to spending his life in a wheelchair, Robby was not prepared to eke out his life as a pain-wracked misanthrope. He grasped his opportunity and used this 8-year period to read, reflect and improve.

Perhaps this is why he can — and will—cheerfully and learnedly discuss almost any topic—especially a literary one. He seasons his conversation with Shakespearianisms and cites Scripture like the Devil. During this period he also worked on his Master of Engineering degree to supplement the M.A. he gained in Oxford.

With an excess of modesty, Robby claims that it was because of making a profound discovery that he became the patient, smiling man we know. He says that he discovered that the patient, smiling patient received better attention than the impatient, snarling one, hence his cheerful mien. My guess is that he was uncomplaining and sympathetic **before** the great discovery.

In 1964 a specialist from South Africa operated on him. After the operation he was at last released from pain, and could even walk up the street. Now, freed from pain and from the fear of death (he had, under general anaesthetic, gone down into the "Valley of the Shadow" so often that its threat had become defused), he could resume "normal" life, though some health problems persisted. In fact, they still persist.

For many years, 3D photography cum educational films had been a hobby so Robby became well known in this field and the University of N.S.W. (formerly Uni. of Technology) began teaching by T.V. Robby, who had been Senior Lecturer for several years, was created Associate Professor of Mechanical Engineering. This post he retained until he "retired" in 1977, to gain a little more money and a little more time to spend.

Not much, of course, for he does part-time lecturing, has an Esperanto class in Manly (where he is Vice President of the Club), and another at the Wesley Centre School for Seniors, takes sailing lessons, is an active member of the Art Gallery Society, dictates for the Talking Books movement, and in his "spare" time reads about six books per week in biography, history, art and science fiction.

Nowadays, in a life uncluttered by T.V. and the commitments of a 5-day-a-week job, he can, with satisfaction and contentment, sit in his pleasant modest garden, at his pleasant, modest home, in a pleasant modest suburb of Sydney, and enjoys the satisfaction and contentment of playing with his four grandchildren.

Next issue? Guess who.

—A. Cocking.

NUN HAVEBLAJ ĈE LA A.E.A. LIBRO-SERVO

Bonan Tagon	Mabel Wybenga	
44b		\$1.80
Brand Hendrik Ibsen	T320b	11.25
Pri Lingo kaj Aliaj Artoj	W. Auld	
N215b		9.65
Je la Flanko de la Profeto		
I Chiusi	R362b	17.15
La Nova Butikisto de Nukugaia		
kaj Aliaj Noveloj	B. Potts	
N250b		8.05
Luño de Orienta Eŭropo	V. Beekman	
P48b		1.25
La Perdita Honoro de iu Katrina	Blum	
H. Boll	N154B	6.00
Malmalice	J. Valano P60b	6.60
Primico	R. Tagore P114b	5.65
La Trofeo	Jose Maria de Heredia	
P220b		6.45
Cu Li Bremsis Sufiĉe	J. Valano	
N128b		6.45
Lingvistikaj Aspektoj de E-o		
John Wells	76b	9.60
Mendu ĉe A.E.A. Libro-Servo		
8 Lone Pine Parade		
Matrville, N.S.W. 2036		

"Oni ne havas edziĝojn en la ĉielo," diris pastro dum festeno al juna sinjorino, "ĉar tie oni ne trovas virinojn".

"Ne, ne tio estas la kaŭzo" respondis la sinjorino, "estas sufiĉe da virinoj tie, sed oni ne povas trovi pastron por edziniĝi ilin".

The Esperanto Publishing Co. LIBROLISTO

Fundamenta Krestomatio (D-ro L. L. Zamenhof)	\$6.80
Kanako el Kananam (K. G. Linton)	\$2.80
Kien la Poezio? (Brendon Clark)	\$2.80
Vivo de Zamenhof (D-ro E. Privat)	\$5.00
Gaja Leganto per Esperanto (P. E. Schwerin)	\$0.60
Esperanto por Infanoj (G. Gladstone Solomon)	\$0.90
The Esperanto Teacher (Mason Stuttard)	\$0.90
A Practical Course in Esperanto (F. Szilagyi)	\$1.00
ĵus aperis:	
Step by Step in Esperanto (M. C. Butler)	\$6.00
8-a eldono (reprezo 1979)	
Mendu ĉe A.E.A. Libro-Servo	
8 Lone Pine Parade, Matrville, 2036	

(Daŭrigo de p. 229.)

- Perth partoprenos la Draman Konkurson. Aliaj grupoj estas invitataj.
7. Grupoj de 15 personoj rajtas ricevi 10%-an rabaton de TAA. Kontaktu vian urban TAA-oficejon unu monaton antaŭ via vojaĝo.
 8. Kun ĝojo ni povas anonci ke S-ino Bertha MacSmith, antaŭa estrino de CWA akceptis nian inviton al la Inaŭguro.
 9. ORE-anoj povos partopreni en antaŭmatenmanĝa ekskurso al Centennial Park, kie estas multaj birdoj.
 10. Nur financaj A.E.A.-membroj rajtos voĉdoni en la aferkunsidoj.

LA POST-KONGRESO EN "HOTEL MANLY"

Vere URĜAS tuj mendi ĉambron por nia 4-taga feria renkontiĝo (Jan. 10-14, 1980). Se ankoraŭ havebla, la kostoj estas; 1-lita ĉambro \$19; unu lito en 2-lita ĉambro \$12; unu lito en 3-lita ĉambro; \$11 (por ĉiu nokto sen manĝoj).

Sendu \$10 al Manly Esperanto Club, P.O. Box 415, Manly, 2095.

The Australian Esperantist

(Successor to *La Suda Kruco* and *La Rondo*)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$12.
(Individual, family, club, federation and pensioner)
Full-time Students \$8



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063
Sekretario/Kasisto: S-ro L. V. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W. 2095
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 172 (252)

MELBOURNE

Julio-Aŭgusto, 1979

KIAL MI RESTAS ESPERANTISTO

Parolado de Ralph Harry
la 16-an de Junio, 1979,
je la okazo de la 20-a datreveno
de la Esperanto-Grupo de Malvern

Ofte en niaj gazetoj ni legas artikolojn kaj intervjuojn pri la temo: "Kiel mi fariĝis Esperantisto". Famaj kaj eminentaj personoj rakontas pri la cirkonstancoj en kiuj ili fariĝis Esperantistoj. Ili rememoras kiel iu libro, aŭ oratoro aŭ ĉarma amiko konvinkis ilin, ke la mondo bezonas komunan lingvon, kaj persvadis ilin eklerni Esperanton. Ofte la decido estis rezulto de idealisma impulso, kelkfoje de simpla hazardo. Sed tiuj el ni, kiuj ne lernis Esperanton ĉe la patrina genuo — tio estas la plej granda parto de la zamenhofa popolo — faris konscian decidon. Kaj ni bone memoras la momenton, kiam ni Esperantistiĝis, kaj kial. Mi mem lernis pri la internacia lingvo per radio-dissendoj, sed mi neniam komencus la studadon de la lingvo, se mi ne konatiĝus, unu vesperon apud Krista Kolegio en Hobarto, kun studento de teologio, Cedric Cowling. Oni avertis min, ke Cedric estas fanatikulo pri Esperanto, tute enuiga persono. Sed mi deziris aŭdi pri la afero, kaj tio decidis mian sorton! Mi tuj entuziasmiĝis.

Sed hodiaŭ vespere mi elektis alian temon. Mi penos respondi al alia demando — demando, kiun eĉ la plej fervora Esperantisto metas antaŭ si de tempo, al tempo, kaj kiun ni devas respondi se ni deziras klare vidi nian celon. La demando estas ne kiel aŭ kial

mi fariĝis Esperantisto, sed kial mi restas kredanto pri la internacia lingvo, kaj daŭre ĝin praktikas kaj uzas.

La kutimo?

Mia sekretario diris al mi antaŭ nelonge, ke mi ne agas livervole, ke mi ne povas ĉesigi mian agadon, ke Esperanto estas drogo, halucinanta aŭ sklaviga, el kies narkota efiko oni ne povas eskapi . . . same kiel laŭ Markso religio estas la opio de la popolo. Ĉu ŝi pravas? Certe la kutimo ludas rolon por maljuna Esperantisto. Estus malfacile malkredion, kio dum kvardek jaroj estis esenca parto de lia kretardo. Sed oni ja povas perdi sian kredon. Oni povas forlasi eĉ la drogon alkoholon, se oni havas fortan volon kaj bonan kuraciston. Fakte mi kredas, ke Esperanto ne estas forta drogo sed kapklariga trinkaĵo! Mi kredas, ke mi agas sanmense kaj libervole. Do, kial mi, libera homo, daŭrigas mian studadon kaj uzadon de lingvo artefarita, lingvo parolata fare de nur kelk-miloj da personoj, lingvo, kiun multaj primokas, aŭ konsideras sensenca sonĝo aŭ signifiva iluzio? En jardeko, kiam kelkaj cinikuloj deklaras, ke la Bona Dio mortis, ĉu estus surprizige, se eĉ honestaj dubantoj kredas, ke Esperanto estas morta lingvo? Sed kontraŭe mi atestas, ke Esperanto vivas kaj viglas, kaj mi portas la verdan stelon. Kial?

Utileco?

Por kelkaj sufiĉas, post la lerno de Esperanto, ke ĝi estas amuza kaj utila. Per Esperanto ili povas kolekti poŝtmarkojn, aŭ bildkartojn aŭ plumamikojn. Ili povas korespondi kaj lerni pri fremdaj landoj kaj foraj personoj. Ili povas vojaĝi pli facile dank' al la servoj de la delegitoj de UEA, kiuj bonvenigas ilin en la stacidomo aŭ flughaveno, kaj kiuj aranĝas ĉarman malmultekostan loĝejon. Certe tiaj personaj interrilatoj, per vizitoj aŭ per la kamaradeco dum ekskursoj en Universalaj Kongresoj riĉigas la vivon, kaj estas sufiĉa motivo por traŭerno kaj sporada uzado de la lingvo. Mi mem povas atesti, ke la delegita reto estas tre utila — mi kaj mia familio tion spertis en Svislando kaj Francujo, en Germanujo kaj Belgujo — kaj mi gajnis multajn amikojn en kongresoj en Aŭstralio kaj Nederlando en Danlando kaj Jugoslavio kaj Islando. Sed mi sincere dubas ĉu mi estus povinta dediĉi mian vivon al poŝtmarkoj aŭ korespondado aŭ turismo, aŭ ekskursoj.

Edziĝoj?

Kompreneble kelkaj Esperantistoj, dum sia vojaĝado, kolektas ne memorajojn aŭ pupojn, sed vivpartnerojn. Kiam mi estis en Germanujo mi renkontis tri Esperantistojn kiuj kolektis japanajn edzinojn! Mi estis atestanto por belga amiko kiu edziĝis kun sia kara kolektito en Luksemburgo! Por tia paro Esperanto estas utila, eĉ necesa, ĉar ili havus gravajn malfacilaĵojn se ili ne povus daŭre uzi Esperanton inter si kaj kun la infanoj kiel komunikilon. Sed geedziĝo ne estas ofta situacio kaj motivo por la uzado de nia lingvo. Persone mi povas komuniki kun mia edzino per la angla — kvankam ŝi komprenas ankaŭ Esperanton. Tamen mi daŭre uzas Esperanton. Denove la demando — kial?

Lingvistiko?

Kelkaj eminentaj Esperantistoj asertas, mi kredas honeste, ke por ili la lingvo mem estas tia plezuro, ke ĝi mem estas sufiĉa motivo. Mi ne estas lingvisto, tamen mi komprenas la fascinon, la sorĉon de Esperanto de lingva vidpunkto . . . ĝia logikeco, ĝia kapablo esprimi nuancojn, la belsono de Esperanto parolata, deklamata, kantata. Mi multe ĝuas la defion de malfacila tradukenda prozo, de malfacile esprimibla poezia penso: Mi tre ĝuas la sporton de vortludado, de kalemburoj, metatezoj, kontraŭknaĵoj kaj anagramatiko. Mi estas humila disĉiplo de la majstra ŝercisto, Raymond Schwartz. Jes, oni povas ami Esperanton, kiel genian lingvan kreaĵon. Sed la vivo ne estas ludo, bedaŭrinde.

Literaturo ?

Tre multaj Esperantistoj opinias, ke la literaturo de nia lingvo estas ĝia plej grava faceto. Ili serioze atestas, ke Esperanto valorus la laboron de lernado eĉ se oni atingus nur komprenon de la literaturo. Certe en kelkaj landoj estas Esperantistoj kiuj neniam povas vojaĝi, neniam partoprenis en Universalaj Kongresoj, sed kiuj tre ŝatas la lingvon pro la literaturaj verkaĵoj. Ili legas la originalajn poemojn de Kalocsay, de Baldu Ragnarsson, aŭ de Marjorie Boulton. Ili ĝuas la romanojn de Szilagyí aŭ Forge. Aŭ ili miras pri la bonegaj esperantaj tradukoj de la ĉefverkoj de fremdaj literaturoj, ne alireblaj aŭ malfacile troveblaj en sia patrina lingvo. Sed mi kredas, ke malmultaj Esperantistoj aĉetas pli ol tri aŭ kvar librojn en unu jaro kaj efektive kiom da libroj estas esenca parto de nia vivosperto? Kiam mi rigardas la proksimume cent librojn sur mia verda breto kaj ekzamenas mian konsciencon, mi devas konfesi, ke kvankam ĉiuj amuzis, aŭ miregis aŭ pensigis min, malmultaj vere min emociis.

Du Libroj

Sed du libroj vere influis rekte mian vivon, kaj enhavas le sekretojn de mia fervoro kaj fideleco rilate Esperanton. Eble vi povas diveni almenaŭ unu de tiuj influhavaj libroj, kiujn laŭ mia opinio ĉiu Esperantisto devas ne nur posedi, sed legi kaj relegi kaj preskaŭ parkere koni.

La unua libro estas "**Vivo de Zamenhof**", verkita en 1920 de la nobla svisa Esperantisto kaj humanisto, Edmond Privat. La redaktoro de la tria eldono skribis, ke ĝi estas "Klasika" verko, "nepre leginda (kaj legenda) de ĉiu bona Esperantisto". Mi ne havis la honoron vidi la Majstron, Zamenhof, sed mi konatiĝis kun Privat en 1953 en Genevo, kaj mi sen rezervo kredas la bildon, kiun li vortopentras pri Zamenhof. La vivo de Ludoviko Zamenhof inspiras, sinsekvajn generaciojn de Esperantistoj. Eble vi rememoras tion, kion Zamenhof diras, dum la dua Kongreso en Genevo, pri la kredo, kiu stimulis lin krei internacian lingvon. Mi citos kelkajn liniojn: "ĉu la plej grandaj mensogoj kaj kalumnioj povus doni tiajn terurajn fruktojn, se la gentoj sin reciproke bone konus, se inter ili ne starus altaj kaj dikaj muroj, kiuj malpermesas al ili libere komunikigadi inter si kaj vidi, ke la membroj de aliaj gentoj estas tute samaj homoj kiel la membroj de nia gento, ke ilia literaturo ne predikas iajn terurajn krimojn, sed havas tiun saman etikon kaj tiujn samajn idealojn kiel nia? Rompu, rompu la murojn inter la popoloj!"

Oni ne povas legi pri la vivo de Zamenhof — lia persistemo, spite al mokado — lian sindonemecon — lian nekonkereblan fidon — sen la konvinko, ke la ideo kiu motivis lin, kaj la lingvo, kiun li donis al la mondo, estas nepre akceptendaj kaj subtenendaj ankaŭ de ni. Mi citos nur unu paragrafon pli — kiu donas la respondon de Zamenhof al nia demando de ĉi tiu vespero. Ĝi venas ankaŭ el la parolado de 1906 kaj troviĝas en la historio de Privat. Zamenhof diris:

“Se la unuaj Esperantistoj pacience elmetadis sin ne sole al konstanta mokado, sed eĉ al grandaj oferoj . . . ĉu ili ĉiuj faris tion ĉi pro ia praktika utileco? . . . Ho, ne, ne, ne! Ĉiuj memoris nur pri la interna ideo, entenata en la Esperantismo; ĉiuj ŝatis Esperanton ne tial, ke ĝi alproksimigas la cerbojn de la homoj, sed nur tial, ke ĝi alproksimigas iliajn korojn.”

Jen, do, mia unua respondo. Ni klopodas por Esperanto ĉar Zamenhof klarigis al ni la rolon de komuna lingvo en la faciligo de amikeco kaj paco inter la popoloj, kaj montris al ni la vojon.

Sed mi menciis duan libron. Eble vi ne legis ĝin. Eble vi eĉ ne aŭdis pri ĝi. Sed ĝi ankaŭ estas ĉenero en la sagao de Esperantujo. Ĝi estas “**La Danĝera Lingvo — Esperanto en la Uragano de Persekutoj**”. La aŭtoro estas Ulrich Lins. Eldonis la libron L’Omnibuso en Kioto en 1973.

“La Danĝera Lingvo:” priskribas la persekutadon de esperantaj organizaĵoj, de individuaj esperantistoj, de la lingvo mem, fare de la faŝistaj kaj komunistaj diktatoroj, ĉefe inter la unua kaj dua mondmilitoj. Ĝi informas nin pri la mar-

tiroj de nia movado — pri tiuj ofte nekonataj Esperantistoj kiuj rifuzis ĉesigi sian agadon por internacia interkompreno, kiuj rifuzis uzi Esperanton por faŝista kaj sovenista nazia propagando. Kelkaj estis ankaŭ judoj kaj socialistoj en la germana Tria Regno. Kelkaj estis ankaŭ demokratoj en diktatoraj landoj. Sed ili suferis, malliberiĝis eĉ mortis, ĉefe pro la fakto, ke ili estis Esperantistoj, kiuj kredis je internacia amikeco, pri homaranismo.

Kiam mi dubas, ĉu Esperanto meritas konstantan subtenon, kiam mi devas decidi ĉu dediĉi tempon kaj energion al ĝia antaŭenigo, mi relegas mian ekzempleron de “**La Danĝera Lingvo**”. Kaj poste, pli humila, mi ne povas ne daŭrigi mian modestan laboron.

Sed mi havas trian respondon al nia demando. Mi restas Esperantisto ne nur pro la nobla idealo de Zamenhof, ne nur pro la oferoj de niaj martiroj, sed ankaŭ ĉar ĝi estas la lingvo de la estonteco. La Ĝenerala Direktoro de UNESKO estas nun nia amiko en Parizo. Kaj ĉie en la mondo mi vidas junulojn, kiuj entuziasme akceptas la ideon de Esperanto — en la Universitato de Tasmanio, en la Kvakera Lernejo en Hobarto, en Laŭncestono, ĉi tie en Malvern, en Melbourne. Tiuj junuloj bezonas instruistojn, gvidantojn, mecenatojn.

Mi gratulas la Grupon de Malvern pri ilia 20-a datreveno. Mi ĝojas eĉ pli pro la fakto, ke ili starigis fonduson por helpi junulojn partopreni en tutlandaj kaj regionaj kongresoj. Tio estas tre grava paŝo, ĉar inter tiuj junuloj eble estos alia Zamenhof, alia Privat, alia Rytkov, alia Tonkin.

LA PLENA ILUSTRITA VORTARO KAJ NIA FELIĈO

Vi, certe, volas esti pli feliĉa. Ankaŭ mi. Vi amas Esperanton kiel virgan floron, kiel printempon. Same mi. Sed, al mia ĉagreno, baldaŭ post la esperantigo, mi notis ke ne ĉiuj homoj posedas la identajn amon kaj intereson al Esperanto, kiel vi kaj mi.

Ofte, ni devas tre multe propagandi kaj varbi ĝis ni sukcesas organizi Esperanto-kurson. Aldone, ofte okazas, post kiam la lernantoj komencis la studon, multaj el ili ĉesigas la lernadon kaj, kiel regulo, estas malaperintaj el la movado. Ĉar la akirado de scio postulas disciplinon, forton de la volo, persistemon; kaj ne multaj personoj havas tiajn kvalitojn.

Tio estas la ĉefa kaŭzo, ke post 90 jaroj da ekzisto de Esperanto ni havas, proksimume, nur 50,000 da organizitaj esperantistoj. Zamenhof revis pri la dek milionoj. Ni ankaŭ.

Sed verŝajne, dum nia vivo tia kvanto estos neniam atingita. Inter alie, ni lernas Esperanton ne nur por agiti pri la lingvo aŭ propagandi ĝin. Ni memorigis parkere vortojn kaj la gramatikajn regulojn por, poste, profiti el tiu memoro.

Do, estante la homo praktika, mi konsilas al ĉiu esperantisto plene ĝui la vivon en Esperantujo, uzante ĉiujn rimedojn kiuj troviĝas al nia dispono: legadon, korespondadon, renkontojn, la

internan ideon de Esperanto. Sed, por fari tion sukcese, ni bezonas havi bonan gramatikon kaj bonan vortaron.

Certe, ni jam havis grandan nombron da vortaroj. La negativa parto de tiuj vortaroj estis ilia nesuficeco por kompreni modernan libron, por skribi bonstilan leteron aŭ por senerare konversacii en niaj rondoj.

La eldono de la "Plena Ilustrita Vortaro" fare de Sennacieca Asocio Tutmonda indikas la transiron al nia nacia renaskiĝo. La vortaro estas dika volumo de 1300 paĝoj.

Pri ĝia grandeco mi povas diri la samon kion diris Kalocsay pri sia "Plena Gramatiko de Esperanto": "La unua sento, kiu verŝajne atakos la leganton ĉe la ekrigardo al tiu ĉiu libro, estos la timo, kaj lia unua penso amara bedaŭro pri la liliputa 16-regula gramatiko de 1888. Li konsoliĝu pensante, ke ankaŭ li mem ne povas survesti sian unuajaran pantalonon, kaj ke tiu ampleksiĝo de la gramatiko nenion alian signifas krom evoluo kaj kresko de la lingvo. Kaj pri tiu punkto, ni esperas, oni povas nur ĝoji."

Jen kelkaj ciferoj kiuj montras kiel forte ni elkreskis el tiama unuajara pantolono:

En la Unua Libro de la jaro 1887 estis 904 radikoj. En la "Fundamento de Esperanto" de 1905 — 2666. La "Plena Vortaro" de 1953 enhavis 7866 radiokojn. La "Plena Ilustrita Vortaro" eldonita en la jaro 1970 jam havis 15,250.

En la pasinteco, kun ĝiaj arkaikaj vortaroj, ni ĉiuj, iam kaj tiam, estis konsternataj per ekzisto de vortoprovizo en Esperanto, estinta ne en tia kvanto kia estas bezonata, kaj per ne sufiĉe klara difino de radikoj en la lingvo.

La ĉefa afero estas, ke la vortaro permesas al ni konatiĝon kun la esperanta vortotrezoro en ĝia aktuala larĝo kaj riĉeco. Zamenhof inaŭguris Esperanton per sia 904-radika vortareto de la unua libro.

La Sennacieca Asocio Tutmonda iniciatis la novan etapon en la disvolviĝo de Esperanto per sia adoleska, matura kaj kontraŭdira Plena Ilustrita Vortaro. Sed, bedaŭrinde, ĝi enhavas blasfemajn impetojn kontraŭ la Fundamento. Michalskij eĉ nomis la Vortaron "anti-esperanta vortaro". Kio fakte okazis? Kial la parolado pri ĝia herezeco kaj lingvistikaj blasfemioj?

Multajn jarojn antaŭe, Prof. Couturat, kaj unu el la kunlaborantoj de D-ro Zamenhof, S-ro Beaufront, elpensis la dialekton de Esperanto, kiun ili baptis

per la nomo IDO. La mondo esperantista ne akceptis tiun slangon totale, entute. Kelkaj esperantistoj ne volis eĉ aŭdi la vorton Ido.

Sed, poste, kiam emocioj iom trankviligis multaj el niaj samideanoj ekvidis ke la nova idiomo entenas kaj tritikon kaj lolon. Ili decidis kolekti la tritikon, sed forjeti la lolon.

Tiamaniere Esperanto kaj, kun ĝi, la Plena Ilustrita Vortaro ensorbis kaj asimilis multajn idistajn vortojn kaj gramatikajn partojn. Ekzemple la sufikson OZ, kiu indikas la abundecon de konsistiga elemento. Tial nuntempe ni havas en moderna Esperanto la vortojn ŝtonoza anstataŭ ŝtonabunda. Aŭ poroza anstataŭ aeroplana.

Same idista estas la gramatika parto END, sufikso signifanta tion kion oni devas nepre fari. Ekzemple: Tiu letero estas tuj respondenda. Ni havas, ankaŭ idistajn gramatikajn partojn en la vortoj bruliva — kapabla bruli; fumizi fiŝon — provizi ĝin per fumo. Mi ne citu idistajn vortojn en la vortaro. Ili abundas.

La direkto de S.A.T. eklaboris por la efektiviĝo de la Plena Vortaro jam ekde la jaro 1928. La vortaro devus anstataŭigi kaj plivastigi la elĉerpitan vortaron fare de Kabe. Ĝi estu oportuna praktika gvidilo por ordinara esperantistoj.

La gazeto "Sennaciulo" petis prunti por tiu eldonaĵo monumojn. Kaj esperantistoj pruntedonis la monon. La tiama gvidanto de SAT, S-ro Lanti, kontribuis al la kreado de tiu kulmina verko per siaj plej bonaj fortoj. Li ne nur iniciatis tiun ĉi enorman leksikonon, sed ankaŭ donis al ĝi daŭran apogon, per siaj klopodoj, kaj rimarkoj sur la presprovaj-oj, kiujn li zorgis korektis.

La unua Plena Vortaro aperis kiel relative malgranda volumo, kiu estis intertempe kelkfoje reeldonita. Kiel ĝian triumfon kaj maturecon la mondo esperantista, en la jaro 1970, ekvidis la Plenan Ilustritan Vortaron. Mi, kiu travivis pli ol 50 jaroj en la fabela lando de Esperanto, sincere rekomendas al ĉiu esperantisto aĉeti la Plenan Ilustritan Vortaron.

Diras la franca verkisto Anatole France: "Vortaro estas la plej bona, la plej posedenda libro en la mondo. Ĝi entenas ĉiujn aliajn librojn; sufiĉas nur ke la studento sciu eltiri ilin."

Do, aĉetu la vortaron, se vi tion ankoraŭ ne faris, por pli bone scii vian ŝatatan lingvon; por fariĝi pli perfekta esperantisto; aĉetu ĝin por esti feliĉa.

Memoru la poeton Saussure, la aŭtoron de la gramatika regulo pri la sufiĉo kaj neceso de Esperanto, kiu skribis: "Ne atendu . . . ĉiu minuto de la kurta vivo flugas for. Donu vian blovon al la lingvo, kiun amas via pura kor'."

Vere: La Plenan Ilustritan Vortaron oni povas kritiki. Sed, oni ne povas rifuzi ĝin. —S. Stepanov.

ESPERANTO — LA UNUIGA LINGVO

1635 Esperantistoj el 49 landoj partoprenis, inter la 28-a de julio kaj la 4-a de aŭgusto, 1979, la 64-an Universalan Kongreson de Esperanto en Luzern, Svislando. La plej granda delegitaro venis el Francio (205); sekvis Germanio (173), Svislando (160) kaj Nederlando (135). Esperantistoj el Ĉinio kaj Sovet-Unio ĉestis, kiel ankaŭ reprezentantoj el ĉiuj generacioj, de franco, kiu persone renkontis D-ron Zamenhof al 6- kaj 4-jara gefratoj el Usono, kiuj ravis kongresanojn per lerta violin-ludado dum la koncerto.

Deksep aŭstralianoj partoprenis kaj ĉe la **Oficiala Malfermo** AEA-Sekretario/Kasisto Les Scott bondezire salutis la kongresanaron nome de la Aŭstralia Movado.

La kongreso okazis en la moderna **Art- kaj Kongresdomo**, tuj apud la ĉefstacidomo, kaj estis bonege organizita. Ĉiuj deŝorantoj ĉe la ĝicetoj parolis fluan Esperanton. La lingvo-nivelo estis alta kaj, preskaŭ neniu "krokodilis". Necesis nur demandi al sia apudulo "de kiu lando vi venis?" por komenci interesan konversacion.

Eble la plej efikan servon provizis D-ro Arthur Baur, kiu estris la (germanlingvan) **Kongresan Gazetaran Servon**. Multaj svisaj gazetoj, la Radio kaj la Televido uzis la servon kaj detale raportis pri la kongreso. Krom tiu elstara laboro, D-ro Baur ankaŭ verkis la informrican libron "La fenomeno Svislando", kiun ricevis ĉiu kongresano donace.

La prelegoj de la **Internacia Somera Universitato** estis altkvalitaj kaj multnombre vizititaj; kelkaj tamen celis nur samfakulojn, dum aliaj konvenis al la ĝenerala aŝdantaro. Plejparte bela vetero favoris la kongresan semajnon, sed, laŭ kutima kapricemo, pluvo kaj nebulo iom d'fektis la plezuron de kelkaj ekskursoj, afero kiun la organizantoj neniam povas respondeci.

La Estraro de U.E.A. kunvenis ĉiutage de frue en la mateno ĝis vesperiĝo. Post longaj diskutoj oni finfine akceptis unuanime la proponitan revizion de la **Statuto de la Asocio**. Du pluj landaj asocioj estis akceptitaj: **Ĉilio kaj Portugalio**. Du malnovaj anoj, multjaraj kunlaborantoj, estis nomitaj **Honoraj Membroj** de U.E.A.: S-ino Emilija Lapenna (Jugoslavio) kaj D-ro Hideo Shinoda (Japanujo).

Resume oni ne povas pli bone esprimi ol per la trafaj vortoj de mondvojaĝinto kaj verkisto **Tibor Sekelj**: "La Kongreso en Lucerno estis tre agrabla; laborplena por tiuj, kiuj emis labori, kaj bonega turisma loko ĝi fariĝis por tiuj, kiuj venis pro turismo. Mi kredas ke ĉiuj trovis ĉi tie proksimume tion, kion ili deziris kaj ŝatis trovi".

22nd AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

Jan. 2-9 — Sydney

This congress will be held at the St. Paul's College of Sydney University. It will again be a "Live-in Congress". Congress members will be accommodated in comfortable one-bed rooms.

Congress Fee: \$15.00.

Full Board from lunch 2-1-1980 till breakfast 10-1-1980, \$200.00

Mail your Congress Fee to the Treasurer, **Mrs. E. Matasin, 1 Coorabin Rd., Northbridge, 2063**. Add at least \$10 for room deposit and a stamped, addressed envelope for your receipt.

Third List of Congress Members:

74. James Harwood, Sydney
75. Frank Dunn, Sydney
76. Ann Hearn, Melbourne.
77. Jan Hamlin, Sydney
78. Sammy Lee, Sydney.
79. Bill Leah, Curlewis, NSW
80. Sheilah Leah, Curlewis, NSW.
81. Rosemary Harris, Jingili, N.T.
82. Joyce Turner, Rockhampton, Q.
83. Olive Russell, Sydney.
84. Beryl Frame, Sydney.
85. Ruth Philp, Brisbane.
86. Robert Felby, Adelaide.
87. Trevor Steele, Brisbane.
88. Ken Linton, Melbourne.
89. Cathy Sullivan, Brisbane.
90. John Paroz, Brisbane.
91. Barbara Williams, Melbourne
92. Maja Isobe, Japan.

State Distribution: N.S.W. 50; Victoria 14; Queensland 14; Tasmania 5; A.C.T. 3; Western Australia 3; South Australia 1; Northern Territory 1; Japan 1.

LA POST-KONGRESO EN "HOTEL MANLY"

Al la Post-Kongreso en "Hotel Manly" (de la 10-a ĝis la 14-a de jan., 1980) aliĝis Esperantistoj el ĉiuj aŭstraliaj ŝtatoj. Restas nur kelkaj ĉambroj, ĉiuj kun propra banĉambro. Ĉar la hotel-estro povas rezervi nur malmultajn ĉambrojn dum la somera sezono, NEPRE necesas tuj mendi ĉambron per antaŭpago de \$10 al "Manly Esperanto Club", Box 415, P.O. Manly, 2095. (Indiku ĉu vi bezonas liton en 1-, 2-, aŭ 3-lita ĉambro.)

Nia klubo aranĝos ĝuindan programon kaj civitan akcepton.

—Marjorie Duncan.



● **PERTH:** Je la kunveno de 17/7 ni ĝojis denove havi inter ni S-ron Walter Illingworth, kiu ĵus revenis de pacifika rondvojaĝo.

Ni aŭdis sonbendon kun la voĉo de D-ro Ivo Lapenna, faritan okaze de la 56-a Universala Kongreso en Londono, en 1971.

Je sabato, 18/7, okazis la lasta disaŭdigo de la radio-programo "Esperanto por Infanoj" de Radio 6 NR. Okazis entute 20 lecionoj, pro kiuj ni ŝuldas dankon al S-ino Vera Payne, kiu direktis la programon.

● **ADELAIDE:** Je 16/7 nia grupo denove kunvenis en la Universitato. Montriĝis ke S-ro George Clarke estas tre lerta hortikulturisto. Vigle li parolis kaj klarigis pri ĝardenumado dum la diversaj sezonoj de la jaro. Li scias ne nur kiel kultivi la ĝardenon, sed kapablis detale priskribi kiel prepari kaj kuiru la rikoltitajn legomojn kaj fruktojn. Entute tre "satiga" vespero!

—Robert Felby.

● **MELBOURNE:** Ĉiuj kvar Melburnaj Esperanto-grupoj partoprenis, 25/6, la jarmezan societan vesperon en la Esper-

anto-Domo. Prezidis la vesperon S-ino Barbara Podmore, kiu direktis konkurson pri la temoj "Mia plej agrabla surprizo" kaj "Mia plej interesa juvelaĵo". La premion por la "plej agrabla surprizo" gajnis S-roj H. Beechey kaj E. Chick, dum S-ino Podmore prezentis la "plej interesan juvelaĵon". La premion por la plej bona parolado en Esperanto dividis inter si S-roj S. Kanaĉki kaj H. Beechey.

"Lingvistiko por la laiko" estis la temo de prelego, 9/7, de S-ro Probal Daŝgupto. Li klarigis la fonemon kompare kun la sono kaj poste preparolis la pralingvajn familiojn kaj ties posteulojn laŭ monda distribuigo.

S-ro Herbert Koppel, 16/7, konkludis sian rakonton pri "Spertoj kiel gasto de lia Moŝto Georgo, la Sesa" kaj je 23/7 S-ro S. Kanaĉki parolis, kun modeloj, pri malnovaj kaj novaj metodoj tajlori.

● **SYDNEY:** "Kiel progresigi la uzon de Esperanto praktike", estis la temo de prelego, 25/6, de John Matasin. Ni devas lerni el la pasinteco, vivi en la nuntempo kaj plani por la estonteco. Ni ne atendu helpon de pedagogoj kaj profesoroj, sed mem kreskigu la movadon.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, kiu en la nuna tempo prelegas ĉe la Universitato, estis la preleganto je 2/7. Granda aŭdantaro ĉestis, kiam tiu fama esperantisto parolis pri siaj 50 jaroj en la movado. La Universitato de Sidnejo invitis lin antaŭ 1½ jaroj, sed li hezitis akcepti pro peza laboro en Anglujo kaj ĉar li tute ne ŝatas longan aerveturadon. Li tre ĝuas kion li vidas en Sidnejo kaj gratulis nin pro la alta vivnivelo, kaj post jaroj en Londono, li tre ŝatas nian bluan ĉielon.

Frank Dunn, 16/7, parolis pri "Zamenhof, pioniro de la scienca metodo". Zamenhof studis Volapukon, ekkonis la fundamentajn erarojn, kaj kreis Esperanton; sed li trovis la ideon pri la K-T-Ĉ-vortoj en Volapuk.

Ilya Grahovac parolis, 23/7, pri la vivo en sia hejma vilaĝo en Bosnio. La vivo estis bela, sen bruo kaj, pro la bonaj manĝaĵoj, homoj ne bezonis kuracistojn.

Volo Gueltling, 30/7, parolis pri Hamburgo, la grava havenurbo. En 1842 la urbo suferis pro severaj fajroj kaj denove en 1943, kiam britaj bomboj kreis eĉ pli severajn fajrojn. Bonŝance, Volo kaj la gepatroj travivis la nokton en julio 1943 kiam venis fajro el la ĉielo.

Je 6/8 ni parolis pri "Niaj ŝatokupoj". Robbie Robertson preparas kasetojn por blinduloj, S-ino M. Chaldecott trikas, Shirley Fanos ŝpinas lanon kaj Jim Harwood desegnis kaj uzas teksilon.

S-ro Probal Daŝgupto (hinda fakulo pri lingvistiko, nuntempe ĉe la Melburna Universitato), parolis, 13/8, pri la volontula servo ĉe U.E.A. en Rotterdam kaj pri sia laboro en Nov-Jorko kiel junulara reprezentanto de U.E.A. ĉe UNO. Li lernis Esperanto el "Teach Yourself Esperanto" kaj tradukis "Primo" de R. Tagore. — M. Chaldecott.

● **MANLY:** Dum junio kaj julio Prof. D-ro Ivo Lapenna kaj lia edzino Ljuba loĝis en Manly, kaj helpis nian klubon diversmaniere: 25/6 per intervjuo kun "Manly Daily", sekve de kio aperis informo artikolo pri Esperanto ("Language Barriers Broken"), kaj bona fotografajo; 16/7 per renkontiĝo kun nia urbestro, Ald. Joan Thorburn, kiu akceptis ilin en la urbdomo, kaj montris intereson pri Esperanto; 17/7 per instiga parolado pri la temo "Principoj de la Esperanto-Parolarto". Nomo de la ĉestantoj Prof. R. G. Robertson esprimis sincerajn dankojn kaj subtenis lin nia juna membro Jonathan Cooper. Post la parolado, kiu okazis en la vesper-lernejo, ĉirkaŭ 30 el ni festmanĝetis en la hejmo de nia gastama membro Eunice Graham.

S-rino Ruth Carruthers bonkore aranĝis festlunĉon en sia hejmo (6/7) por aparte bonvenigi S-inon Lapenna.

Ses el niaj anoj instruas kursojn en Manly kaj aliloke. La klubo kunvenas ĉiumarde en la Vespera Lernejo, Darley Road, 8.30 p.m., post la Esperanto-lectionoj.

—Marjorie Duncan.

● **BRISBANE:** Post reklamado en la ĵurnalo Courier-Mail kaj per anoncetoj (senpagaj) sur televido kaj per radio, ni gajnis 10 komencantojn, kiujn Tom O'Grady, per la rekta metodo, nun instruas. La frujara klaso nun estas sub la gvidado de Trevor Steele. Ray Ross prizorgas la klason por progresintoj; la literatura grupo estas plejparte sendependa studgrupo, kiun Trevor ankoraŭ observadas.

La 28-an de julio, ni partoprenis ekspozicion "Unifest", ĉe la Universitato Griffiths. Estis festo pri artoj kaj metioj, starigita de la "Kultura Asocio de

Griffiths, al kiu ni aligis antaŭ kelkaj monatoj. Inter budoj kiuj montris kaj vendis pentraĵojn, kaj specimenojn de leda, argilaja, gema kaj aliaj metioj, ankaŭ estis nia Esperanta elmontraĵo, kie ni ankaŭ respondis al petoj, disdonis foliojn ktp. Entute ni parolis al ducent interesatoj, inkluzive de kvar malnovaj esperantistoj.

Dum la sekvontaj monatoj ni partoprenos programojn, per Etna Radio 3EB. Speciala komitato jam estas starigita, kaj nun ni devas plani taŭgan programon. Samtempe ni devas ricevi instruadon pri la teknikoj devigaj, antaŭ ol ni rajtas brodkasti. —Ray Ross.

● **IPSWICH:** Proksimume 10 membroj kunvenas ĉiumarde en la TAFE-Centro. La loka ĵurnalo, "Queensland Times", subtenis Esperanton per duonpaĝa artikolo kun fotoj.

● **ST. LUCIA:** Dudek membroj nun studas en 3 grupoj: 8 komencantoj, 5 mezgraduloj, 4 progresintoj kaj 3 instruistoj.

● **TOOWOOMBA:** La monataj kunvenoj, legado de teatraĵoj, kunvenoj por konversacio kaj semajna studado daŭre okazas. Loka Televida Stacio intervjuis Ges-rojn Williams pri la "Internacia Lingvo". Honore al S-ino Ruth Maltman, kiu flugis al Eŭropo, okazis, 11/7, festeno en la hejmo de S-ino Stower.

EL LA FEDERACIOJ

Venontaj Aranĝoj

● **KVINSLANDO:** Konferenco okazos 13-14 okt., 1979 Palm Breeze Motel, Caloundra Kontakto Bev. Allatt, 33 Montpellier St., Wilston, 4051.

● **N.S.W.:** 26-28-a okt. 1979: Senajnfina konferenco ĉe "Anglican Conference Centre", 5 km de East Maitland. Kontakto Eve Matasin, 1 Coorabin Rd., Northbridge, 2063 (Tel: 95-6537)

● **VIKTORIO:** Jara Seminario—sabaton, 10 nov., 1979 en la Kvakera Domo. Kontakto Herbert Koppel, 41 Byfield St., Reservoir, 3073 (Tel: 460-6215).

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

LETERO AL LA REDAKTISTO

Kompreneble mi ĉiam avide tralegas nian ĵurnalon ĉiumonate, de la unua paĝo ĝis la lasta, kaj pasintan monaton la lastaj paĝoj aparte interesis min, ĉar temis, se ne pri mi, certe pri samnomulo.

Nu, serioze, la duparta artikolo en N-roj 170 kaj 171 estiĝis iom mankhava, laŭ mi, ne ĉar la raportisto eraris, tion li ne faris. Sendube mi mem ne sufiĉe emfazis, kiu devas esti la heroino de la historio, kompreneble la bluokula nigraharulino, la karega edzino. Kun edzo kripligita, ŝi devis ankaŭ varti la filinon, la plej junan kaj la plej karan, ankoraŭ ne sanan, kaj lukti eĉ por teni sekura la hejmon mem.

Rideti inter geamikoj dumtage estas sufiĉe facile; tro ofte dum mallumaj

noktoj estis ne facile. Geedza paro kune travivas ĉion kaj postvivas, ĉu ĝindan, ĉu malĝindan. Sen ŝi la historio estus tute alia.

Pri la efiko de drogoj mi ne parolas; tiu estas alia ĉapitro. Mi devas aldoni, ke kelkaj viaj legantoj diris al mi: "Mi neniam konsciis, ke vi estis en radseĝo". Efektive ne, okazis miskompreno. Kiel prave skribita en la artikolo, mi "rezignaciis pri tio", ĉar mi ne povis piediri antaŭ la grava operacio, sed feliĉe mi lernis denove la arton piediri, sen difektitaj muskoloj, do finfine neniam bezonis radseĝon, kvankam oni prognozis tion antaŭe.

Sincere via, Robbie Robertson.

RECENZOJ

EREVONO: Utopia satira romano de Samuel Butler. 177p. El la angla tradukis Alec Venture. Eldonis Alec Venture, 1978. Angla prezo £2.

En sia "Antaŭparolo al la reviziita eldono" la aŭtoro informas ke la eldono komence rifuzis la manuskripton "ĉar ĝi estas verko filozofia kun mal multe da ŝanco fariĝi populara inter granda rondo da legantoj". La unua eldono tamen elvendiĝis en la daŭro de tri semajnoj.

Nu, multaj esperantistoj ja estas filozofiemaj, sed oni povus sin demandi kiom da aktualeco povus havi satira verko kreita antaŭ pli ol jarcento. Eble la ŝanco iom rolas en la afero ĉar lasta-tempa, elstare bona, televida serio pri la vojaĝoj de Charles Darwin direktis freŝan atenton sur la teoriojn de tiu sciencisto. Estis sub la influo de ĝuste tiuj teorioj — tiam novaj — ke Butler verkis. Cetere, la du ĉefaj temoj de Butler, la religio kaj la evoluado, restas ĉiam aktualaj.

Butler utiligis por sia satiraĵo la jam tradician kadron de veturado en nekonata lando por prilumi instituciojn kiuj estas jen utopiaj, jen satiraj inversigoj de

la mondo al ni konata. La Suda Insulo de Novzelando, kie Butler tre sukcese ŝaffarmis dum kelkaj jaroj, fariĝis la bazo de granda parto de la geografiaj priskriboj en la libro. La aŭtoro mem konfesis, ke "en 'Erevono' apenaŭ troviĝis historio kaj mankis preskaŭ ĉia provo doni al la roluloj vivecon kaj individu-econ". Ĉefgravas ne eventoj, sed ideoj, ideoj.

Kiel estas atendeble (ĉar la aŭtoro, alinome "Avo", verkas la serion "Laŭokazaj Lingvaj Notoj" en "Brita Esperantisto") la traduko estas elstare bona kaj klara. Tamen, troviĝas kelkaj preseraroj. Ekzemple, sur paĝo 114 linio estas ripetita kaj oni simple devas konjekti pri la enhavo de la linio kiu mankas. Litertipo kaj papero estas bonaj.

—R.McG.

Instruisto: "Ni nun volas formi frazojn kun personaj pronomoj kiel mi, vi, ŝi, li, k.t.p. Se ekzemple la patro dirus:

"Mi foriras", kion respondas tiam la patrino al la patro?

Lernanto: "Vi restos hejme".

"Oni povas trovi poezion en ĉio", diris la poeto.

"Jes", respondis la redaktoro kun rapida movo de la mano, "eĉ nun en tiu ĉi korbo sub mia skribotablo".

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$12.
(Individual, family, club, federation and pensioner)
Full-time Students \$8



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063

Sekretario/Kasisto: S-ro L. V. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W. 2095

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 173 (253)

MELBOURNE

Septembro, 1979

LA UNUA INTERNACIA PLANLINGVO EN AŬSTRALIO: VOLAPUKO

BERNARD GOLDEN

Esperanto atingis Aŭstralion tre frue post la publikigo de la **UNUA LIBRO** de d-ro Esperanto en 1887. En majo 1889 Zamenhof skribis al sia amiko Vlad'mir Majnov, informante lin, ke estas adepto de Esperanto en Aŭstralio. Li denove skribis al Majnov en julio de la sama jaro kaj menciis, ke leteroj en Esperanto venis el Melburno kaj el urbeto proksima al Sidnejo. La **Dua Adresaro** publikigita en 1892 registris la esperantistigon de D. G. Reinitis kaj Herman Ritz, ambaŭ el Mount Victoria, Nova Sudkimrio. Alia frua aŭstralia esperantisto estis George C. Hodgson el Melburno, kiu aliĝis al la movado en 1894. Tiuj homoj certe estis izoluloj, ĉar nur en la fruaj jaroj de la 20-a jc. estis fonditaj la unuaj lokaj kluboj kaj la landa organizajo.

Estas ind'koj, ke alia internacia planlingvo alvenis en Aŭstralio pli frue ol Esperanto: Volapuko. Okaze de la centjara jubilea festo en 1979 de la sola internacia lingvo, krom Esperanto, kiu akiriĝis sukceson mondscale en la 19-a jc., mi dediĉis min al esplorado de la historio de Volapuko kaj ties interrilatoj kun Esperanto. Volapuko estis kreita en 1879 fare de germana romkatolika pastro Jehann Martin Schleyer. La

apogea jaro de lia lingvo estis 1889, kiam pli ol mil diplomitaj instruistoj disponis lernolibrojn en 25 lingvoj por instrui Volapukon tra la tuta mondo.

La ŝlejera lingvo rapide disvastiĝis, ne nur en Eŭropo sed ankaŭ al ĉiuj aliaj kontinentoj, inkluzive de Azio. En Ĉinio unu el la fruaj instruistoj estis s-ro van Aalst en Amoj, kiu organizis kurson kaj redaktis du gazetojn, unu en la angla, la alian en la Ĉina. En Pekino subtenanto de Volapuko estis d-ro Edkins, elstara filologo. Volapuko atingis Japanion en 1887, kiam anglalingva periodaĵo eldonita en Jokohamo informis siajn legantojn pri la nova internacia lingvo. En alia parto de Azio, Batavio, Nederlandaj Orientindioj, naskiĝis en 1865 nederlandano, d-ro Arie de Jong, kiu volapukistiĝis kaj 20 jarojn post la morto de J. M. Schleyer en 1912, sukcesis disvastigi sian reformitan version de Volapuko.

Ankaŭ en Talop/Aŭstralio en Volapuko/ fervoraj adeptoj de la volapuka movado deklamis la devizon: **Menad bal pük bal** /Unu homaro unu lingvo/. En bibliografia publikiga'o pri internaciaj lingvoj mi trovis referencon pri **The Cosmopolitan Quarterly gazette for**

furthering Volapük /La Kosmopolito. Kvaronjara gazeto por antaŭenigi Volapukon/. Ĝi estis eldonita en Sidnejo, kaj numeroj 1-31 aperis inter 1891-1898. Kutime periodaĵoj de internacilingvaj movadoj aperas post la starigo de lokaj kluboj kaj landaj organizaĵoj, do sendube estis volapukistoj en Aŭstralio jam antaŭ 1891.

Estas ankaŭ atestaĵo pri interesiĝo rilate internaciajn lingvojn en Aŭstralio antaŭ la lanĉo de la volapukista gazeto. En la jaro 1887 la Amerika Filozofia Societo en Filadelfio, Usono, starigis komitaton por enketi pri la elekto de internacia lingvo. Inter la planlingvoj, kiujn la komitato profunde ekzamenis estis Volapuko kaj Esperanto. La Societo petis la kunlaboron de sciencaj kaj kulturaj institucioj tra la tuta mondo por kunvoki kongreson, kiu pritraktos la demandon. Unu el la aŭstraliaj organizaĵoj, al kiuj la Amerika Filozofia Societo turnis sin, estis la Reĝa Societo de Viktorio, kiu en 1888 respondis favore.

La komitatoj de la Amerika Filozofia Societo en siaj raportoj rifuzis Volapukon kiel kandidaton por la internacia lingvo, ĉar ĝi ne konformis al la principoj, kiujn ili formulis, dum Esperanto ricevis ilian aprobon. Tamen, la projektita kongreso neniam efektiviĝis. Volapuko, post mallonga burĝonado, apenaŭ povis flori ĉar ĝia movado estis disigita pro skismo inter lingvaj konservativuloj kaj reformemuloj. **The Cosmopolitan** estis rimarkinda gazeto, ĉar ĝi daŭrigis sian aperadon ĝis 1898; la plimulto de la aliaj volapukistaj periodaĵoj malaperis antaŭ tiu dato.

Male, la volapukistoj ankoraŭ ne tute malaperis. Troviĝas deko da adeptoj de la lingvo de Schleyer loĝantaj nuntempe en Eŭropo kaj Sudameriko. Se estas volapukisto ankaŭ en Aŭstralio, li estas tute izolita, ĉar la aliaj samlingvanoj scias nenion pri li.

EL POPOLA ĈINIO

Abono por unu jaro \$3.00
por du jaroj \$4.50
por tri jaroj \$6.00

Interesaj artikoloj kun belegaj koloraj bildoj sur eleganta papero

Petu senpagan specimenon ĉe
K. G. LINTON
11 Poplar St., South Caulfield 3162

MI FERIIS EN ESPERANTUJO

de Wre Chandler

Mi estas riĉulo. Mi estas multe pli riĉa ol iu ajn multmilionulo. Pere de Esperanto, mi havas tra la mondo multajn amikojn. Tian riĉaĵon, la tuta monprovido de la mondo ne sufiĉus por aceti. Ĉijare, mi veturis al la 64a Universala Kongreso en Lucerno. Tie mi renkontis multajn tre karajn amikojn kaj gajnis multajn novaĵn. Mia transmonda veturo komenciĝis en Esperantujo. Adiaŭis min, sur la Soveta ŝipo, "Leonid Sobinov" la Prezidanto de la Sidneja Esperanto-Societo, S.-no Shirley Fanos, kaj la lastaj vortoj kiujn mi parolis antaŭ ol fornavigis la ŝipo, estis, "Ĝis Revido!"

Sur la ŝipo mi prelegis, pri Esperanto antaŭ ol ni atingis Fremante. Kiam la ŝipo alproksimiĝis la kajon tie, multaj personoj diris al mi, "Jen viaj amikoj sur la kajo!" Sub granda aŭso, "ESPERANTO" staris pluraj membroj de la Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio. La Ligo bonvenigis min ĉe la hejmo de Chris kaj Dolly Dean, per socia vespero kaj "smorgasborda" manĝo. Do, vere, mia ferio komenciĝis en Esperantujo. Ĉar la krosŝipo ne restis longe en la havenoj, mi ne kontaktis Esperantistojn en Kolombo, Port Said aŭ Messina. En Southampton, mi estis la gasto de la loka Esperanto-Klubo, unue ĉe vespermanĝo en la hejmo de S.-ino Manjo Aust'n kaj, poste, ĉe la kunveno de la Kvakeroj. Tie mi montris miajn lumbildojn pri "Indiĝenaj floroj de la Sidneja Regiono".

En Bristol mi estis gasto de F.-ino Dorothy Fulford, administranto de la studgrupo por Natur-Protoktado, grava funkcio de O.R.E. Kun ŝi, mi vizitis multajn birdoriĉajn lokojn, inkluzive Sibleybridge, la laborejon de Kav. Peter Scott, kaj la lokon kie oni filmas multajn natur-programojn de la B.B.C. En Bristol mi montris miajn lumbildojn kaj partoprenis Esperanto-diservon en preĝejo, "La Tri Reĝoj", konstruita kiel almozdisdonejo en la jaro 1430 P.K. Kun la frato de Dorothy, mi vizitis Vilaĝan "Pub", kiu pli similas al klubo. Ĉiu konas ĉiujn aliajn kaj la atmosfero estas vere hejmeca. En la Zoologia Ĝardeno de Bristol, oni bredas minacatajn bestojn, kun la espero resendi tiujn al iliaj antaŭaj hejmlandoj. Oni eĉ bredas tie aŭstraliajn valabiojn tiucele.

En Chester, mi renkontis unuafoje

m'ajn korespondantojn, Denis kaj Muriel Williams. Denove, mi estis honorgasto en Esperantujo. Kun miaj gastigantoj, mi vizitis multajn interesajn lokojn. Ĉe la katedralo, mi aĉetis esperanto-broŝuron pri la historio de la konstruaĵo, kiu estis konstruita en la 13a kaj 14a jarcentoj. Ni vizitis la Botanikan ĝardenon de la Universitato de Liverpool, kaj la kastelon Beeston, la lastan kimran kastelon venkitan de la angloj frue en la 15a jarcento. La angloj elpelis la kimrojn de la kastelo per tre malagrabra batalilo. Per katarpulto ili jetis en la kastelon barelojn de la fekajo de la tendejo, kaj tiel poluciigis la akvo-puton. Oni rajtas nomi tion, angle, "a filthy trick", ĉu ne? Mi montris miajn lumbildojn ĉe la hejmo de S-ro Adrian Oates.

De Chester mi iris al Londono, kie mi gastigis ĉe Ges-oj Buttinger, kiuj luigas kambron al Esperantistoj. Mi vizitis la Londonan E-klubon. Tie oni afable gastigis min. S-ro Peter W. Miles havas ruzan nomon, "Wreford". Ĉar tiu estas ofte donita nomo en la familio de mia avino, mi kredis ke eble mi trovis malproksiman parencon, sed Peter diris, "Ne, mia patro prenis la nomon el tombono." Mi vizitis multajn interesajn lokojn apud Londono, inkluzive la Ĝardenon Kew, kie, laŭ la ĉefkuratoro, oni kultivas ĉiujn speciojn de floranta planto en la mondo. Kiel amatora botanikisto, mi iom dubas tion. Mi vizitis ankaŭ la Observatorion ĉe Greenwich, kie mi staris kun unu piedo en la Okcidenta kaj la alia en la orienta duonsferoj. Mi tre multe ĝuis mian ferion en Londono. Mi senhezite konsilas esperantistojn kiuj vizitos Londonon, gastigi ĉe Ges-oj Buttinger, kies adreso troviĝas en la Jarlibro de U.E.A.

De Londono mi iris al Roterdamo. Tute hazarde, mi eniris, ĉe la Stacidomo Euston, kupeon en kiu jam sidis du esperantistinoj survoje al Roterdamo. Atendis min sur la stacio en Roterdamo m'aj tre karaj amikoj Lorenzo kaj Audrey Mee. Multaj aŭstralianoj memoras Audrey kiel elstaran instruiston de Esperanto, laŭ la metodo Cseh, kiu lastan januaron vizitis nin por instrui ĉe la Smera Lernejo en Toowoomba.

Kun Audrey, mi vizitis multajn interesajn lokojn en Roterdamo, la Havenon Delft, kie elvelis la "Pilgrim Fathers", por fondi kolonion kiu fariĝis Usono. Ni faris rondvojaĝon sur la Haveno Roterdamo, la plej komercoplena haveno en la mondo; ni vizitis la Euromast, kies supro estas la plej alta punkto en

Nederlando; ni vizitis Schiedam, kie ni vidis tankŝipon ĉe la ĝin-distilejo "Bols". Sajnas ke oni liveras la ĝinon tankope al vendejoj tra Eŭropo. En Schiedam ni vidis ankaŭ ventmuelon, konstruitan en la jaro 1643 kaj ankoraŭ funkciantan.

En Eindhoven gastigis min karegaj geamikoj, Ru kaj Katrin Bossong. Ru estas la redaktoro de "La Mevo", la oficiala organo de Ornitologia Rondo Esperantlingva. Kun li mi vizitis kelkajn natur-rezervejojn kaj birdoriĉajn lokojn. Ni vizitis la muzean urbon, Zierikzee, kie sur la urbdomo estas orumita statuo de Neptuno, tre taŭga insigno por fiska vilaĝo. Tie, la haveno, inter domoj konstruitaj en la 15a jarcento, enhavas la plej modernajn motorboatojn. Ni vizitis kampanilologian muzeon kie ni vidis sonorilojn kaj kariljonojn inkluzive ĉe sonorilon el Tajlando, mulditan pli ol 7 jarcentojn antaŭ Kristo.

(daŭrigota)

AŬSTRALIA = =KRONIKO

● **PERTH:** Chris kaj Dolly Dean revenis de longa rondveturo kaj je 7-a de aŭgusto ili prelegis kun diapozitivaj. Inter multaj aliaj lokoj, ili vizitis Brisbanon kaj Surfers Paradise. Je 21/8 ni bonvenigis denove inter ni "Happy" Huts, kiu revenis el hospitalo. Li parolis iomete pri kor-atakoj ĝenerale kaj pri kuracmetodoj. Ni aŭskultis elĉerpajojn el la "Sonrevuo" de la Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj.

Je 4-a de septembro ni bonvenigis F-inon Ann Hearn (de la Oakleigh-Grupo), kiu feris en Perto. Ges-roj Einihovici raportis pri siaj partoj ĉe la ILEI-Konferenco en Locarno kaj ĉe la Universala Kongreso en Lucerno.

Je 18-a de sept. D-ro Einihovici montris lumbildojn pri la kongresoj en Locarno kaj Lucerno kaj pri belaj svisaj pejzaĝoj.

● **MELBOURNE:** Je 6-a de aŭgusto S-ro Harry Beechey parolis pri "Transakcia Analizo", S-ro David Rockell, 13/8 pri sia hejmlando Nov-Zelando" kaj S-ro Marshall Cohen, 20/8, pri partoj

necesaj en la fabrikado de ŝuoj. Krome, ĉeestantoj aŭskultis aerpoŝtajn raportojn de la sekretario (Herbert Koppel), pri vojaĝo al Hongkongo kaj la Universala Kongreso en Svislando.

Je 27/8 S-ro H. Koppel rakontis pri siaj vojaĝoj kaj spertoj en Zuerich kaj Luzern kaj pri la 64-a Universala Kongreso. Unu semajnon poste, Ges-roj Koppel parolis pri interesaj personoj renkontitaj en Svislando kaj Liechtenstein.

S-ro S. Kanaĉki (10/9), helpate de modelo, klarigis la laboron de spertista tajloro, kiu kudras dancistan kostumon. Li ankaŭ aŭdigis sonbendan programon "What in the World", kun intervjuo kun Blair Silverlock pri Esperanto, ĉe televizistacio GTV9.

Je 17/9 S-ro Harry Beechey parolis pri sia 2-a kurso de "Unua Helpe" kaj la ŝanĝoj en la traktad-metodoj de kiam li unue entreprenis tian kurson.

● **GEELONG, Vik:** En la loka tag gazeto "Geelong Advertiser" aperis, 18/9, longa artikolo "Ĉu vi komprenas Esperanton?", kun fotografajo de D-ro L. L. Zamenhof. Ĝi estis la rezulto de intervjuo kun Ted O'Brien, sekretario de la Geelong E-Grupo.

● **LAUNCESTON, Tas.:** Nia malgranda grupo persiste kunvenas ĉiusemajne en la hejmo de Parlamentano Mac Le Fevre. La "Norda-Regiona Biblioteko" de Launceston ĵus eldonis detalan liston de ĉiuj Esperanto-libroj donacitaj de la Launceston E-Klubo. Krome, tiu listo estis "programita" en la komputero de la biblioteko. Do, ekde nun, iu ajn en Tasmanio povas, per premo de butono, trovi E-libron kaj prunti ĝin. Eĉ en malgrandaj lokoj, interesatoj povos akiri E-librojn per la "Veturanta Biblioteko".

● **SYDNEY:** S-ro Jim Harwood, 20/8, prelegis kun lumbildoj pri ĝardenoj, privataj kaj publikaj kaj ankaŭ pri naciaj parkoj, en diversaj landoj. Je 27/8 ni konstruis "Piramidojn". Komencante per unu litero, ni aldonis po unu ĝis ni ne plu povis aldoni; poste, ni forstrekis po unu litero ĝis restis nur unu. S-ino M. Chaldecott elpensis tiun ludon.

Wre Chandler, 3/9, prelegis pri sia vojaĝo de Sidnejo al la Kongreso. Li

vizitis Sri Lankan kaj Egiptujon survoje; pro miskompreno oni malluis ĉambrom en Lyon, sed en alia loko li renkontis tre gastamajn geamikojn.

Elsie Curry, 10/9, montris lumbildojn pri marvojaĝo al Nov-Zelando, Fiĝio kaj Nova Kaledonio.

—M. Chaldecott.

● **MANLY:** Vizitis nian klubon, 13/8, mag. Probal Daŝgupto, kiu parolis pri sia instruado de la lingvoscienco en la Melburna Universitato, pri sia tradukado de la poemoj de la hinda poeto R. Tagore, kaj pri sia volontula laboro en la Centra Oficejo de U.E.A. Dum kelkaj tagoj li estis gasto ĉe S-ino Edna Giles, kaj vizitis la hejmojn de aliaj membroj de nia klubo.

Post kelksemajna libertempo, komenciĝis, 18/9, nia 3-a Trimestro. Ĉiunarde 7-8-a p.t.m. ni studas la lingvon. Sekvas programo, kiu inkluzivas paroladojn, diskutojn, skeĉojn kaj kantojn. Dum nia unua programo, S-ro Les Scott, parolis pri la ĵus-okazinta Universala Kongreso, kies membrojn li salutis nome de A.E.A., en la malferma ceremonio.

—Marjorie Duncan.

Jubileo Looirts S-ro Eino Looirts U.E.A. Delegito en Hobarto (Tas.), je 4-a de aŭgusto, 1979, fariĝis 70-jara. Li naskiĝis en Estonio kaj enmigris Aŭstralion, kune kun sia edzino Erika, antaŭ 30 jaroj. Gratulojn al la 70-jarulo, kiu malgraŭ sia aĝo restas entuziasma esperantisto.

GRAVA ANONCO PRI LA 22-a AŬSTRALIA ESPERANTO- KONGRESO EN SIDNEJO

Pro neatenditaj cirkonstancoj, la Kongreso NE okazos ĉe la Universitato. La kongresejo estos la 'WESLEY CENTRE', 210 Pitt St., Sydney. Ni antaŭmendas unulitajn, dultitajn, kaj trilitajn ĉambrojn ĉe la "People's Palace, 400 Pitt St., Sydney, sufiĉe apud la kongresejo, kaj aliaj hoteloj, se tiu ne estos plaĉa al iu kongresano. Oni disponos pri unulita ĉambro po \$10 ĉiunoke kun kuirita matenmanĝo; dultitaj kaj trilitaj iom malpli. Ĉiuj manĝoj estos haveblaj ĉe la kongresejo, escepte de la bankedo okazanta en luksa restoracio meze inter la kongresejo kaj la loĝejoj. Tiu kosto

\$10-\$12. — R. G. Robertson, A.E.A. Prezidanto.

LA POSTKONGRESO EN MANLY (Jan. 10-14)

La estro de la Hotel Manly tenos por Post-Kongresanoj du pluajn ĉambrojn. Ĉar ĉambroj en aliaj loĝlokoj ne plu estas haveblaj, partoprenontoj TUI sendu antaŭpagon de \$10 al "Post-Kongreso", Box 415, P.O. Manly, 2095.

—Marjorie Duncan.

Gramatike-

Ofte faciligas komprenon de vortoj listigi similajn kaj noti la diferencon, ekzemple, jen estas du grupoj de vortoj:

Kanalo: artefarita akvovojo por enlanda navigado; aŭ simila artefaritaĵo uzata por diversaj celoj, kiaj sekigo de marĉa regiono, irigacio, forkondukado de malpuraĵoj, ktp

kanelo: longa rekta ornama sulko; aŭ spirala sulketo, - strekita- interne de paftubo kaj destinita rotaciigi pafaĵon kaj sekve stabiligi ties trajektorion; aŭ spirala sulketo strekita surface de gramofondisko, kaj destinita gvidi kaj vibrigi la nadlon aŭ safiron adaptitan al la diafragmo

ĉanelo: la plej profunda parto de rivero aŭ de mara pasejo, kiu estas signalita per lumturoj, lumŝipoj, buoj, ktp.

procedo: agmaniero, aplikata por atingi difinitan rezulton, kaj speciale farmetodo sekvata por fabriki, presi, foti ktp.

proceso: juĝafero, jure submetita al tribunalo.

procezo: natura sinsekvo de fenomenoj disvolviĝantaj, sen efiko de ia ekstera forto, kaj rigardata en sia tuteco, iompostioma progresado al finaj rezultoj.

proceduro: maniero, en kiu estas kondukigitaj la aferoj konforme kun la kutimo, statuto, reglamento, aŭ leĝo.
—K. G. Linton.

TUTMONDA KOMUNIKADO PER SATELITOJ ?

Lingvo estas la ĉefa faktoro en nia supereco super frata animalo . . . Ni havas komunikajn satelitojn, kiuj transigas mesaĝon al la tuta loĝantaro de la planedo, sed nenian komunan lingvon, kiu igus ĝin universale komprenata. Ŝajnas strange, ke, escepte de malmulto da **bravaj esperantistoj**, nek Unesko nek iu alia internacia organizo ĝis nun eltrovis, ke la simpla vojo por antaŭenigi interkomprenon estus antaŭenigi lingvon, kiu estas komprenata de ĉiuj homoj.

—Arthur Koestler, Usono.

ESPERO

de Nadia Adrianova (Kievo)

Ĝis lasta spiro
homa kor' esperas
je bona sorto,
amo kaj feliĉ';
kaj pene agas,
luktas kaj suferas.

★ ★ ★

Esper' kaj revoj
por la koro estas
dum tuta vivo
la plej granda riĉ'.
Ĉar kiam homo
perdas la esperon
li perdas fakte
ĉion en la viv'.

Per la supra poemo, la aŭtorino gajnis la duan premion en la konkurso "Muzo 78" en Vilnius. Si estas plumamikino de nia membro Joyce Turner, Rockhampton, kiu sendis la poemon al ni.

Kuracista Konsilo

—Vi nepre manĝu fruktojn, se vi volas resti sana. Sed ne senŝeligu la fruktojn. Ĉar en la ŝelo troviĝas la vitaminoj kaj aliaj necesaj faktoroj. Kiujn fruktojn vi preferas?

—Kokosojn.

Kuracista Helpo

—Cu via kara edzo mortis laŭ natura maniero?

—Ne, li havis kuracistan helpon.

RECENZOJ

"SKOTA ANTOLOGIO", Eldonejo Kardo, 1978. Redaktis William Auld, 255 paĝoj. Havebla ĉe A.E.A. Libro-Servo: \$6.65.

Manĝonte avenkaĉon, anglo surmetas sukeron, sed skoto preferas salon. Per tiuj malsamaj gustoj oni povas percepti la diferencon inter du rasoj, diferencon ne multe komprenatan ekster Britio mem, krom en ekskolonioj loĝataj de migrantoj el Skotlando. En aliaj landoj, miskomprenoj pri la skota karaktero abundas, ekzemple, ke ili ĉiuj estas puritanoj. Nu, espereble ĉi tiu bona antologio forbalaas tiajn erarojn, prezentante verkojn de Burns tradukitajn de Auld; tiujn du neniu rajtas nomi puritanoj.

La libro enhavas multajn juvelojn el la skota literaturo, nekonatajn antaŭe al multaj angloj Facile legeblaj por angloj estas rakontoj kiel "Tordita Johano" de R. L. Stevenson kaj "Vagul-Vilĉjo" de W. Scott, eĉ en la originala lingvo; tiuj an'loj ofte erare supozas, ke la verkistoj estas angladevenaj. Preskaŭ tute nepenetreblaj estas frazoj kiel "A d'amen-icker in a thrave" el "Al Muso" aŭ "What ye gaun, ye crowlan ferlie" el "Al Pediko", ambaŭ verkitaĵ de Burns, sed en la trafaj tradukoj de R. Rossetti, tuj klarigas la sencon kiel "El garbo, jen spiketon levi . . ." kaj "kien vi, rampulo fia?" Kvankam mi mem aŭskultis deklamadon de tiuj poemoj multfoje dum infaneco, mi pli bone aprezas ilin per tiuj bonaj tradukoj.

Kompreneble mi unue serĉis la verkojn plej amatajn de mi, kaj mi nepre devis aprobi la tradukojn de "Kiu antaŭis min, knabino" de Hugh McDiarmid (laŭ mi, ne Mac) kaj "La Rendevuo" de W. Soutat, ambaŭ en simplan, klaran, rektan sed vere poezian Esperanton de W. Auld. Ne tiom plaĉis la balado "Sir Patrick Spens", ĉar "En Dunferlin' la reĝo sidas/ Kun vino ĉe la lipo . . ." ne tute kaptas la nuancojn de "The king sate in Dunferline toon, drinking the blude-red wine . . ."; kaj "Laith, laith were oor gude Scots lairds/Tae wat their cork-heeled shoon . . ." oni ne fidinde tradukas per "La skotaj lordoj malsekigi/la ŝuojn ne deziris". Aparte interesa, ĉar antaŭe al mi nekonata, estis "Logopandectision" de Urquhart, pri universala lingvo.

Mi devas diri kun bedaŭro, ke la ilustraĵoj ne taŭgas, sed mi elkore re-

komendas la "Skotan Antologion" egale al anglaparolantoj kaj ĉiuj aliaj kiuj deziras gustumi apartan, riĉan, historiplenan kulturon.

—Robi Robertson.

BONAN TAGON

S-ro John Moore, nia komisiito por korespondaj kursoj, petis min kiel komisionestro pri ekzamenoj diri kelkajn vortojn pri la kurso, kiu nomiĝas "Bonan Tagon". Mi jam havis la bendon kaj nun ricevis la kajeron.

Unue, la kurson verkis S-ino Mabel Wybenga por radioelsendoj el Morwell en la jaro 1974. Mi deziras varme gratuli ŝin, ĉar ĝi estas la plej bona enkonduka kurso, kiun mi jam vid's. La verkistino komencis la kurson en la sfero de aritmetiko, uzante ciferojn, nombrojn, kaj numerojn, tiel iom prokrastante la pli malfacilan temon de gramatiko, kaj ne mencias pluralon, kaj la ne tiel facilan akuzativon, ĝis la lernanto iomete uzas la lingvon. Sendube nia kara amiko, Ivan Maddern, uzis sian influon por efektiviĝi la radian elsendon el Morwell. La kurso estis surbendigita de S-ro Bill Wybenga.

La sekvintan jaron, 1975, 4NA, Nambour dissendis serion de 12 lecionoj, tiel imitante la sukceson de Morwell. Por tiu nova serio novan bendon faris S-ro Ron Ritchie de Nambour High School, kun la helpo de S-ino Doris Sinclair kun Stan kaj Audrey Bruton. La Kvinlanda Esperanto-Federacio aĉetis tiun sonbendon, kaj ankoraŭ posedas ĝin.

En la jaro, 1977, Rockhamptona Esperanto-Societo entreprenis daŭrigi la bonan laboron. Decia Neddrie, Gilbert Shonham, kaj Joyce Turner multobligis 540 ekzemplerojn de la kurso, kaj sendis al 11 lernejoj, kiuj konsentis partopreni la dissendon el stacio 4RO. Malfeliĉe nova direktoro de 4RO nuligis la elsendojn, sed niaj fidelaj samideanoj ne akceptis malvenkon, kopiis la sonbendon sur 11 aliaj kasedoj, kaj sendis al 11 lernejoj. Sep lernejoj jam raportis, ke ili sukcesis kompletigi la kurson, kaj ke ili volonte ripetis. Tamen pro perdo de laborantoj Rockhampton ankoraŭ ne ripetis. Eble iu povos proponi sin por helpi denove okazigi ĉi tiun gravan laboron.

En la sama jaro, Toowoomba Esperanto-Societo interesigis unu duagradan kaj ses unuagradajn lernejojn, kaj provizis la kasedojn, sed la radiostacio ne konsentis kunlabori.

En tiu jaro John Moore petis S-inon Mabel Wybenga adapti la kurson por koresponda uzado, kaj rezultobligis la

skriban parton tiucele.

En la jaro, 1978, ĉe la Launceston Kongreso, John Moore akceptis la rolon de komisiito por korespondaj kursoj kaj uzas la nove adaptitan kurson kun granda sukceso.

En ĉi tiu jaro, 1979, S-ro Tom Elliott, nia agema komisiito por Libro-Servo aranĝis la represon de la broĉuro, kiun John Moore iomete ŝanĝis laŭ sia sperto en la konduko de la koresponda kurso. Tamen esence la kurso estas la sama, kiun originale verkis S-ino Mabel Wybenga, kaj la plej multajn el la ŝanĝoj verkis S-ino Wybenga laŭ la petoj de John Moore. Ni nun povas vidi, ke la agado komencita en Morwell multe kreskis kaj etendiĝis. El malgranda glano kreskas granda kverko.

—Ken G. Linton.

Elementa Koresponda Kurso, \$15.00. Por plua informo skribu al S-ro J. B. Moore, Pelican St., Emu Park, Qld. 4703.

“LA FENOMENO SVISLANDO” de Arthur Baur, Winterthur, ne estas gvidlibro de la Baedeker-tipo, listiganta krom hoteloj, fervojoj k.s. konscience ĉiujn tradicie agnoskitajn vidindaĵojn, naturajn kaj artajn; ĝi ankaŭ ne estas enciklopedio de politikaj, kaj malpli “kulturaj” donitaĵoj laŭ la modelo de “Faktoj pri . . .”. Tiu eksterordinara, en flua, klara stilo originale en Esperanto verkita libro, prezentas ion senkompare pli valoran. Ĝi konatigas siajn legantojn, de ĉapitro al ĉapitro pli kaj pli intime, kun animo kaj spirito de la fenomeno Svislando, unika laŭ estiĝo, konsisto, sinteno, vivkoncepto kaj historia misio. La recenzanto havis en duon-adoleska aĝo la, laŭ la aŭtoro maloftan, bonŝancon, vivi dum pli ol tuta jaro en la sino de alemane svisa familio, kiun li en postaj jaroj ripete — kaj ĉiam por pluraj semajnoj — vizitis, tramigrante — ankaŭ piede — plej diversajn partojn de la lando, kaj li nun, dank’ al la libro de D-ro Baur, ne nur revigligis multajn memorojn, li ankaŭ ekkonis interligojn, kaŭzojn, fonojn, pri kiuj li nur malmulte, nebulece, aŭ tute ne, konsciis antaŭe. Sed li certe ne nur pro tio legis kaj plulegis preskaŭ senpaŭze. Sendube ankaŭ ne tiamaniere preparitaj legantoj ĝuos tiun verkon kun same kreskanta intereso. Ĉar D-ro Baur prezentas kun fascina vivanteco la esencon ne nur de la historia materialo, sed—preskaŭ ne-

kredeble — ankaŭ tiun, kiu koncernas la ekonomion, eĉ la pure financon aferon.

Ĉapitro pri literaturo preskaŭ neeviteble sekiĝas pro amaso da aŭtoraj nomoj kaj verk-titoloj. Sed D-ro Baur ja evitas sukcese tiun danĝeron, karakterizante la de etno, naturo, kaj historio determinitajn diversajn kaj tamen iel unuece “svisajn” kvar literaturojn, nome tiujn de la lingve alemana (-germana), franca, itala, kaj romanĉa landpartoj.

Montri la daŭre kreskantan kaj firmtenatan unuecon en la same kun obstino firmtenataj diverseco kaj multspececo de la svisa vivo, klarige konseigi pri ties fenomeneco, ja estas la ĉefa celo de la aŭtoro, kiu, cetera, malgraŭ sentebla patriotismo, rigardas sian patruon ne per rozkoloraj okulvitroj, sed ĉiam kun zorge alstrebita objektiveco.

Li ne prisilentas, ekzemple, ke la tre akcentate demokrata strukturo de kaj la unuopaj kantonoj kaj la Konfederacio en ĝia tuteco, kvankam en multaj rilatoj lume avantaĝa, havas tamen — aŭ eble ĝuste tial—ankaŭ sian ombran flankon.

Tiu libro, 144-paĝa, kun 24 paĝoj da belaj blank-nigraj ilustraĵoj, kaj titolita “La fenomeno Svislando” estas mem fenomeno, nome en nia originale Esperanta literaturo.

(Laŭ radio-parolado de D-ro Karl Beckmann en la kurt-onda servo de la aŭstria radio).

(Mendu ĉe A.E.A. Libro-Servo, 8 Lone Pine Pde., Matraville, 2036; proksimuma prezo \$5.50)

A.E.A. LIBRO-SERVO

(8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW. 2036)

PRAKTIKA BILDVORTARO EN ESPERANTO 95 p., broŝ (kolora) \$6.60.
SOCIOPOLITIKAJ ASPEKTOJ DE ESPERANTO, red. D. Blanke, 228 p. \$6.00.
BONAN TAGON, kaseto \$4.00.

La Libroperanto pardonpetas ke li fuŝis la prezon de “Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto”; ĝi estu \$6.45, ne \$9.60 (Junio AE). Pli da stoko estas jam survoje, ĉar nia originala stoko jam elĉerpiĝis.

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

LES SCOTT

A.E.A. Secretary and Treasurer.

Born in Geelong, Victoria (not saying when!)

Father an outstanding footballer and very clever with his hands.

Mother a singer and electionist ("a pearl of a lady" Dad said.)

Parents moved to a wheat farm near West Wyalong in Western N.S.W some 500 km west of Sydney, and 550 km north of Melbourne.

Travelling a distance of 10km each way, with his small sister and brother, to a small country school, in a horse and sulky under all weather conditions, he did very well. From the age of 8½ years, when he first started school, he had been helping on the farm during week-ends, and school holidays, even to driving a team of horses. His learning could not go beyond the primary school, because, due to the Great Depression, his parents could not afford to send him away to High School. In any case, he was needed on the farm where he was immediately put into service, caring for, and driving big teams of horses, pulling plows, drills, harvesters, etc. He recalls his valiant and vain attempt to learn French and German on a bumpy, stump-jump plow. His parents were poor and only ten shillings was available each week to buy the home necessities. The family did not starve, however, because it grew nearly all its own foodstuffs, including fruit, flour and bread, milk,

cream and butter.

The successful business career of this young man started in a most unusual way. He had a yen to build crystal and battery radios (no electricity in those days!) They worked — and his greatest thrill came when he found that he could sell them to the neighbours(!). Delivery was by horse-and-sulky express! Burning the midnight oil, building and selling radios, he yet rose at 5.30 a.m. to feed his horses for the day's work. There need be little doubt where he learned to do with scant sleep and whence he gets his boundless energy! For extra exertion, dancing and tennis were freely indulged in.

He said farewell to the farm at age 25, having packed his old car with all his life's possessions, to start a new life in business — in the Big Town — 15 miles away. Says he will never forget his poor mum's tears of pride and joy as she waved him good-bye. There began a local son's big success story.

As he progressed, he was able to acquire all leading agencies for the town, for radios and electrical appliances. He studied selling, business management and book-keeping in his spare time — not too plentiful, for he worked incessantly, day and night, and week-ends (100 hours a week not being uncommon!) Further success came, with the winning of two State sales competitions.

(To be continued)

IMPORTANT ANNOUNCEMENT ABOUT THE 22nd AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS IN SYDNEY

Through unforeseen circumstances, the congress will NOT take place at the University, but at the "WESLEY CENTRE", 210 Pitt Street, Sydney. We will reserve rooms with one, two, or three beds at the "People's Palace", 400 Pitt Street, Sydney, quite close to the Wesley Centre, and other hotel rooms for members who do not wish to go there. Single bed rooms will cost \$10 per

night, with cooked breakfast, two and three bedded rooms somewhat less. All meals are available at Wesley Centre, except for the banquet, which will be at the luxurious restaurant midway between the "Wesley Centre" and the "People's Palace", and will cost \$10 - \$12.

—R. G. Robertson, A.E.A. President

Mail your Congress Fee (\$15 00) to the Treasurer, Mrs. E. Matasin, 1 Coorabin Rd., Northbridge, 2063. Add at least \$10 for room deposit and a stamped, addressed envelope for your receipt.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$12.
(Individual, family, club, federation and
pensioner)
Full-time Students \$8



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.
Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063
Sekretario/Kasisto: S-ro L. V. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W. 2095
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 174 (254)

MELBOURNE

Okt.-Nov., 1979

SENATANO INAŬGUROS NIAN KONGRESON

Senatano C. V. J. Mason, la vicestro de la Aŭstralia Demokrata Partio, inaŭguros la 22-an Aŭstralian Esperanto-Kongreson en Sidnejo, la 3-an de januaro, 1980.

Senatano Mason estas entuziasmulo por la internacia lingvo, kiun li lernis kiel infano, kaj li salutas la kongresanaron en Esperanto.

Jen la programo de la kongreso:

Merkredon, 2-an jan., 1980.
10.00 - 12.30 Disdono de dokumentoj
11.00 A.E.A. kaj L. K. K. Komitatkunveno
2.00 Ekskurso: Urbaj vidindaĵoj (A)
7.30 Bonveniga vespero, aktualaĵoj pri la Kongreso

Ĵaŭdon, 3-an jan., 1980:
9.00 Gazetara Konferenco (Nur por ĵurnalistoj kaj klubaj reprezentantoj, elektitaj de la Komitato)
10.30 Oficiala Inaŭguro de la Kongreso
11 15 Fotografado
2.00 A.E.A. Aferkunveno (1)
7 30 Preleĝoj

Vendredon, 4-an jan., 1980:
9.15 Lingva seminario
10.15 U.E.A. Kunsido
11.00 A.E.A. Aferkunveno (2)
2.00 Ekskurso ĉirkaŭ la haveno (B)
7.30 Distra vespero

Sabaton, 5-an jan., 1980:
9.15 Lingva seminario
11 00 A.E.A. Aferkunveno (3)
6 30 Bankedo

Dimanĉon, 6-an jan., 1980:

10.00 Diservo ĉe preĝejo de Sankta Stefano
2.00 Ekskurso norden, Diservo ĉe Ba'hai preĝejo (C)
7.30 Arta vespero

Lundon, 7-an jan., 1980:

9.15 Lingva seminario
10.30 Fak-kunsidoj de SAT, ORE, PAPIE ktp.
2.00 Paroladetoj (prefere novuloj)
7.30 Dramo-Konkurso I

Mardon, 8-an jan., 1980:

9.15 Fak-kunsidoj (se necese)
10.30 Literaturaj eroj
2.00 Oficiala fermo
7.30 Dramo-Konkurso II

Merkredon, 9-an jan., 1980:

9.00 Tuttagaj ekskursoj
(D 1) Richmond-Windsor, aŭtobuse
(D 2) Hawkesbury River
7.30 Neformala vespero

Ĵaŭdon, 10-an jan., 1980:

Komenco de la Postkongreso ĉe Manly.

La LKK nepre devas scii kiom da kongresanoj partoprenos la diversajn ekskursojn kaj la bankedon. Se vi ankoraŭ ne decidis, TUJ sciigu la LKK (Box 415, Manly P.O., 2095). Ni devas lui aŭtobusojn, kaj aranĝi la menuon?
—M. Chaldecott.

Tagordoj de A.E.A. — Aferkunvenoj
Jaŭdon, 3/1/80: 2 p.t.m.

La Prezidanto malfermos la aferkunvenon.

Bedaŭresprimoj, Nekrologoj
 Protokolo de la 1978-aj aferkunvenoj
 Aferoj rilataj al la protokolo
 Raportoj de la Sekretario/Kasisto kaj la Libro-Servo

Elekto de la estraro.

Vendredon, 4/1/80: 11 a.t.m.

Korespondadoj

Propoj antaŭviditaj:

- (1) Dumviva membreco al S-ino A. Childs-Mee (S-ro Wre Chandler)
- (2) Stipendio por Esperantisto (S-ro M. Le Fevre)
- (3) Propoj sen averto

Sabaton, 5/1/80: 11 a.t.m.

Raportoj de la Federacioj kaj kluboj
 Loko kaj dato de la 1982-a Kongreso

Mardon, 8/1/80: 9.15 a.t.m.

Daŭrigo, se necese

— R. G. Robertson.

MI FERIS EN ESPERANTUJO

de Wre Chandler
 (Daŭrigo)

En Kolonjo, mi estis la gasto de S-ro Wm. Th. Oeste, renoma poeto en Esperanto kaj la germana. Ni vizitis interesajn partojn de la urbo, la imponan katedralon, la artgalerion, la romana-muzeon, kaj ruinaĵojn de la antikva kastelo. Estis feria tempo kaj multaj esperantistoj estis for. S-ro Oeste aranĝis kunvenon de naturistoj, inter kiuj estis mondfama ornitologo. Mi montris miajn lumbildojn, komentante en Esperanto kiun la sekretario de la loka E-klubo tradukis. Spite al miaj duboj, la afero bone sukcesis. Multaj personoj faris demandojn germane kaj mi respondis esperante. Vere estis interesa eksperimento, kiu bone sukcesis.

Mi ĉiam plendetale planas miajn veturojn. Mi aranĝis viziti la francan urbon, Lyon. Mia amiko, Claude Blanc, aranĝis por mi hotel-ĉambrojn je la elspezo de la loka klubo, kaj, ĉar estas feria tempo kaj la klubo ne kunvenas, ankaŭ halon kie mi montros miajn lumbildojn. Kiam mi alvenis en Lyon, Claude diris, "Ni ne atendis vin!" Alia aŭstraliano estis alveninta antaŭ du semajnoj. Li sin anoncis al la U.E.A. delegito, kiu, kredante ke estas mi, nuligis la rezervon de la hotel-ĉambro kaj de la halo. S-ro Blanc protestis: "Tio ne estas Wre Chandler; li ne estas tia homo".

Tamen, la aranĝoj estis nuligitaj, kaj oni kulpigis mian amikon pro la fuŝo. Kiam mi alvenis, ne estis lito por mi en Lyon, nek halo kie mi povos montri miajn lumbildojn. S-ro Blanc multe telefonis, sed li ne sukcesis aranĝi aŭ liton aŭ kunvenojn. Finfine estis aranĝite ke mi montru miajn lumbildojn kaj tranoktu en la hejmo de Simone Payet, filino de Claude, en la vilaĝo Chuzelles, for tridek kilometrojn de Lyon. Chuzelles estas belega vilaĝo en la valo de la Loire. Mi treege ĝuis mian viziton tie. Simone estas instruisto de biologio, kaj ŝia edzo, la vilaĝa kuracisto, estas amatora botanikisto.

Pro stulta miskompreno, mi gajnis du novajn amikojn, mi vizitis unu el la plej belaj lokoj en tuta Francujo kaj denove mi pruvis, ke Esperanto estas uzebla en situacio kie le plimulto el la aŭdantaro ne komprenas la lingvon.

Mi vizitis la malnovan urbon, Lyon, kie la plimulto el la konstruaĵoj datumas de la dek-kvara Jarcento. De la grundo de la katedralo de S-taj James kaj Mary, oni vidas panoramon de tuta Lyono, kaj de la valoj de la riveroj Rhone kaj Saone. Kun S-ro Lemaire, mi vizitis la malnovan urbon. Tie estas Roma teatro, preĝejo kun tre antikva astromomia horloĝo kaj tramo sur dentradaj reloj. Vere post la komenca miskompreno, mia vizito al Lyono estis unu el la elstaraj punktoj de mia ferio.

De Lyon, mi iris al Kastelo Gresillon, la Kulturdomo de Esperanto. Mi veturis kun ges-oj Mauri, membroj de la Lyona E-Klubo. Ni iris al Saumur, urbo mondfama pro multaj kasteloj. Tie ni iris aŭtobuse al Bauge, kie situas Kastelo Gresillon. Ni veturis de la stacidomo al la kastelo per la aŭto de la Kulturdomo. Alveninte ĉe la kastelo mi aŭdis de trietaĝa fenestro, "Saluton Wre!" Estis Audrey Mee, kiu instruas tie. Mi loĝis tie, en komforta domo, ses tagojn. Mi ne aliĝis al iu klaso, sed observis en kelkaj klasoj. Mi eĉ instruis, laŭ la peto de S-ino Helene Christos, la Literaturan klason dum unu mateno. Mi kredas ke mi estas la unua aŭstraliano kiu instruis klason ĉe Gresillon.

Matene, estas klasoj, posttagmeze oni ekskursas aŭ promenas en la bela ĉirkaŭaĵo. Vespere estas distraj kunvenoj. Mi havis la plezuron montri miajn lumbildojn tie. Unu vesperon blindulino prelegis pri Louis Braille. La distraj programoj ĉiam estis en Esperanto. Miaj ses tagoj ĉe Gresillon certe estis ferio en Esperantujo. Dum mia vizito tie, mi renkontis plurajn samideanojn, kiuj estis ĝis tiam, nur nomoj kiujn mi konas.

De Gresillon, la vojo al Lucerno estis longa kaj iom streĉa. Kun S-ino Annie Spencer el Brizbano, kaj unu morokano, mi veturis, per aŭto al Saumur, per trajno al Lyon, al Genevo, al Lausanne, kaj finfine al Lucerno. La tuta veturo okupis pli ol dektri horojn, kaj ni alvenis iom lacaj.

Ĉe Lucerne, la Kongreso okupis la plimulton de mia tempo. Tamen, estis pluraj tre interesaj ekskursoj. Mi tre ĝuis mian viziton al Monto Titlis. Ni iris per malvast-spura fervojo al Engelberg. Tie per unu dentrada linio kaj tri telferoj al la supro de la monto, alta 3020 metrojn (10000 futojn).

La lasta telfer-kablo svingas pli ol 2 kilometrojn, tute sen apogilo. Ĝi transiras grandan glaciriveron, kiu pro la komera sunlumo fendiĝas okulfrape. Sur la monto ni vidis multajn monto-korvojn, *Pyrrhocorax graculus*, kiuj venis al la restoracioj por peti nutraĵon. Ĉi tiuj birdoj trovigas nur sur la alpoj, ordinaraj pli ol 2,000 metrojn super la marnivelo.

Ni vidis skianton kiu faris ĉirkaŭsalton, tre okulfrapan ekzercon. Venis sur la monton neaŭto. Tiu tutcerte grimpis tre malebanan vojon super la glacirivero.

Alia interesa sperto ĉe Lucerno estis la kunsido de la Veterana Esperantista Asocio. Prezidis S-ino Walder, naŭdektrijara jubileanino. Tiu ĉi maljunulo estis vigla kaj bone regis la kunvenon, kie la ĉefa problemo estas la deziro de maljunuloj paroli nur pro la plezuro aŭdi la propran voĉon.

Post la Kongreso, mi vizitis Zurich-on kaj Schaffhausen. Tamen, post la Kongreso, mi ne plu feris en Esperantujo, krom en Londono, kie mi denove loĝis ĉe Ges-oj Buttiger antaŭ ol flugi hejmen.

Vere, ĉiu esperantisto devus minimume unu fojon partopreni Universalan Kongreson, kaj por plene sperti la "Grandan Rondon Familian" viziti E-klubojn flaj samideanojn antaŭ kaj post la Kongreso mem.

PRIPENSOJ DE ESPERANTISTA MALJUNULO

(Memore al renkontiĝo kun amiko H. Koppel ĉe la 64-a Kongreso en Lucerno)

De jam multaj jaroj oni povas konstati, ke niaj Universalaj Kongresoj kunvenigas grandparte samideanojn aĝajn, eĉ tre aĝajn. Ne multaj junuloj partoprenas al tiuj kongresoj.

Mi ne forgesas, ke ĝenerale la junuloj ne disponas pri sufiĉe da mono. Tamen,

mi memoras, ke oni renkontis pli multajn junulojn en niaj kongresoj.

Esperanto progresas certe, sed ne rapide pro tio, ke en nia epoko, ĝi ŝajnas ne interesi la junularon, kiu preferas la diversajn proponitajn sportojn kaj la amuzojn, ne komprenante la utilan celon de nia movado. Tiu fenomeno ekzistas en mia lando kaj en multaj aliaj landoj.

Ĉar mi estas veterano kaj ke longtempe mi gvidis Esperanto-kursojn, mi povas diri, ke antaŭ la 2-a mondmilito, ĉiujare dekoj da lernantoj sekvis regule niajn kursojn. Nun, ni varbas apenaŭ kelkajn, kiuj kelkfoje forlasas rapide la aferon.

Persono, mi bedaŭras tiun situacion se oni konsideras, ke universala lingvo fariĝas pli kaj pli necesa por la rilatoj internaciaj, ankaŭ pli kaj pli oftaj.

Por paroli pri mi mem, sciu ke mi lernis Esperanton kiam mi estis tre juna. Mi estis 11-jara kiam mi komencis kaj mi havis la bonan ŝancon ĉeesti la grandan kunvenon, kiu okazis en Kalezo (Calais) en la jaro 1904 por prepari la 1-an Universalan Kongreson. Ankaŭ en la jaro 1905, mi partoprenis tiun unuan kongreson en Boulogne-sur-Mer, kune mia patro pro mia tre juna aĝo. Dum tiu kongreso, mi havis okazon renkonti D-ron Zamenhof kaj la aliajn pionirojn ĉeestintajn.

kongreson en Boulogne-sur-Mer, kun por paroli kun tiuj gravaj personoj, mi nur aŭskultis ilin. Mi konfesas, ke miaj memoroj fariĝis konfuzaj pri kio okazis ĉe evento datumanta de tiel longe.

De tiu epoko restas tre malmultaj esperantistoj. En Francio, bona amiko de mi, iom pli aĝa, kiu ankaŭ estis en Boulogne-sur-Mer, mortis lastan jaron. Ĉu ekzistas aliaj en mia lando, mi ne scias. Mi nur esperas, ke mi restos sufiĉe vigla por ankoraŭ partopreni plurajn Universalajn Kongresojn.

—Maurice Valluet, 14 Route d'Olivet, Orleans, Francio.

Iu bubo ne sukcesis solvi tre simplan problemon kaj la lerneja inspektoro al li admone diris: "Ĉu vi scias, ke je via aĝo George Washington estis jam termezuristo?"

"Jes, sinjoro," respondis la bubo, rekte rigardante en liajn okulojn, "kaj je via aĝo li jam estis prezidanto de la Unuiĝintaj Statoj."

Ideoj similas infanojn — la propraj estas mirindaj.

KION RICEVAS EMERITO — PENSIONON AŬ PENSION?

Bernard Golden

Lastatempe mi legis en internacie konata Esperanto-gazeto:

“. . . la redaktorino de "Heroldo" disponas pri neniu socia avantaĝo, dum balaistino krome ricevas ĉiujn laŭleĝajn askurojn por pensio kaj senpaga kuracado . . ."

(**Heroldo de Esperanto**, 1978, n-ro 1640, p.m).

En alia periodaĵo aperis jena nekrologo: "Erzsébet Horvath, pensionita instruistino, fervora kasistino de la Pedagoĝa Esperanto-Grupo . . . mortis la 10-an de Majo . . ." (**Budapeŝta Informilo**, 1974, Julio-Aŭgusto, p. 11).

El revuo eldonita en la sama lando venas tria ekzemplo:

"Estis elektita honora membro de la Asocio . . . d-ro Jozsef Mateffy, pensionita prez. de la Supera Tribunalo . . ." (**Hungara Vivo**, 1977 : 3, p. 19).

Iam mi renkontiĝis kun malnova esperantisto, kiu cetere estas instruisto pri lingvoj. Dum la konversacio, li menciis, ke li nun estas "pensionita". Mi certigis, ke tio ne estis langerano, kiam li plurfoje ripetis la saman vortformon.

Cu la vortoj "pensiono" kaj "pensionita" estas ĝuste uzataj en la ekzemplo-frazoj? Laŭ **Plena Ilustrita Vortaro** (PIV), "pensiono" estas "domo, kie oni povas konstante loĝi kaj manĝi, pagante interkonsentitan monsumon", Estas evidente, ke tiu ĉi signifo tute ne taŭgas en la tri cititaj frazoj. Kial? (Anglalingve "pensiono" estas **boarding-house, pension; boarding-school**.)

Ni havas aferon tie ĉi kun paronimo, kiun PIV difinas jene: "vorto preskaŭ samsona kiel alia, sed sence malsama." Vorto, kiu sonas simile al "pensiono", sed havas alian signifon estas "pensio". I a sama vortaro klarigas, ke tiu ĉi estas "sumo, konstante kaj periode pagata al eksiginta oficisto, servisto, al neaktiviginta profesiulo aŭ metiisto, kiam tiu atingis difinitan aĝon kaj laboradis dum difinita nombro da jaroj." Tiu signifo faras la tri frazojn pli senchavaĵ. ((Anglalingve "pensio" signifas **retirement pension**.)

Kial, do, okazis erara vortuzo en la tri cititaj frazoj, kiuj ne estis verkitaĵ de lernantoj en komenca kurso? En antaŭa artikolo, "La problemoj de paronimoj en

Esperanto" /**Paco**, 1978 : 3, p. 10-11/, mi detale pritraktis la malfacilaĵojn, kiujn paronimoj kaŭzas en Esperanto ĉe ĉiuj niveloj de lingvolernado kaj uzado. La konfuzo pri la du vortoj rezultas ne nur, ĉar ilia supra aspekto similas. La **Naŭlingva Etimologia Vortaro** de Louis Bastien donas la kialon de la malfacilaĵo. Ambaŭ Esperantaj vortoj, "pensio" kaj "pensiono" devenas de la sama latina etimo, la substantivo **pensio/pensionis**, kiu siavice venas de la verbo **pendere**, havanta la signifon "mezuri, pesi, pagi: pensio oni pagas al emerito, kaj en pensio oni pagas por manĝi. Plue, en ses naciaj lingvoj listigitaj en tiu etimologia vortaro, ambaŭ vortoj havas identan formon:

franca: pension	itala: pensione
portugala: pensao	angla: pension
hispana: pension	germana: Pension

Estas evidente, ke parolantoj de tiuj lingvoj malfacile lernas la diferencojn inter la du preskaŭ identaj Esperantaj vortoj, kaj pro tio ili nekonscie uzas anstataŭ la radiko "pensi-", la paroniman radikon "pension-", ĉar tiu ĉi similas al vorto en la gepatra lingvo. Sed eĉ kiam la nacia lingvo havas tute malsimilajn vortojn por "pensio" kaj "pensiono", kiel la hungara **nyugdíj** kaj **pensio**, eraroj povas okazi — du el la citaĵoj venas de hungarlandaj eldonaĵoj — do denove estas necese reliefigi la fakton, ke la troa simileco ĉiam kaŭzas heziton rilate la uzon de la ĝusta vorto. Oni pensu ĉi-rilate pri la oftaj eraroj, kiujn okazigas la paro "pesi/pezi".

Restas ankoraŭ unu malfacilaĵo. PIV registras "pensii" kiel verbon kun la transitiva signifo "pagi pensio al iu"; la netransitiva "pensiiĝi" signifas "fariĝi pensiulo". Tamen, en la franca-Esperanta vortaro de Grosjean-Maupin "pensiumi" estas la verbformo havanta la signifon de "pensii". La Esperanta-hungara vortaro de Alfonz Pechan registras ambaŭ verbojn, "pensii" kaj "pensiumi", kun jenaj nuancoj: la unua verbo, same kiel en PIV, signifas "pagi pensio al iu", dum "pensiumi" ricevas la signifon "doni al iu la staton de pensiulo" aŭ "listigi iun kiel pensiulon".

Mi proponas jenan "solvon" por malpligrandigi la eraran vortuzon. Aliloke en PIV troviĝas la vorto "emerito",

preskaŭ-sinonimo de "pensiulo", kiu estas difinita kiel "oficisto, kiu post difinita tempo de servado, forlasas honore la oficon kaj ricevadas pension". Estas eble pluformi la radikon "emerit-" por ricevi vortojn, kiujn oni poste povas substitui al "pensivortoj", por ke estu maksimuma kontrasto inter la vortformoj.

emerito — pensiulo
emerituro — pensio
emeritiĝi — pensiigi

Tiel estas pli facile memori, kiu vorto temas pri pago ricevita post periodo de laboro, kaj kiu vorto rilatas al pago por manĝado.

En La Veprejo.

La gimnorin' kaj la akacifloro—
Kun kia kant' la birdo nin fascinas!
Kun kia forto ŝvebas laodoro!
Kaj kune ambaŭ ĉion ja dominas.
El eŭkalipto kukaburo sone
Elglugas ĝojan ridon nin ĉarmante,
Kaj fore ĉe la arbfiliko fone,
Menur" imitas ĉiun sonon kante;
Kaj el la fibroŝela arb' tre brile
Konura birdamaso sin ekjatas,
Sed super ĉio gimnorino trile
La ĝojan belan kanton nur ripetas.
—Ken G. Linton.

Glosaro: gimnorino — magpie
kukaburo — kookaburra
menuro — lyrebird
konuro — parakeet



USONA MARARMEANO VIZITIS PERTON

Nekutiman sperton havis Pertaj gesamideanoj lastatempe. De la 20-a ĝis la 24-a de oktobro, la usona aviadil-ŝipo USS MIDWAY vizitis Fremantle. Sur tiu ĉi moderna ŝipo, kies hejmhavono estas Yokosuko, Japanio, troviĝis juna Esperantisto Billy Waldon, kiu estas ano de le Ĉerokia tribo de usonaj indianoj de Oklahoma.

Li komencis lerni Esperanton el lerno-libro, sed kiam li alvenis en Japanio li sciis nur kelkajn frazojn. Sed li persiste daŭrigis sian studon per usona sonbendkurso kaj per "Jen Nia Mondo", kaj

renkontis tiel multajn esperantistojn en la Japana Esperanto-Instituto en Tokio, ke nuntempe li tre flue parolas. Per sia ŝipo li ankaŭ renkontis esperantistojn en Tajlando, la Filipinaj Insuloj, Suda Koreo kaj Hongkongo.

Pertaj esperantistoj regalis lin en siaj hejmoj kaj aŭtomobile montris al li la belegan ĉirkaŭaĵon de Perth. Unu vesperon Billy vizitis la klason de S-ino Vera Payne ĉe la "Subiaco Technical Centre" kaj alparolis la studentojn pri spertoj en Japanio kaj aliaj aziaj landoj.

Kulmino de lia vizito estis kiam Billy gastigis Pertajn esperantistojn sur sia ŝipo. Li montris al la vizitantoj ĉion permesatan, de la suba ferdeko ĝis la supro de la kontrol-turo, inkluzive la aeroplan-ojn kaj la elektronikajn instrumentojn, pri kiuj li mem respondecas. Sekvis regalo de la vizitantoj en la restoracio de la ŝipo, kie ĉiuj ricevis bongustajn manĝaĵojn. Kiel adiaĵon donacon, ĉiuj ricevis saketon de bongustaj "Midway Kuketoj".

● **ADELAIDE:** Je la 18-a de okt. ni havis specialan kunvenon ĉe la Y.W.C.A. por bonvenigi Ges-rojn H. Koppel, el Melbourne. S-ro Koppel prelegis pri sia vojaĝo al Luzern, kie okazis la 64-a Universala E-Kongreso. Post 2-semajna vizito en Svislando, Ges-roj Koppel vizitis la Princlandon Liechtenstein kaj Aŭstriaon. S-ro Koppel ilustris sian prelegon per kolor-diapozitivaj kaj fine aŭdigiis radio-intervjuon de la Esperanto-emisio de la Aŭstria Kurtonda Radio-Servo.

● **MELBOURNE:** Dek ok esperantistoj de ĉiuj 4 Melburnaj grupoj partoprenis, 24/9, la "Amerikan Teon" en la Esperanto-Domo. La enspezo por la vespero estis \$43.44. Semajnon poste, S-ro Ken Linton, legis tradukitajn historietojn.

S-ro P. Daŝgupto, 8/10, priskribis siajn impresojn pri la vivo en Aŭstralio. Tiu estis lia lasta vizito al la Melburna E-Societo, antaŭ ol reiri al Nov-Jorko. Je 15/10 S-ro S. Stepanov faris tre interesan prelegon pri "La Artikolo en Esperanto" kaj pri la evoluo de la lingvo laŭ la uzantoj kaj literaturistoj, kiuj malfaciligis la lingvon.

Ĉe la amuzvespero de 29/10, S-ro H. Koppel prelegis, kun lumbildoj, pri vizitoj al princlando Liechtenstein, Innsbruck, Salzburg kaj Vieno.

● **OAKLEIGH, Vik:** Post longa ferio en Okcidenta Aŭstralio kaj la Norda Teri-

torio, F-ino Ann Hearne revenis kun interesaj rakontoj. Dum ŝi estis en Perto, ŝi partoprenis kunvenon de la Ligo, kiam D-ro Einihovici parolis pri sia vojaĝo al Svislando. Ŝi ankaŭ raportis, ke S-ino Vera Payne ĵus finis Esperanto-kurson per radio por infanoj, bazitan sur la konata lernolibro 'Esperanto por Infanoj'.

—I.F.

● **HOBARTO:** S-ro Kam Lee, 19/10, aranĝis Esperanto-Kunvenon en la Universitato. S-ro Kam Lee ludis la gitaron kaj kun alia studento kantis Esperanto-kantojn. En la dua parto de la kunveno ni legis kaj tradukis humuraĵojn kaj anekdotojn.

—E. Loorits.

● **SYDNEY:** S-inoj M. Duncan kaj P. Ford-Lewis de la Manly-grupo, 17/9, gvidis ekzercadon de kantoj por la venonta kongreso. Alterne kun la kantoj, S-ino M. Chaldecott kondukis "Kvizon". Je 24/9 Tom Elliott parolis pri simioj, goriloj kaj ĉimpanzoj.

Je 8/10 Wre Chandler montris lumbildojn pri sia vojaĝo de Sidnejo, per ŝipo, al Anglujo kaj poste al la Univerŝala Kongreso. Elstaris bildoj pri ondegoj ekster lia kajuto en la Granda Aŭstralia Golfego kaj pri rokegoj ekster la Pilatus-Restoracio.

Per poŝtkartoj, fotoj kaj diapozitivoj, Bettie Hart regalis nin pri diversaj vojaĝoj al Azio, Centra kaj Norda Aŭstralio, kaj Eŭropo, kie ŝi ĉeestis kurson en Gresillon kaj la kongreson en Luzern.

—M. Chaldecott.

● **BRISBANE:** La 15-an de oktobro Trevor Steele estis gastparolanto ĉe la monata kunveno de Brisbane-Rotaract. La 22-an de oktobro Ray Ross, kun helpo de kantgrupo, prezentos Esperantan informsesion dum kunveno de la Asocio de Junular-Gastejoj. En novembro ni denove partoprenos "Hobby Exhibition Week" en la Urdomo en Brisbane. La Zamenhof Festo okazos je 15-a dec., ĉe St. Albans Hall, Wilston. Interterpe la kantgrupo kaj la dramo-grupo okupiĝas pri eroj por prezentado dum la aŭstralia kongreso en Sidnejo.

—Ray Ross.

● **ST. LUCIA** (Kvinslando) En la "Express", Brizbana antaŭurba semajngazeto, aperis ĉi tiu novaĵo: "Por la 14-a de novembro studentoj de la internacia lingvo Esperanto invitis nuntempajn kaj antaŭajn membrojn ĉeesti matenan temanoon. S-ino Annie Spencer parolos sia ferio ĉe Rotterdam, Kastelo Gresillon en Francio, kaj la Lucerna Kongreso."

Dum la foresto de Annie, ŝia klaso de komencantoj studis kun la mezgrada kurso de S-ino Greenhalgh, kaj faris bonan progreson.

Du membroj rezignis ĉi tiun monaton — nia prezidantino Joycelyn Munro, pro malsano, kaj nia kasistino, Joy Coulter, ĉar ŝi nun loĝas ĉe Emu Parko. Ŝi jam aliĝis al la kurso de John Moore. Je la kunveno de 17/10, la membroj elektis Allan Munro kiel prezidanton kaj June Cullen kiel kasistinon, ĝis la jarkunveno en februaro.

EL LA FEDERACIOJ

● **Kvinslando:** Ĉe Caloundra, la 13-14 an de oktobro, okazis la dua konferenco en 1979. La loĝejo estis la "Palm Breeze Motelo (tre komforta); la ĝenerala kunveno, vespermanĝo kaj distraĵo lokiĝis en la apuda presbiteriana halo. Agrabla printempa vetero, dum la tuta semajnfino, certigis plensukcesan konferencon.

Delegitoj raportis pri klubaferoj: Joyce Turner (Rockhampton, Emu Park), Ray Ross (Brisbane), Alec Morrison (Ipswich) Decie Shonhan (St. Lucia), Sandra Connors (Toowoomba); Doris Sinclair (Sunshine Coast).

Elektiĝis la jena nova Estraro por 1980: Patrono: S-ro M. J. Ahern (MLA, Landsborough); Prez: S-ino Doris Sinclair; Vic-Prez: Ray Ross kaj Alec Morrison; Sekretario: F-ino Bev. Allatt; Kasisto: S-ino Wanda Stadham; Redaktoro: S-ro Ray Ross; Protokolo: S-ro Cliff Bailey.

La maja konferenco 1980 okazos en Ipswich. Estis proponite, ke St. Lucia aranĝu la konferencon en oktbro.

Sabatvespere, post la kutima vespermanĝo, okazis distra vespero, kun prezentado de dramo, skeĉoj, kantoj, lumbildoj, prelegoj.

Dimanĉmatene, survoje al "Esperejo", la bieneto de Doris kaj Harry Sinclair (Peechester), ni vizitis grandan 'Pulbazaron' apud Caloundra, por aĉeti, inter aliaj trezoroj, diversajn fruktojn. Ĉe "Esperejo", ni partoprenis ludojn kaj poste pikniklunĉon. Gratulojn kaj dankojn al Doris, kiu sola prizorgis la konferencon por la Sunbrila Marborda Grupo.

—Ray Ross.

● **Nova Sudkimrujo:** Konferenco okazis la 20-an de okt. en la Esperanto-Domo en Redfern. Partoprenis 15 membroj. Ni ne ricevis raporton pri la konferenco, sed eksciis ke S-ino Shirley Fanos estas la prezidanto por 1980, ke Wre Chandler

raportis pri literatura konkurso en 1980 kaj ke S-ro James Harwood klarigis proponon pri stipendio por junuloj.

● **Viktorio:** La ĉiujara Seminario okazis je 10-a de nov. en la Kvakera Domo en Toorak. Estis tuttaga aranĝo, de la 9-a matene ĝis la 10-a vespere. Partoprenis 22 geesperantistoj, inklude de S-ro Mac Le Fevre (kun edzino), membro de la Tasmania Parlamento.

Komencantojn instruis S-inoj I. Fallu kaj B. Podmore kaj la progresintojn instruis S-ino Fay Koppel. Don Pescod gvidis krucvort-enigmon kaj la grupoj de Oakleigh kaj Malvern prezentis amuzajn dialogojn. Vespere, S-ro H. Koppel prelegis, kun diapozitivaj, pri sia vojaĝo al Svislando, la 64-a Universala Kongreso en Luzern kaj vojaĝoj tra Svisio. La seminario finiĝis per popol-dancado.

La 45-a Kongreso de la Nov-Zelanda E-Asocio

okazos, 5-9-a de januaro, 1980, en la "Centra Instituto de Teknologio" en Heretaunga, en la Hutt-Valo, proksime al Wellington.

Aŭstraliaj esperantistoj, kiuj hazarde ferios en Nov-Zelando dum la kongreso, estos bonvenaj; ili ne pagos kongreskotizon. Kontaktu la sekretariinon, S-inon M. Richardson, 78 Thackeray St., Upper Hutt, N.Z.

NEKROLOGOJ

ERNEST E. THOMPSON

Mortis je 23/5/1979, en Shepparton, Viktorio, S-ro Ernest E. Thompson, 82-jara. Li naskiĝis je 29/9/1896.

Dum multaj jaroj li estis fidela membro de la Melburna E-Societo kaj aktive partoprenis en la laboro por la kluba biblioteko. Li multe korespondis kun transmaraj esperantistoj kaj en 1965 li ĉeestis la 50-an Universalan Kongreson en Tokio.

Pro maljunaĝo, li translokiĝis antaŭ kelkaj jaroj al komforta loĝejo por maljunuloj ĉe "Banksia Lodge", Tarcoola, Shepparton.

AMY GODFREY

Unu plej vigla, plej entuziasma, plej firmopinia kaj spite plej aminda ano de la Melburna E-Societo dum proks. 60 jaroj estis Amy Godfrey, kiu post 3-jara malsano mortis 25/8/1979 en sia 92-a jaro, en Surrey Hills.

Amy naskiĝis 7/11/1887, samjare kiel Esperanto, kaj pasigis sian junaĝon en

Londono, fiero pro la policista ofico de la patro, Antaŭ sia 17-a jaro ŝi orĝiĝis kaj en 1913 ŝi akompanis la pli junan, malsanetan fratinton, Elsie (mortis 3/4/1969), al la pli bona klimato de Aŭstralio.

Ambaŭ fratinoj esperantiĝis en Anglujo, sub instruado de Montague Butler, kaj kune, sed diversmaniere, ili aktivis en Melburno.

Post alveno en Aŭstralio Amy provis plurajn metojn antaŭ ol decidi ke fikshora okupo ne konvenas al ŝi, kaj per obstino kaj persisto ŝi sukcesis aĉeti brodmaŝinon kaj akiri necesajn mendojn de rob-fabrikistoj. Tiel ŝi vivienis sin ĝis la aĝo 87.

Kvankam ofte agaca, ŝi multe kompensis per bonhumoro kaj amuzaj vidpunktoj rilate la vivon; avida por scio pri la literaturo, la muziko, la arto kaj la historio, ŝi multe legis kaj tiel bone memoris, ke ŝi povis informe respondi al multaj demandoj per bildiga lingvaĵo. Krom partopreni pianludan kurson de la Konservatorio, ŝi estis fervora membro de la Marŝklubo por Virinoj, kaj marŝis mejlojn ĝis meze de sia 8-a jardeko.

En fruaj jaroj, Esperanto-rondoj kaj klubprogramoj gajniĝis pro skizoj kaj teatraĵetoj, kiujn ŝi verkis. Senmombraj estas la viz'itaj verdstelanoj, kiujn ŝi malavare gastigis hejme dum, kun la fratino, ŝi simile deĵoris ĉe la tetaso en la kadro de la monata kunveno "Rendevuo". Ŝi partoprenis multajn aŭstraliajn kongresojn, kaj en 1963, meze de longa elĉerpiga transmara vojaĝo, ŝi salutis la Universalan Kongreson en Sofio, nome de A.E.A.

La junaĝa spirito, laŭ kiu ŝi vivis, montriĝis en ŝia obstina rifuzo ĝis la fino, malkaŝi sian aĝon.

—Fay Koppel (dank'al multe da informo ricevita de Eddie Hearne).

DUA PACIFIKA ESPERANTO-KONGRESO

26-29 julio, 1980

La Organiza Komitato ius anoncis ke S-ro Ralph Harry konsentis esti Patrono de tiu kongreso. Ĝi ankaŭ invitis S-ron Herbert Koppel (la sekretarion de la 1-a Pacifika Kongreso), akcepti la postenon de Honora Prezidanto.

La kongreso okazos en Vancouver, en la Universitato de Brita Kolumbio. Kongreskotizo estas \$20 (kanadaj dolaroj) ĝis 1-a de feb., 1980, kaj \$25 post tiu dato.

Sampempe kun la Pacifika Kongreso okazos ankaŭ la Nord-Amerika kaj la Kanada E-Kongreso. Petu pluajn detalojn de la sekretario, 373 Guilby Street, Coquitlam, B.C., V3K, 3Y5, Kanado.

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

LES SCOTT

A.E.A. Secretary and Treasurer

Last month we left Les, exulting in winning two Sales Competitions in the electrical trade. Now, read on . . .

The whole district became electrified, and sales were booming. Then came television, which provided another boost. Les and his staff provided a full service on all products sold. He claims he always had a happy staff, believing in the principle that he would not ask any of them to do what he could not, or would not, do himself!

After 26 years, he sold the electrical retail business, to build and establish the True Blue Motel, at West Wyalong. It operated profitably for several years.

During his business life in the country, Les was quite active in civic and community affairs, holding office in the Rotary Club Chamber of Commerce and several other organisations. He has no war record, as he was manpowered during the war years, to maintain radio communication equipment through his electrical service department.

With his wife, Bess (a local girl) and a family of four (two sons and two daughters) he came to establish a home in Manly, and to further the education of the family. All four have since graduated.

Selling the motel late in 1969, Les lived in retirement in Manly for four years, when he was urged to become active again, by an opportunity to re-

enter the selling field. He has been gleaming in this field ever since. He has been gaining too, in his new field of endeavour and has no thought of retiring, he says.

In Manly, Les has been an active member of the Manly Rotary Club. He enjoys his tennis, and besides being a keen student of languages, owns several musical instruments — organ, mouth-organ, accordions and a "stylophone"— and has been glad to help out on many social occasions.

He commenced learning Esperanto in May 1968, and soon became a close friend of the late "Tiny" Goldsmith. As a result of pressure from "Tiny", he became Treasurer of A.E.A. in 1970, almost 10 years ago. Some three years ago, he also took over the role of Secretary, when would-be labourers were few. Although extremely busy in his own occupation, he has efficiently carried out the duties of both these important offices since then. It will also be remembered that for several years he held positions on the Committee of Management of the N.S.W. Esperanto Federation, and succeeded in consolidating that body, virtually acting as its administrator for some considerable time.

Attending his first Universal Esperanto Congress in Lucerne this year, he officially represented A.E.A. at the opening and took part in committee discussions on behalf of Australia's Chief Delegate, Ken Linton. — Arthur Cocking.

22nd AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

Jan. 2 - 9, 1980 — Sydney.

This congress will be held at the "Wesley Centre", 210 Pitt Street, Sydney. Most congress members will live at the "People's Palace", 400 Pitt Street, Sydney, but, of course, you are free to choose another hotel, if you wish.

Congress Fee: \$15.00

Mail your Congress Fee to the Treasurer: **Mrs. E. Matasin, 1 Coorabin Road, Northbridge, 2063.** Add at least \$10 for room deposit and a stamped, addressed envelope, if you want a receipt.

Fourth List of Congress Members:

93. Gaye Phillips, Brisbane.
94. Jacqueline Walker, Perth
95. Annie Spencer, Brisbane.
96. Svetislav Kanački, Melbourne
97. Myrtle Straker, Sydney.
98. Blair Silverlock, Perth.
99. Neil McCurrin, Brisbane.
100. Roger Springer, Manly.
101. Walter Gassner, Sydney.
102. Kitty Gassner, Sydney.
103. Vlado Kosef, Cobar, N.S.W.

State Distribution: N.S.W. 55, Queensland 17, Victoria 15, Tasmania 5, Western Australia 5, A.C.T. 3, South Australia 1, Northern Territory 1, Japan 1.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$12.
(Individual, family, club, federation and pensioner)
Full-time Students \$8



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.
Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063
Sekretario/Kasisto: S-ro L. V. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W. 2095
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 175 (255)

MELBOURNE

Decembro, 1979

NOVJARA MESAĜO DE LA PREZIDANTO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Dum la jardeko, kiu nun malfermiĝas antaŭ ni, la Internacia Lingvo Esperanto fariĝos centjara. Tra la jaroj deposed 1887, la lingvo alportis ĝojon kaj feliĉon al milionoj da homoj. Ĝi malfermis la horizontojn al simplaj civitanoj, ĝi dissemis sentojn de internaciismo kaj kompenemo en mondo malpaca, ĝi kreis kulturajn pontojn inter la nacioj, kaj ĝi ebligis praktikan komunikadon inter la homoj en spirito de egaleco.

Ĝia influo etendiĝis preter la uzantojn mem. Scioj akiritaj per Esperanto penetris en la sociojn, kaj la principoj de esperantismo efikis ankaŭ ĉe tiuj, kiuj ne konas la lingvon mem. Kvankam la rivaleco inter la grandaj naciaj lingvoj ankoraŭ regas en multaj internaciaj rilatoj, Esperanto abunde montris, ke ĝi kapablas plene ludi la rolon de efika internacia lingvo komunikilo.

TRANSMARAJ REDAKTOROJ KAJ ELDONISTOJ ATENTU

Bonvole notu ke la adreso, por sendi viajn interŝanĝ-ekzemplerojn kaj librojn por recenzo estas:
"ESPERANTO", Box 2122T,
G.P.O. Melbourne, 3001,
Aŭstralio.

Restas tamen la demando, ĉu tiu lingvo plene elprovita fariĝos akceptita de la grandaj internaciaj organizaĵoj, la diverslandaj edukaj sistemoj, kaj la ĉiam kreskanta nombro da homoj, kiuj partoprenas la internacian komunikadon. Restas la demando, ĉu oni utiligos ĝin kiel lingvon de la nova komunika teknologio. Aŭ ĉu oni preferas solvi li internacian lingvan problemon per diskriminaciaj solvoj, favore certajn naciojn kaj lingojn, kaj malfavorante aliajn.

La respondo al tiu demando restas parte en la fluo de la historio; sed parte ĝi restas en la manoj de la parolantoj de Esperanto. La mondo ne venos al Esperanto kvazaŭ nature. Se tiel estus, ĝi venus al paco kvazaŭ nature, ĝi venus al malarmado kvazaŭ nature, kaj ĝi estingus homan kruelecon kaj homan mizeron kvazaŭ nature. Male, ĝi venos al Esperanto ĉar parolantoj de tiu lingvo konscie kaj harmonie kaj sagace laboros por tiu celo, forigante la sencion kaj farante el skeptikuloj konvinkitojn. Oni ofte aŭdas, ke ekzistas antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto, sed vere la ĉefa malhelpo estas sencio, kaj prudentaj duboj forigebaj per pravaj argumentoj.

Ĉu, do, la jardeko de la 1980-aj jaroj estos la jardeko de Esperanto, la

jardeko, en kiu oni fine konsciigos pri la maljuz teco kaj la nenecesaj kostoj de la nuna internacia lingva reĝimo? Lingvoj ne kreskas kiel arbaraj fungoj: ili bezonas jardekojn, eĉ cent jarojn, por maturiĝi. La Internacia Lingvo jam kreskis kaj maturiĝis: ĝi staras nun preta por tiuj, kiuj pretas utiligi ĝin.

En decembro 1979 kompletigas 25 jaroj da rekono de Esperanto flanke de UNESKO: la fama rezolucio subtena al Esperanto estis akceptita de la Generala Konferenco en 1954. Tiu datreveno koincidas kun nova erao en la rilatoj kun Unesko kaj UN, inaŭgurita de la vizito de la Generala Direktoro de Unesko al nia kongreso en 1977 kaj nun de la malfermiĝo en Novjorko de nova oficejo de UEA kies specifa celo esas fortigi la rilatojn kun UN. En la jaro nun finiĝanta la sekretario de Ekosok vizitis nian kongreson, kaj UEA estis elektita al gvida rolo en la konstanta komitato de neregistraj organizaĵoj ĉe Unesko.

UEA mem estas pli forta, pli harmonia kaj pli finance kaj morale stabila ol ĝi eble iam ajn estis. Niaj membroj estas lojalaj kaj sindonaj. Kaj novaj moviĝoj de intereso pri Esperanto animas kontinentojn antaŭe apenaŭ tuŝitajn de la Internacia Lingvo.

Staras preta la lingvo Malfermiĝas al ni iom post iom la internaciaj organizaĵoj, la publika opinio Pretas nia Asocio. Je tiu ĉi favora epoko, je la sojlo de nova jardeko, ni redediĉu nin al la laboro por la Internacia Lingvo per novaj fortoj. La jaro 1980, kaj la tuta jardeko, kiun ĝi inaŭguras, alportu pli pacan, justan kaj harmonian mondon, kie la spirito de egaleco kaj kompreniĝo animas ankaŭ la lingvan kampon per la Internacia Lingvo Esperanto.

Zamenhof-Tago 1979

—Humphrey Tonkin.

Bona virino similas al bona libro — amuza, inspira kaj instrua, ofte tro vortoz, sed, kiam dece bindita kaj ornamita, nerezistebla — kiel mi sopiras posedi libron.

Li: Kie do ni rendezvu, karulino?

Ŝi: Kie ajn vi volas, miulo.

Li: Bone, kaj kiam?

Ŝi: Kiam vi deziras, miulo.

Li: Bone, karulino, sed venu ĝustatempe.

Mono estas bona servanto, sed malbona mastro.

MARJORIE BOULTON RAPORTAS EL OXFORD

Ciujare, en oktobro, en Oxford, Anglujo, kie situas unu el la plej famaj universitatoj de la mondo, okazas, en la alisezone timata EKZAMENEJO, brua, gaja kaj interesa evento, la t.n. "Foiro por la Novicoj", angle "Freshers' Fair". Tie multaj studentaj societoj, pri politiko, religio, filozofio, sportoj, plej diversaj intereso, prezentas sin ĉe malgrandaj budoj, en multaj grandaj ĉambroj. Tiel la novaj studentoj, kaj, fakte, multaj studentoj jam ne novicaj, povas esplori, kion ili povos fari dum la jaro, ekster la stud-programoj.

Kaj tie troviĝis, en oktobro 1979, por la dua fojo, budo pri Esperanto, kiu sciigis eble ses aŭ sep mil homojn, ke Esperanto ja vivas. La "Oxford and District Esperanto Society" bonvenigas ne nur studentojn, sed ankaŭ iun ajn, kiu loĝas en la regiono Sed kiam la vivo en la granda, kulturriĉa universitata urbo estas tiel interesega, kaj multspecaj amuzoj kaj kulturaj aferoj estas tiel facile

atingeblaj, malgranda pionira Esperanto-Societo malfacile konkuras.

Dum deĵoris-fidele la sekretario, Marjorie Boulton, notante kelkajn benajn jesojn, sed devante akcepti multajn neojn, subite aperis apud la budo bela juna virino, nigrahara, vigla kaj afabla, kiu prezentis sin: Philippa Maddern, el Aŭstralio. Alveninte por doktoriĝi pri historia temo, studonte en la kolegio Brasenose, Philippa jam la unuan tagon de la trimestro serĉis la oksfordajn esperantistojn, kaj trovis ilin.

Kompreneble ŝi estis tre bonvena! Jen studentino, jam prestiĝa, kiu vere scias persone pri la vivanteco kaj valoro de Esperanto; ŝi tuj membris kaj pli-internaciigis societeton, kiu jam havas inter siaj anoj usonaninon kaj junulon el Brunei.

Philippa Maddern ne nur formale aniĝis, sed multe vizitas la kunvenojn; ĉiusemajnajn konversaciajn rondojn,

kiuj tre facilige okazas en ŝia propra kolegio; kaj la pliformalajn kunvenojn, kiuj okazas dum la universitata trimestro ĉiun duan semajnon. En siaj unuaj kunvenoj, ŝi aŭdis Marjorie Boulton paroli pri la temo "Kiel verki universalan legolibron?" — en kiun taskon Philippa jam iomete kunlaboris per ideoj kaj informoj; kaj Peter Weatherby, pri sia vizito al Finnlando, kie li instruis Esperanton en vere altprestigaĵaj someraj kursoj universitataj kaj vizitis aliajn esperantajn aranĝojn. Kiam tiu ĉi raporto estis verkata, Philippa anticipis la antaŭkristnaskan feston de la societo, kies anoj

ĝuos internacian menuon.

La oksfordaj esperantistoj vere sentas, ke Philippa Maddern, samideanino el la antipodo, kontribuas multon al Esperanto en Oksfordo. Ŝia klereco kaj prestiĝo, ŝia videbla saĝo kaj ekvilibro, ŝia helpemo kaj lojaleco, jam kuraĝigis pionirojn, kiuj foje sentas, ke "ili penas formanĝi monton." Certe dum 3 jaroj ŝi multon kontribuas al Esperanto en Oksfordo. Kaj, kiam dum universitataj libertempoj ŝi devos multe resti en la pil kvieta urbo, ŝi ne estos forĝestita; ŝi povos ĉeesti tiujn kunvenojn, kiujn aliaj studentoj maltrafos

ANTAŬ 85 JAROJ

LA MONDFAMA LETERO DE LEO TOLSTOJ

En la jaro 1894, S-ro V. L. Kravcov, en la nomo de esperantistoj de Voronej, skribis al Leo Tolstoj kaj petis lin esprimi sian opinion pri la problemo de internacia lingvo ĝenerale kaj speciale pri Esperanto. La 27-an de aprilo, 1894, Leo Tolstoj respondis kaj la Esperanto-traduko de tiu nun fama letero aperis la 15-an de julio, 1894 en "La Esperantisto", Nuernberg, N-ro 7 (55). Jen ĝia teksto:

Estimataj Sinjoroj !

Mi ricevis vian leteron kaj penos, kiom mi povos, plenumi vian deziron, t.e. eldiri mian opinion pri la penso de lingvo tutmonda entute kaj pri tio, kiom la lingvo Esperanto respondas al tiu ĉi ideo.

Pri tio, ke la homoj celas al tio, por fari unu anaron kun unu paŝtisto de prudento kaj amo kaj ke unu el la plej proksimaj kondukantaj ŝtupoj por tiu ĉi devas esti reciproka komprenado de la homoj unu kun alia — pri tio povas ekzisti nenia dubo. Por tio, ke la homoj komprenu unu la alian, estas necese aŭ tio, ke ĉiuj lingvoj per si mem kunfandiĝu en unu lingvo (kio, se ĝi fariĝus iam, povus fariĝi nur post tre longa tempo), aŭ tio, ke la sciado de ĉiuj lingvoj tiel vastiĝu, ke ne sole ĉiuj verkoj estu tradukitaj en ĉiujn lingvojn, sed ankaŭ, ke ĉiuj homoj sciu tiom multe da lingvoj, ke ĉiuj havu la eblon komunikiĝi unu kun la alia en tiu aŭ alia lingvo, aŭ tio, ke ĉiuj elektu unu lingvon, kiun devige lernus ĉiuj popoloj, aŭ fine tio, (kiel supozas la volapukistoj kaj esperantistoj), ke ĉiuj homoj de diversaj nacioj akceptu unu artefaritan facilan lingvon internacian kaj ĉiuj lernu ĝin. En tiu

ĉi konsistas la ideo de la esperantistoj. Ŝajne al mi, ke tiu ĉi lasta supozo estas la plej prudenta kaj — la plej grava — la plej facile efektivebla.

Tiel mi respondas la unuan demandon. La duan demandon — en kia grado la lingvo Esperanto kontentigas la postulojn de lingvo internacia — mi ne povas respondi tute decide, ĉar mi ne estas kompetenta juĝanto en tio ĉi. Unu, kion mi scias, estas tio, ke Volapuk aperis por mi tre komplika, Esperanto do, kontraŭe, tiel facila, kiel ĝi devas aperi al ĉiu eŭropa homo. (Mi pensas, ke por tutmondeco en absoluta senco de tiu vorto, t.e. por ligi inter si hindojn, ĉinojn, popolojn afrikajn ktp., estas necesa alia lingvo, sed por homo eŭropa Esperanto estas tre facila.

La facileco de ĝia lernado estas tiel granda ke ricevinte antaŭ ses jaroj Esperantan gramatikon, vortaron kaj artikolojn, skribitajn en tiu ĉi lingvo, mi post ne pli ol du horoj da okupado povis jam, se ne skribi, almenaŭ libere legi en tiu ĉi lingvo.

En ĉia okazo la oferoj, kiujn alportos ĉiu homo de nia eŭropa mondo, dediĉinte kelkan tempon por la lernado de tiu ĉi lingvo, estas tiel malgrandaj, kaj la sekvoj, kiuj povas veni, se ĉiuj, — almenaŭ la eŭropanoj kaj amerikanoj — ĉiuj kristanoj, — ellernos tiun ĉi lingvon, estos tiel grandegaj, ke oni ne povas ne fari tiun ĉi provon. Mi ĉiam pensis, ke ekzistas nenia pli kristana scienco, ol la sciado de lingvoj tiu sciado, kiu donas la eblon komunikiĝi kun plej granda nombro da homoj. Mi vidis multajn

fojojn, kiel homoj tenadis sin malamike unu kontraŭ la alia dank' al la mehanika malhelpo por reciproka komprenado. Kaj tial la lernado de Esperanto kaj la vastigado de ĝi estas sendube kristana afero,

kiu helpas al kreado de la Regno de Dio, tiu afero, kiu estas la ĉefa kaj sola difino de la vivo.

—Leo Tolstoj

D-RO ARTHUR BAUR VIZITIS ĈINION

Mi ĵus revenis de Ĉino, kie mi havis la grandan plezuron renkonti ĉinajn samideanojn. Mi vojaĝis tra la lando kiel membro de kvinpersona delegacio de la svisa gazetaro kaj mi jam antaŭ la forvojaĝo estis petinta la ĉinan ambasadorejon en Bern, ke oni bonvolu ebligigi al mi viziton en Radio Pekino, ĉar mi volis tie renkonti miajn ĉinajn kolegojn. Efektive unu el ili mi jam konis, nome S-ron Dia Song-en. Mi estis renkontinta lin dum la Universala Kongreso en Lucerno kaj li tiam bonvolvis partopreni en unu el miaj ĉiutagaj elsendoj. Li tiam diris al mi, ke mi vizitu lin, se mi venos al Pekino, kaj mi tiam ne pensis, ke tia vizito jam en la sama jaro efektiviĝos.

Kiam mi kun miaj kolegoj alvenis en la studio de Radio Pekino, akceptis nin, krom direktoro, tri membroj de la Esperanto-Sekcio, kiu entute konsistas el 9 personoj Ĉefo estas S-ino Hang Cun; ŝi ne nur estas lertega esperantistino, sed ankaŭ tre ĉarma persono. Krome akceptis min la jam nomita kolego Dai Song-en kaj Nan Jouli. Ni tuj vikle interparolis, kaj miaj svisaj kolegoj tre miris, ke mi povis rekte kaj sen malfacilaĵoj konversacii kun ĉinoj, dum ili ĉiam dependis de la helpo de interpretistoj.

La intervjuo, kiun ni ĉiuj faris kun la direktoro, suferis pro la malfacileco de la interpretado, kvankam nia oficiala tradukisto, kiu parolis france, tre klopodis. Ni estis informitaj pri la funkciado de Radio Pekino, kies internacia departemento komencis elsendi en aliaj lingvoj en 1950. Televido komenciĝis en 1958. Ni rigardis ankaŭ la studion kaj poste miaj svisaj kolegoj foriris por viziti fabrikon, dum mi restadis kun miaj ĉinaj kolegoj.

Ili havis tre gravan novajon, kiun mi nun kun plezuro disvastigas, nome, ke depost la 30-a de oktobro la Esperanto-disaŭdigo de Radio Pekino okazas ĉiutage. Por Eŭropo la elsendoj okazas de la 21-a ĝis la 21.30-a laŭ eŭropa tempo en la bendoj de 43 kaj 31 metroj.

Lunde, merkrede, vendrede kaj sabate estas novaj programoj, dum marde, ĵaŭde kaj dimanĉe ili estas ripetataj. Por aliaj regionoj de la mondo estas aliaj elsendotempoj; pri ili vi povas informiĝi skribante al Radio Pekino (Beijing laŭ ĉina ortografio), Esperanto-Sekcio. Tio estas tre valora novaĵo kaj mi gratulas miajn ĉinajn kolegojn pro tiu sukceso.

Unu demando, kiu interesis ilin, koncernis la amplekson de la esperantaj elsendoj de Svisa Radio Internacia. Ili demandis, kiamaniere oni povas fari tiel mallongajn programojn. Efektive, ili ne konas ilin, ĉar SRI estas nur bone aŭskultebla en Eŭropo, Afriko kaj Suda Ameriko, dum en oriento oni nur hazarde povas kapti nin. Mi klarigis, ke ni provas doni kiel eble plej enhavorican elsendon dum dek minutoj, elĉerpante la tempon por iom funde pritrakti unu temon kaj rezignante pri muziko kaj bagateloj.

Post mia vizito en la radio, kiu daŭris du horojn, S-ino Hang Cun demandis min ĉu mi eble povus disponigi tempon por renkonti pliajn esperantistojn. Mi respondis, ke mi tre ŝatus, sed ke tio dependas de la programo preparita por la svisa delegacio. Mia afabla gvidanto, Tu Peilin, okupiĝis pri tio kaj trovis disponeblan tempon en unu vespero. Post vizito ĉe la Vic-Cefministro Gu Mu, kiam la ĉina televido filmis la svisajn gastojn, miaj novaj amikoj serĉis min aŭtomobile en la hotelo kaj kondukis min al kunveno en la domo de la Fremdlingva Eldonejo. Tie jam atendis min proksimume 30 Pekinaj esperantistoj. Por la plej multaj mi certe estis la unua specimeno de Svislando, kiun ili vidis, sed kelkaj jam konis Svislandon kiel membroj de la ĉina delegitaro en la Universala Kongreso en Lucerno.

Laŭ la peto de miaj gasigantoj mi paroladis libere, ĉar mi jam ne povis prepari min, pri la historio kaj stato de la Esperanto-movado en Svislando, la rolo de Svisa Esperanto-Societo, la

evoluo de la Kultura Centro Esperantista kaj de la planlingva biblioteko en La Cnaux-de-Fonds, pri nia radiostacio kaj kelkaj aliaj sviasaj aferoj. Je la fino de la kunveno, kiu laŭ eŭropaj tempaj kutimoj frue en la vespero finiĝis, multaj fotografaj estis faritaj. Inter la aŭskultantoj troviĝis gvidaj personoj de la Ĉina Esperanto-Ligo-Zhang Qichen, Yie Junjian, Li Nanxi -, respondecoj por la konata bela revuo "El Popolo Ĉinio"—Liu Lin kaj Li Shijun — la estro de la distribuanto de EPC Zhang Zhai kaj aliaj gravaj personoj de la ĉina movado.

Por mi estis granda travivaĵo renkonti tiel multajn samideanojn en lando tiel fora, kaj mi konstatis kun plezuro, ke la

izoleco, en kiu Ĉinio dum kelkaj jaroj enfermis sin mem, nun estas anstataŭata per la preteco krei viglajn rilatojn kun aliaj landoj kaj renkonti la fremdulojn ne nur kun tradicia ĉina ĝentileco, sed kun varmaj koroj. Mi tiom pli bedaŭris, ke la tempo ne permesis al mi renkonti ĉinajn esperantistojn en aliaj urboj, kiujn mi post Pekino vizitis

(Laŭ aranĝo kun Svisa Radio Internacia)

(D-ro Arthur Baur estas ĉefredaktoro de granda regiona ĵurnalo en Winterthur, redaktinto de la Svisa Antologio kaj estro de la Esperanto-Programo de Svisa Radio Internacia).

NIA PROPRA SOMERA UNIVERSITATO

La L.K.K. de la 22-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso ricevis tiom da proponoj de gesamideanoj pretaj prezenti prelegojn, ke ni devos aranĝi du prelegajn sesiojn. Jen la provizora programo:

Ĵaŭdon, la 3-an de jan., 1980, je la 7.30a p.t.m.

D-ro A. Capell: "Traduko de la Pentateŭko"

D-ro A. Einihovici: "Sano kaj medicino nuntempe"

S-ro R. Harry: "Esperanto por neregistaraj internaciaj organizoj"

S-ro T. Steele: "Ĉu tro simpla la respondo?"

Lundon, la 7-an de jan., 1980, je la 2-a p.t.m.

S-ro A. Cocking: "Mi akuzas"

S-ro J. Cooper: "Taksado de infanaj desegnaĵoj"

S-ino A. Gash: "Sola ĉirkaŭ la mondo"

S-ro B. Silverlock: "Junulara rolo"

F-ino J. Walker: Temo anoncota

Ĉiu prelego daŭros proks 20 minutojn. sekvos 10-minuta diskuto

—R. G. Robertson

ESPERANTISTOJ EL MONGOLIO ?

La Kongres-Komitato ricevis el Mongolio esplor-demandon pri kongresaj detaloj, cele al ebla partopreno. Ĉu ili fakte ricevos vizojn estas alia demando. Ni tamen esperu!

CONGRESS MEMBERS PLEASE NOTE :

The Local Congress Committee must — WITHOUT FAIL — be informed how many wish to participate in the various excursions and the Banquet. If you have not made your bookings, please write **immediately** to Box 415, Manly P.O., 2095.

ĈU VI DEZIRAS HELPI

Aŭstraliaj Esperanto-Kongresoj jam fariĝis tiel ampleksaj, ke unu sola raportisto tute ne kapablas registri kaj priskribi ĉiun kongreseventon kaj prelegon. Ni devas, do, trovi solvon al tiu problemo

Kiu kongresano ŝatus helpi ? Ni bezonas **raportistojn**, kiuj estas pretaj kroniki 2 aŭ 3 kongresaranĝojn en telegram-stilo. **Prelegantojn** ni petas doni al la Redaktoro aŭ resuman enhavon aŭ kopion de la prelego. **Estroj de fakunsidoj** bonvolu transdoni raporteton pri viaj decidoj.

Ni serĉas ankaŭ **fotografiston**, kiu estas preta fari 3-4 blanke-nigrajn fotografiojn poŝtkart-formatajn kaj transdoni ilin proksimume je la **9-a de januaro** al la Redaktoro Tiujn fotografaĵojn ni uzos por 'Australian Esperantist' kaj por raporto al "Heraldo de Esperanto".

Se vi deziras helpi, bonvole kontakti min en la kongresejo je la **2-a de januaro**.

—Herbert Koppel.

Sekretaria/Kasista postenoj vakas

Les Scott ne plu kandidatos

A.E.A. serĉas kandidato(j)n por la gravaj postenoj de Sekretario kaj Kasisto, dum la venonta dujara periodo, ĉar Les Scott informas, ke li ne volas daŭre prizorgi la taskojn Les agis kiel kasisto dum la lastaj 10 jaroj kaj kiel sekretario dum 4 jaroj (la unuaj du neoficiale kaj la duaj du oficiale). Li sentas ke li meritas ripozon. S-ro Scott rekomendas, per longa sperto, ke la du postenoj estu kunigitaj por pli rapida servo, pli facila kaj pli efika laborado, kio liaopinie, evitos duobligon de la taskoj. La dua oficiale elektita posteno estu nomita Help-Sekretario/Kasisto. Tiamaniere, 2 personoj povas dividi la taskojn laŭvole. S-ro Scott plue promesas sian helpon al la novaj elektitaj oficistoj kaj estos ĉiam je ilia dispozo.

Sekretaria Raporto

Donacoj dum 1979 (ĝis 20/11)

S-ro Z. V. Serebryawski, Melbourne 1.00
 Ges-roj E. Amman (nun Zuerich) 10.00
 F-ino A. Wilks, Cammeray, NSW 10.00
 Ges-roj E. Hearne, Melbourne 1.00
 F-ino W. Addis, Adelaide 3.00
 Ges-roj A. C. Oliver, Orelia, WA 11.00
 F-ino B. C. Williams, Melbourne 8.00
 D-ro & S-ino A. Einihovici, Perth 8.00
 S-r H. Koppel, Melbourne 10.00

La A.E.A.-Estraro alte taksas tiujn donacojn kaj antaŭdankas por donacoj, kune kun la kotizpagoj dum la venonta jaro. Via valora helpo multe antaŭenigas nian aferon.

Novaj membroj dum 1979 (ĝis 20/11)

S-ro Z. V. Serebryawski, Melbourne k
 S-ro A. Mann, Bilpin, NSW
 S-ro J. Logan, Bacchus Marsh, Vic.
 S-ro D. Rogers, Melbourne
 S-ino M. Green, Rockhampton
 S-ino J. M. Burch, Exeter, NSW
 S-ro B. W. Rudd, Sydney
 S-ro Michael Robinson, Melbourne
 S-ino J. Ludgate, Melbourne
 Ges-roj G. T. Tuman, Healesville, Vic.
 Ipswich E-Klubo
 S-ino T. Thomas, Lawson, NSW
 S-ro Karl Kelers, Busselton, WA (‡ jaro)
 S-ro J. S. Paroz, Coorparoo, Q'ld.
 S-ro F. MacDonnell, Mackey, Q. (‡)
 S-ro E. C. Thomas, Toowoomba
 S-ro W. R. Robinson, Melbourne.
 S-ino P. Treweek, Orange, NSW
 S-ro K. Cavel, Sydney (‡)
 F-ino G. Tonsbeek, Allawah, NSW (‡)
 S-ro R. Nicholson, Moranbah, Q. (‡)
 S-ro A. Marshall, Melbourne (‡)
 S-ro P. A. Finch, Melbourne (‡)
 F-ino G. E. Courtenay, Melbourne (‡)
 S-ino G. M. Marshall, Melbourne (‡)

S-ro N. McCurran, Capalaba, Q
 S-ino D. Wright, Nana Glen, NSW
 Ges-roj A. E. Morrison, Goodna, S.A
 Oakleigh Esperanto Group

GRATULOJN TIM -

Antaŭ sepdek jaroj, en novembro 1909, deksepjarulo, V. J. Timmins, komencis lerni Esperanton. Hodiaŭ "Timmie" estas dojeno de nia movado en Aŭstralio. 87-jara, "malgraŭ sia aĝo", malgraŭ severa artrito, malgraŭ progresanta surdeco, li restas, ne nur "entuziasma" sed vere aktiva esperantisto. Li ankoraŭ gvidas multajn korespond-lernantojn; li ankoraŭ verkas artikolojn por "Telopeo"; li ankoraŭ kiam tion permesas lia sans-tato, ĉeestas konferencojn, kongresojn, kaj kunvenoj esperantistajn. Li ne kredas ke li faras ion gratulindan. Li estas esperantisto, jen ĉio

—Wre Chandler



● **TOOWOOMBA:** La Zamenhofa Festo okazis ĉi-jare jam je la 17-a de novembro, ĉar kelkaj membroj ferias dum decembro. S-ro H. V. Petley sian revenis de vojaĝo al Figio, kie li laboris antaŭ 50 jaroj.

● **BRISBANE:** De la 12-a ĝis la 17-a de novembro nia societo partoprenis la ĉiujaran Hobio-Ekspozicion en la urbdomo. Membroj deĵoris laŭvice dum 12 horoj tage kaj disdonis proks. mil flugfoliojn kaj vendis 70 lernolibrojn.

La Jarkunveno okazis la 26-an de novembro kaj elektigis la jena nova estraro: Prez: Trevor Steele; Vic-Prez: Ray Ross kaj Tom O'Grady; Sekr. Cathy Sullivan; 2-a Sekr: Bev Allatt; Kasisto: Merv. Schramm; Libro-Peranto: Edna Julie; Bibliotekisto: Annie Spencer; Redaktisto: Peggy Ross. —Ray Ross.

● **MELBOURNE:** Je 19-a de novembro, S-ro M. Cohen faris interesan prelegon "La kuracisto malantaŭ la mikrofono. "Temis pri ĉiŝemajnaj disaŭdigoj de Israela Radio en araba lingvo, kiuj havas milionojn da aŭskultantoj kaj emas doni medicinan helpon al araboj en la Meza Oriento. Samvespere, David Reckell informis pri la Kivi-frukto, kune kun

receptoj por ties uzebleco. Je la amuzvespero de 26-a novembro, S-ro H. Koppel montris diapozitivojn kaj parolis pri vagado ĉirkaŭ Vieno.

● **PERTH:** Je 2/10 la diskutemo estis "Mono", temo kiu interesis ĉiujn. Je 16/10 ni diskutis la temon "Sub kiu formo vi preferus reenkarigi?"

● **ADELAIDE:** En la elementa lernejo de Port Noarlunga okazis en oktobro Esperanto-ekspozicio. La ekspoziciaĵojn provizis la Melburna E-Societo kaj aranĝis la ekspozicion S-ro Bob Felby. Je la 30-a de oktobro, Bob Felby faris prelegon pri Esperanto antaŭ 100 infanoj kaj kelkaj instruistoj. La entuziasmo ŝajne estis tre granda, ĉiuj volas lerni kaj la lernejestro, S-ro John Purvis, jam dum iom da tempo mem studas la lingvon, ĉar li intencas instrui ĝin en la lernejo.

● **SYDNEY:** Frank Dunn, 21 Okt., parolis pri moraloj. Katolike edukita, li komprenis ke nekatolikoj estas "damnataj ĉiame". Li diskutis la moralojn de la Japanoj kiel la militistoj konis ilin en Nov-Gvineo.

"Kiel viroj devas toleri la estradon de la virinoj?", estis la temo de debato je 28-a de okt. Unu plenaĝulo diris ke ekde sia naskiĝo virinoj regis kaj eĉ nun regas lin, kaj ke li tre ĝuas la regadon. Alia diris, ke ĉar mankas al virinoj la memfido, por tio ili emas estri la virojn.

Tom Elliott, 5-a nov., tre lerte legis diversajn poemojn, inter ili verkojn de William Auld kaj Brendon Clark. Je 12-a nov, membroj montris diversajn lumbildojn: la juvelojn de Palaco Topkapi en Turkujo, la montojn de Svislando, bolantaj akvon kaj koton en Novzelando, la kanalojn de Nederlando.

—M Chaldecott.

ESPERANTO-EKSPOZICIO EN HEALESVILLE

En la montaro "Dandenong", proksimume 60 km de Melburno, en la Urba Biblioteko de Healesville, loko multe vizitata de turistoj, je la 11a de decembro, malfermiĝis Esperanto-Ekspozicio, dank' al la energiaj klopodoj de du kompare novaj, sed entuziasmaj Esperantistoj, Gerald kaj Ruth Tumman.

La Esperanto-Ekspozicio, kiu daŭros tutan monaton, kaj vidiĝas jam ĉe la enirejo de la biblioteko, estas vere okulfrapa prezentado, arte, elegante kaj inteligente aranĝita por doni plej multajn klarigojn pri la kreskanta bezono por internacia lingvo kaj aktualajn informojn

pri la klopodoj kaj atingoj de Esperanto sur mondskala scenejo.

Pruvinte sin serĉanta leganto, S-ro Tumman elektis plej trafajn artikolojn de sur la paĝoj de Esperanto-gazetoj — ĉefe "Esperanto" — kiujn li ekspoziciis en verda kadro kaj kune kun angla traduko, sperte tajpita de la edzino, kaj same verde enkadrigita kun verdasaga indikilo. Sur granda mondmapo pingloj kun kolorkapoj, indikas lokojn kie troviĝas Esperanto-Delegitoj aŭ izoluloj laŭ unu el la du koloroj. Kompreneble montrigas ankaŭ libroj kaj gazetoj, kiel ankaŭ informfolioj disdoneblaj al interesatoj.

Tiu modela ekspozicio povas esti eduko egale por vizitantaj esperantistoj kaj por la ne-esperantista publiko. Gratulojn al la nova esperantista paro.

—Fay Koppel

Okaze de la Internacia Jaro de la Infano
Sajnas taŭge rememori la "vizion helan", kiun William Auld tiel bele bildigis en la jena poemo:

SAMIDEANETO

Li ŝajnas tute ordinara
kaj petolema knab' dekjara:
poŝfundon liaj manoj sondas,
la haroj nekombite ondas,
kaj viglas en vizaĝ' keruba
okulesprimo nepre buba.
Sed lia koro jam ampleksas
la tutan mondon, reve teksas
vizion helan pri homaro
vivonta jam en solidaro

Ĉar, dum la straton li promenas,
en la malgrandan koron venas
sopir' pri poŝta rendezvo
kun kamarado en Peruo;
li jam ekkonis per skribado
samaĝan knabon en Granado,
kaj korespondas por plezuro
kun indi'en' en Singapuro,
knabino jugoslava, kaj
vakerofil' en Urugvaj',
kun nigrulet' en Rodezio,
bulgara "onklo" en Sofio,
arab' kaj judo palestinaj,
kaj junaj dunaskitoj ĉinaj:
li scias per leteroj amaj,
ke ĉie knaboj estas samaj !

Eĉ pli li lernas senkonscie,
ke homoj estas homoj ĉie;
kaj kiam venos aĝ' matura
ne estos li ŝtatojn nura,
sed per mondlingvo la infano
fariĝos mondociĉivano !
(el "Kvaropo")

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

KAETHE SCHWERIN

(with special reference to the late PAUL SCHWERIN)

It started one Sunday last century. In Danzig, the fairy-tale city enriched culturally and architecturally by 1000 years' history. A girl at last, after two boys!

Katie had a delightful childhood dominated, protected and adored by her 2 brothers and their mate Paul Schwerin. Golden Baltic beaches, shady, dense forests — Scouting — learning to love nature and to help others

But happiness collapsed like a house of cards! 1914. A brother killed and Paul severely wounded. Shocks, irreplaceable losses, constant drudgery, continual hunger. A lasting lesson in how to cope.

After the war, Paul qualified as an architect and Katie, with her Diploma, became a Kindergarten teacher — an ideal profession, for she adores children.

In Berlin, Paul led her to the altar and a most uncertain future — post-war depression, unemployment and galloping inflation. What good mathematicians they needed to be! In the morning one U.S. Dollar equalled 1000 marks, the same evening 12,000 marks. With her baby in her arms, she stood in queues for fuel, food — anything — to spend her money as quickly as possible. Finally, U.S. Dollar equalled 4,000,000,000,000 marks and a ton of paper money would scarcely buy a can of sardines.

An escape from darkness into light came in 1930, when, seeing some "funny" words on a blackboard, Paul and Katie entered an Esperanto-class in the "Adult Evening College" At first fascinated, they were soon quite 'hooked'. The teacher was a friend of Zamenhof himself. Paul, with his grounding in Latin and Katie with her French, made good progress and soon Katie was writing in Esperanto rhyme. Her "Kanto de l'Elefanto" was acclaimed and she had to recite it for the "oldies".

Hard, obsessed study prepared them

for the 1932 Universal Congress in Paris, whither they went in a carriage full of Danes, Swedes and Norwegians, all wearing the green star and enjoying a "mini-congress of their own: In the Sorbonne, they found themselves sitting next to Raymond Schwartz and Jean Forge, both outstanding in the Esperanto world of literature. On their return home, they lectured to the Cseh-group in Berlin.

1934 found them at the Universal Congress in Stockholm. Even then, clouds no bigger than a man's hand" warned them of political storms, which would threaten their beloved language and them personally.

Esperanto was their lifeline and through it friends helped them emigrate, not by sea, for ships were booked up for years, but by the perilous air route. Thus, the Schwerins managed to reach the Antipodes on Dutch wings. The trip took 8½ days — no night-flying — but the nights were spent in the most exciting spots on 3 continents. Slides give an exotic glimpse of the story.

Sunbathed Sydney, with the "new" Harbour Bridge, induced love at first sight. Vic Rutland was waiting to welcome them. Befriended by the local Esperantists, they were soon active in the Society. Paul became Chief Examiner, while Katie taught. They found a flat in North Sydney and Katie still lives there.

In World War II, with husband and son in the Army, Katie fought Hitler by sewing khaki shorts.

Nowadays, alone but busily serene, Katie looks back with gratitude on her Esperanto associations, not least her attachment to those like Freda Smith, Audrey Dennis and Kevin Smith, whom she especially mentions with a smile as the light of reminiscence dances in her eyes.—

—Arthur Cocking

110 JOINED THE CONGRESS

As we go to press (17 Dec.), 110 Esperantists have joined the **22nd Australian Esperanto Congress** (Jan. 2-9, 1980 Sydney).

For late Enrolments, mail your **Congress Fee (\$15.00)** to **Mrs. E. Matasin, 1 Coorabin Road, Northbridge, 2063**. Add at least \$10 for room deposit The Congress will be held at the "Wesley Centre", 210 Pitt Street, Sydney.

Fifth List of Congress Members:

104. Cliff Tronerud, Tweed Heads NSW
105. Malcolm Ross, Manly
106. Adelaide Ross, Manly
107. Cliff Bailey, Brisbane
108. Nan McGuckan, Brisbane
109. Harry Beddie, Sydney
110. Bettie Hart, Sydney

State Distribution: N.S.W. 60; Queensland 19; Victoria 15; Tasmania 5; Western Australia 5, A.C.T. 3; South Australia 1; Northern Territory 1; Japan 1.